

The background is a black film strip with white sprocket holes. Two large blue circles are positioned vertically in the center, resembling film reels. The text is placed on the white sprocket hole areas.

Dončo Hítrov

*En la mirinda
mondo de la kino*

DONČO HÎTROV

En la mirinda mondo de la kino

BUDAPEȘTO, 1985

©DONĈO ĤITROV

ISBN 963 571 157 3

Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, 1985
Respondeca eldonisto: Tibor Vaskó
Respondeca redaktoro: Imre Szabó
hearota 85-0260

I. UNUA PARTO



OM PRI MI MEM KAJ PRI MIA LIBRO



La rememoro pri mia unua renkontiĝo kun la kino reverigas min al 1931 – en mian naskiĝurbon Lovêc.

Nur sesjara infano, akompanate de mia pli aĝa kuzo, la unuan fojon mi eniris kinosalonon. Oni projekciis filmon pri la kruelaj bataloj inter la blankaj konkerantoj de Nord-Ameriko kaj la indianoj – indiĝenaj loĝantoj kaj veraj posedantoj de tiu teritorio. Mi rememoras nur fragmenton de tiu filmo: iu homo estis transiranta riveron manpendante sur ŝnurego, alligita al arbo, jam bruligita far la indianoj. Timtremante, preskaŭ senspire, mi spektis la penojn de la homo, kiu povis ĉiumomente fali en la riveron...

Kvankam mi travivis fortajn emociojn, depost tiam mi fariĝis arda kinoŝatanto.

Estis tagoj, kiam mi spektis du, eĉ tri filmojn! ...

Unu el la plej ĝojaj momentoj en mia infanaĝo estis, kiam mia onklo – opereta kantartisto – donacis al mi amatoran filmprojekciatoron! En mian kapon tuj venis ideo: organizi filmprojekciojn en nia subtegmento por la infanoj el nia kaj el la najbaraj domoj.

Tiu ĉi projekto tamen restis nerealigita pro la enmiksiĝo de la pordisto de nia loĝdomo kaj ne pasis sen riproĉoj far miaj gepatroj. Sed restis en mi la firma decido: iun tagon estiĝi filmisto! ...

Mi havis la feliĉon realigi miajn revojn kaj post multaj jaroj mi sukcese kunligas la profesion de ĵurnalisto kun la kino.

Jam kiel studento de ĵurnalistiko, mi komencis labori en la redakcio de la monata revuo „Filmovi Novini” („Filmaj Novaĵoj”).

Kiel rapide forflugas la jaroj! ...

Partopreno en filmaj festivaloj kaj kongresoj, kunlaborado kun gazetoj kaj revuoj, kun radio kaj televido, verkado kaj tradukado de libroj, sciencaj esploroj pri filmarto, filmado kaj samtempe aktivado per Esperanto!

Intereson pri Esperanto vekis en mi mia parenco d-ro Panajot Ĥitrov — unu el la elstaraj esperantistoj en Bulgario (1905-1945). El lia lernolibro, jam kiel dekseksjara gimnaziano mi komencis lerni Esperanton, kiu vekis en mi novajn interesiĝojn.

Laŭ mia iniciato en 1963 estis fondita Bulgara Esperantista Kinoklubo. Ĝiaj membroj faris plenlongan dokumentan filmon pri la 48-a UK de Esperanto en Sofio, 1963. Dum tiu kongreso estis fondita la INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ FOTO-KINOMAGNETOFON-AMATOROJ (ILEF).

En 1978 mi estis gvidanto de la Gazetara Servo de la 63-a UK de Esperanto en Varna. En la jarkunveno de ILEF, okazinta kadre de la kongreso, mi estis elektita ĝia prezidanto.

Ĉar ILEF-anoj kaj aliaj esperantistoj ofte plendas pro manko de Esperanta literaturo pri kino, mi decidis traduki en Esperanton mian libron „EN LA MIRINDA MONDO DE LA KINO”, eldonitan bulgarlingve en 1971. Ĝin mi decidis al la junaj legantoj — la plej ardaĵ ŝatantoj de la kino.

En tiu ĉi libro mi kolektis miajn multjarajn spertojn, akiritajn dum mia laboro en la kinematografio.

En la „Konciza Filma Terminaro”, aldonita al la libro, mi provis klarigi iujn el la plej ofte uzataj specifaj filmterminoj, kiujn la


legantoj renkontas en la recenzoj kaj artikoloj pri la filmarto.

Mi estus ege danka al ĉiuj, kiuj pliĝustigus la tradukon kaj la klarigon de iuj el la specifaj terminoj kaj nocioj, ĉar tio estas nur la unua

paŝo al pli ampleksa Esperanta Filmterminaro.

La plej granda rekompenco por mi estus, se mia libro atingus la junajn legantojn kaj plaĉus al ili.

LA AŬTORO





IO KOMENCIĠIS KVAZAŪ ŠERCE...

Velizar ofte gastis ĉe mi.

Li ŝatis interparoli kun mi, foliumi librojn aŭ ilustritajn revuojn en mia biblioteko.

Liaj demandoj al mi estis sennombraj kaj niaj interparoloj kutime similis citaĵojn el enciklopedio.

En tiu ĉi printempa posttagmezo ni denove estis en mia laborĉambro.

Sur la tablo antaŭ ni kuŝis liaj ŝatataj frandaĵoj — salitaj migdaloj, ĉokoladaj bombonoj kaj boteloj kun refreŝiga trinkaĵo. Nin atendis longa kaj grava interparolo.

Mi proksimigis la mikrofonaĵon al Velizar kaj premis la butonon de la magnetofono...

— Ĉio komenciĝis kvazaŭ ŝerce... — li komencis.

... Estis interleciona paŭzo.

El la lernejaj koridoroj la batalo translokiĝis en la korton. Slavi estis okupinta pozicion apud la fontoŝtono kaj de tie surŝprucigis per akvostrioj la knabinojn.

Mi subtenis la atakon per papersagoj, kiujn mi alblovas tra mallarĝa tubeto.

Plej laŭte kriegis Svetla kaj Verka kaj supersutis nin per ofendaj vortoj... Sed ni bone sciis, ke ili intence krias. Fakte ili estis kontentaj pro la intereso, kiun ni montris al ili anstataŭ ludi per globetoj.

Tute neatendite la situacio ŝanĝiĝis.

La dikulino Cveta aperis malantaŭ la dorso de Slavi kaj verŝis glason da akvo sur lian kapon...

Tio ja estis jam troa! Tia perfida bato depost la dorso! ...

La knabinoj svenis pro rido kaj montradis per fingroj al Slavi, kiu spiregis kiel ĉevalo kaj skue forigis la akvon desur sia hararo.

Mi furioziĝis pro kolero kaj jam estis preta ĵeti min en pugnobatalon, kiam iu kaptis mian manon.

— Nu, venu kun mi por momento!

Ni ektimis pensante, ke estas iu instruisto el la najbaraj klasoj, kiu kondukos nin al la direktoro.

Feliĉe, evidentiĝis, ke la nekonata homo estis el la Kinematografio. Oni serĉis infanojn por ludi en filmo.

Iu virino alkondukis ankaŭ aliajn lernantojn kaj enskribis siajn nomojn kaj adresojn en sian notkajeron.

La viro sidigis nin unu post la alia sur la benkon kaj fotis nin.

La sonorilo ektintis kaj ni revenis en la klasĉambron.

Kaj poste ni parolis nur pri tiu okazaĵo kaj faris la plej diversajn divenojn. Slavi kaj mi eĉ forgesis venĝi nin pro la perfida atako de Cveta kaj paciĝis kun la knabinoj...

Post kelkaj tagoj, reveninte el la lernejo, mi vidis mian patrinon ege ĝoja.

— Velizar, oni aprobis vin ludi en filmo! Jen, legu...

Ŝi etendis al mi leteron de la Studio por ludfilmoj, per kiu oni min invitis viziti la Kinocentron por provfilmade.

Kiam mia patro revenis post la laboro kaj tralegis la leteron, li kuntiris la brovojn kaj diris:

— Ba! Nur tio mankis al vi — ludi en filmo! ... Kaj la lernejo? Ĝuste nun — ĉe la fino de la lernejo! ... Anstataŭ ripozi kaj restarigi viajn fortojn dum la ferioj, vi perdos la libertempon por ludi en ia filmo! ...

Panjo ekscitiĝis:

— Kial do ne? Tiam honoron oni faris al ni, aprobinte lin! ... Des pli ke oni jam ekzamenis lin pri preskaŭ ĉiuj lernobjektoj...

Do mi ne plu okupu vin pri la diskutoj en mia hejmo.

Finfine estis decidite, ke mi iros al la Studio por provfilmade.

Ŝajne la plej ĝoja el ĉiuj estis panjo. Nur mia frateto Vladi ŝercis:

— Ha, ha! ... Kinoaktoro! ...

— Ĉit! Eksilentu! ... — mi koleriĝis. — Ja nenio estas certa. Tio ĉi estas nur provfilmade...



I FARIĢAS KINOAKTORO

Panjo informis mian instruistino, ke mi forestos el la lernejo pro „grava familia afero” kaj ni forveturis per aŭtobuso al la Kinocentro. Tie oni faras filmojn. La Kinocentro estas tuta urbeto, situanta ĉe la piedo de la monto Vitoŝa. En bona vetero ĝiajn konstruaĵojn oni povas vidi el la urbocentro.

Kiam la aŭtobuso haltis antaŭ granda, blanka konstruaĵo, min impresis, ke ĝi tre similas al nia lernejo, al uzino aŭ al kazerno. Enirinte, ni ekmarŝis laŭ longaj koridoroj kun multaj pordoj ambaŭflanke – ĝuste kiel en la lernejo. Ĉie ni renkontadis rapidantajn homojn.

Sur la pordoj estis interesaj surskriboj: „LA BLUA BALONO”, „SE MI HAVUS ĈEVALON”, „VI KAJ VIAJ AMIKOJ”, „LA TRI PAJACOJ”...

Poste mi komprenis, ke tiuj surskriboj estis titoloj de filmoj, kiujn oni ĝuste tiam faris.

Antaŭ iu pordo kun surskribo „LA AŬDACAJ PLUMOJ” ni vidis ankaŭ aliajn infanojn alvenintajn kun siaj gepatroj. Mi multe ekĝojis vidinte ĉi-tie miajn samklasanojn Slavi, Verka, Svetla, Milko kaj ankaŭ infanojn el aliaj klasoj de nia lernejo. Slavi ekridetis kaj okulsignis al mi, sed la knabinoj estis seriozaj kaj gravmienaj.

Regis granda bruoj. La infanoj puŝe provis viciĝi kiel eble plej antaŭe.

Tiam el la ĉambro eliris la homo, kiu faris pri ni fotojn en la lernejo. Li tenis en sia mano nomaron kaj petis nin silenti.


– Tiuj, kiuj aŭdis siajn nomojn, venu kun mi – li diris kaj ekkondukis nin laŭ la koridoro kune kun niaj gepatroj.

Ni eniris iun grandan ĉambron kaj en tiu momento nin blindigis la lumoj de tre fortaj lum-jetiloj.

Al ni proksimiĝis viro kun griza mallonge tondita hararo.

– Saluton! Sidiĝu kaj instalu vin oportune! – ĝentile ridetante li invitis nin kaj poste turnis sin al niaj gepatroj:

– Ĉu vi konsentus, se mi petus vin fari mallongan promenon? Eble al vi estos interese trarigardi la Kinocentron? Intertempe ni iom interparolos kun tiuj simpatiaj geknaboj. Aŭ, se vi ne kontraŭstaras, ni povus revenigi ilin en la urbon per nia aŭtobuso...



LA KINOCENTRO ESTAS TUTA URBETO, SITUANTA ĈE LA PIEDO DE MONTO VITOŜA

Niaj gepatroj faris malkontentajn mienojn, tamen finfine ni restis solaj...

Ni jam instaligis sur la seĝoj kaj la juna grizhara viro rigardis nin ĉiam tiel ridetante, amike.

— Mi estas certa — li diris —, ke inter vi estas specialistoj pri futbalo. Eble ili helpas al mi solvi iun disputon. Ĝus antaŭ via alveno ni kun mia kolego estis kverelontaj. Mi asertis, ke la morgaŭan futbalan matĉon gajnos „Lokomotivo”, malgajnos „Torpedo”, kaj li penis konvinki min, ke la fervojista teamo nun havas pli grandajn ŝancojn, ĉar...

Li eĉ ne sukcesis fini sian frazon, ĉar tuj kelkaj voĉoj samtempe provis klarigi, kiu el ili pravas kaj kial tiu aŭ la alia teamo gajnos la matĉon...

— Stultaĵojn vi parolas! ... — ekkriis Slavi al Milko. — Ĉu vi scias, ke nun... — kaj li komencis detale klarigi la avantaĝojn de la fervojista teamo kaj ĝiajn ŝancojn por venki en la morgaŭa matĉo. Inter la knaboj Slavi estis rekonita „specialisto” pri futbalo, li neniam forestas de la stadiono, kiam ludas lia ŝatata teamo. Kvankam mi ne estas tia entuziasmo, ankaŭ mi ŝatas la futbalon kaj ofte ĉeestas matĉojn. Ĝuste pri la ŝatata teamo de Slavi mi havis propran opinion kaj pro tio mi enmiksiĝis:

— Eble vi ne forgesis, ke la pasintan dimanĉon ili perdis la matĉon?

— Ne enmiksiĝu en aferojn, kiujn vi tute ne komprenas! ... — severe kaj dignoplene diris al mi Slavi. — Nun ni estas en la plej bona stato! ...

Ekestis terura bruego kaj la grizharara viro pene provis trankviligi nin.


— Nu, bone, bone! ... Morgaŭ ni vidos, kiu el vi plej ĝuste divenis la rezulton! ... Kaj nun diru al mi, kiu el vi ne ŝatas spekti filmojn? ! — demandis li kaj atente ekrigardis nin. — Ĉu estas tiaj? ! Kaj kiajn filmojn vi preferas?

— Mi plej multe ŝatas muzikfilmojn... — senĝene diris Verka.

— Ha, ha! ... Muzikaj filmoj! ... — enmiksiĝis Milko. — Mi preferas filmojn, en kiuj estas pugnobatado, aŭtomobilaj konkuroj aŭ aventuroj kaj ne sentimentalaĵoj!

La juna viro ekridegis.

— Sentimentalaĵoj, vi diras... Ne, vi ne pravas: diversaj homoj, diversaj gustoj, ĉu ne? Kaj kiajn librojn vi ŝatas legi?



FILMA SKIPO DUM FILMADO

— Diversajn... -- konfuzite diris Milko. — Plejparte aventurajn kaj tiujn pri skoltado, milit-
esploristoj.

— Via nomo? — li turnis sin al mi.

— Velizar.

— Kaj vi, Velizar, kiajn librojn vi ŝatas?

— Ankaŭ mi ŝatas librojn pri aventuroj...

— Ĉu vi scias parkere iun versaĵon?

— Jes, kelkajn...

— Ĉu vi povus deklami iun el ili?

— Mi scias unu fablon — „Aglo kaj heliko” — mi respondis.

— Nu, bone! Ni aŭskultu fablon...

La lumŝetiloj preskaŭ blindigis min, sed tamen mi komencis deklami:

„... Meze de Balkan-montaro, sur la supro de abio

la aglo vidis besteton malgrandan, ĝibhavan kun kornoj,

pli abomenan ol serpento, ol la diablo pli malbelan...”

Dum mi deklamis kaj penis imiti la helikon, klarigantan al la aglo, ke ĝi atingis la supron de la abio per rampado, mi rimarkis, ke dum la tuta tempo iu viro direktadis al mi la objektivon de granda aparato. Kiam mi finis deklami, mia vizaĝo estis ruĝa pro la varmego kaj travivita emocio, kaj sur mia dorso fluis ŝvito...

Mi kvazaŭ forigis ian baron. Ĉiuj eksentis sin pli trankvilaj, ĉiuj malstreĉiĝis...

Post mi ankaŭ la aliaj geknaboj deklamis versaĵojn, rakontis fabelojn aŭ kantis kantojn. Kaj la aparato ĉiam tiel obstine kaj persiste rigardis ilin per sia vitra okulo... Tio ja estis son-izolita kinokamero. Kaj la juna, simpatia viro, kiu tiel amike interparolis kun ni, estis la reĝisoro de la estonta filmo.

* * *

Vi eĉ ne povus imagi, kiom da emocioj provokis en mia hejmo tiu ĉi mia unua vizito en la Kinocentro! Vladi starigis al mi milojn da demandoj kaj volis, ke mi ĉion rakontu al li plej detale. Panjo estis tre emociita, paĉjo nur ridetis... Ĉu li estis kontenta aŭ ĉio ĉi ŝajnis al li malserioza afero? ...

Finfine li diris:

— Mi komprenas, ke la partopreno en filmo estos interesa kaj utila por vi, donos al vi novajn konojn. La kino estas mirinda mondo, ĝi estas granda arto... Sed mi demandas min, ĉu ĉio ĉi ne efikas malfavore sur vian sukceson en la lernejo?

Verdire, mi tute ne sciis, kion respondi. Ĝis la fino de la lernojarro restis ne pli ol unu monato.

— Mi faros ĉion eblan por ne malbonigi miajn notojn! — arde mi respondis.

— Kompreneble! — aldonis panjo. — Li lernos eĉ pli diligente! Mi fidas al li.

Post tiu familia interparolo mia partopreno en la filmo estis decidita.

Sed en la lernejo ne ĉio pasis glate.

La infanoj el nia klaso kaj ankaŭ el la aliaj klasoj, kiujn oni ne aprobis partopreni en la filmo, pro envio jen primokis nin nomante nin „kinosteloj”, jen simple ne rimarkis nin. Ni respondis al ili per la samo kaj penis ne reagi. La plej malfeliĉa tamen estis Milko: liaj gepatroj ne permesis al li partopreni en la filmado. Li estis tre ĉagrenita kaj la afero ne pasis sen larmoj. Slavi kaj mi provis konvinki liajn gepatrojn konsenti, sed lia patro malĝentile diris al ni:

— Lasu lin! Mi ne permesos tion! Li prefere zorgu pri siaj lecionoj! ...

* * *

Mi ne scias, kio okazis (ĉu nia instruistino intervenis aŭ liaj gepatroj mem ŝanĝis sian decidon), sed post kelkaj tagoj, kiam oni denove invitis nin al la Kinocentro, ĉe la aŭtobusa haltejo inter ni estis ankaŭ Milko – ridetanta kaj feliĉa... Kaj kvazaŭ ni ĉiuj estis anticipe interkonsentintaj – neni demandis lin pri tio.

En la aŭtobuso ni faris tian bruegon, ke la konduktoro minacis elbusigi nin ĉe la sekva haltejo, se ni ne silentigos. Sed ĉu ni povis silenti? Ja li ne sciis, ke en lia aŭtobuso veturas la plej feliĉaj infanoj – estontaj kinoaktoroj! ...

Unu el la helpantoj de la reĝisoro atendis nin ĉe la enirejo de la Kinocentro kaj kondukis nin al la projekcissalono. Ni ne ĉesis paroli kaj niaj ekscititaj voĉoj eĥis en la koridoro. La viro haltis, severe rigardis nin kaj montris la lumsurskribojn:

S I L E N T O N !
ONI FILMAS!

En la kinosalono estis multaj nekonataj homoj. Tie estis ankaŭ la reĝisoro. Vidinte nin, li ekkriis:

– Ha, jen estas ankaŭ niaj etaj amikoj! Ni povas komenci.

Ni rapide sidiĝis kaj emociite fiksas rigardon sur la lumigita ekrano.

... Jen estas la ĉambro, en kiu oni faris la provfilmadon kaj jen estas ni! Mi aspektis tiel ridinda, ke mi eĉ hontis pri mi mem. Svetla kaj Verka ridetis duonvoĉe kaj puŝis unu la alian per la kubutoj. Sed kiam ankaŭ ili aperis sur la ekrano, ili tuj konfuzite eksilentis. Ni ĉiuj aspektis tre ridindaj. Aŭdiĝis neni sono, ni nur malfermadis niajn buŝojn kaj rigardis timeme – kvazaŭ ni estus antaŭ la nigra tabulo en nia klasĉambro kaj ne scias bone la lecionon.

La lampoj denove eklumis. Ni tuj ekscitite ekparolis. Estis tiel strange vidi nin sur la ekrano! ...

La reĝisoro turnis sin al ni kaj ekridetis:

– Nu, ĉu vi estas kontentaj? Nun mi petas vin, eliru en la koridoron kaj atendu. Post kelkaj minutoj ni priparolos nian estontan laboron.



IUJ ESTAS „LA AŬDACAJ
PLUMOJ“? DISTRIBUO DE LA ROLOJ

Sur la pordo de la ĉambro, kiun ni eniris, estis surskribo

FILMO „LA AŬDACAJ PLUMOJ”

Reĝisoro

Ni rapide eksidis sur la kanapon kaj sur la seĝojn. La reĝisoro kaj liaj kunlaborantoj okupis lokojn kontraŭ ni – apud la skribotablo.

... Nur post duonhoru ni ĉiuj interparolis kiel malnovaj bonaj konatoj. Ni jam sciis la nomojn de la reĝisoro, de liaj asistantoj, de la kameraisto, de la pentristo kaj de la direktoro de la filma skipo¹⁾ ... Krom ili kun ni laboros ankoraŭ multaj homoj, kun kiuj ni baldaŭ renkontiĝos. Ĉiu el ili havis iun difinitan taskon kaj ili devis stari je dispono de la reĝisoro, obei liajn ordonojn kaj tiujn de liaj asistantoj.

Nia konatino, kiun ni la unuan fojon vidis en la lernejo, evidentiĝis asistantino de la reĝisoro. Ŝi petis, ke ni turnu nin al ŝi ĉiam sen superfluaĵ ceremonioj, nomante ŝin simple „onklino Katja”. La knabinoj jam tiel nomis ŝin. Ŝi regalis nin ĉiujn per ĉokoladaj bombonoj.

„Bona komenco” – mi pensis kaj ekrigardis al Slavi, kiu tute senĝene prenis jam la trian bombonon. Pro la varmo kaj streĉiteco miaj okulvitroj ŝvitis kaj ĉio ŝajnis al mi kiel songo...

La reĝisoro prenis grandan, dikan libron.

– Tio estas nia scenaro. Ĝi estos por vi kiel lernolibro. En ĝi estos ĉio, kion vi devas scii pri via laboro en la filmo. Kiel vi jam scias, la titolo de nia filmo estas „La Aŭdacaj Plumoj”. La herooj estas geknaboj kiel vi. Ili loĝas en iu el la novaj loĝkvartaloj de la ĉefurbo kaj estas unu klaso. Ilia samklasano Vasko tre similas al Velizar. Ankaŭ li portas okulvitrojn kaj iuj ŝerce nomas lin „cionsciulo”...

1) Skipo – grupo da homoj, kune laborantaj en difinita nombro super unu sama tasko.

Ĉiuj ekridis kaj mi denove sentis, ke miaj vangoj ruĝiĝas.

— ... kaj la aliaj — precipe la maldiligentaj lernantoj el la klaso — nomas lin „seka animo”, ĉar li ĉiam estas serioza kaj bonkondata. Ilin kolerigas tio, ke Vasko ĉiam scias siajn lecionojn kaj kritikas ilin dum la junpioniraj kunvenoj... Jam proksimiĝas la ferioj, la plejparto de la gelernantoj forveturos al la marbordo aŭ al la montaro, sed multaj el ili restos en la urbo. En la kapon de Vasko venas tre interesa ideo. Tiom interesa, ke ĉiuj tuj komprenas, ke li tute ne estas „literkapulo” aŭ „seka animo”, sed knabo kiel ĉiuj ceteraj knaboj, li, same kiel ili, ŝatas la ludojn kaj ŝercojn. Sed pri tio plej bone rakontos al vi la aŭtoro de nia scenaro...

La reĝisoro prezentis al ni la junan blondhararan viron, kiu sidis en la angulo de la ĉambro kaj silente fumis cigaredon.

Mi devas konfesi, ke mi estis surprizita kaj eĉ sentis certan seniluziiĝon. Mi opiniis, ke la verkistoj estas grandaĝaj homoj — kiel mia patro, ekzemple. Mi kredis, ke la aŭtoro de la scenaro de nia filmo estas same grandaĝa kaj solida homo... Ĉar, kiel mi eksciis poste, la filmscenaro tre similas al novelo aŭ romano kaj plej ofte la scenarojn verkas elstaraj verkistoj...

— Al la plejparto el vi estas konata lia nomo — diris la reĝisoro. — Vi certe multfoje aŭskultis liajn versaĵojn en radioelsendoj kaj eble vi legis iujn el liaj libroj (li verkas precipe por infanoj)...

La reĝisoro diris lian nomon.

Jen nova surprizo: li estis la aŭtoro de iuj el miaj plej ŝatataj libroj! ...

— Fakte — diris la scenaristo — la historio, kiun ni prezentos en la filmo, ne estas elpenŝaĵo. Ĝi okazis en nia kvartalo, kaj kiel vi jam eksciis, ĝiaj herooj estas viaj samaĝuloj. Mi nur iom ornamis kaj kompletigis ĝin per kelkaj eventoj, kiuj same povus okazi.

Ĉio komenciĝis iun matenon, kiam sur la pordo de la viandvendejo aperis tabulo kun ege neordinara enhavo.

La literoj kaj eĉ tutaj vortoj estis eltranĉitaj el gazetoj, revuoj kaj afiŝoj.

Kompreneble, en la kvartalo ekestis granda ekscitiĝo! Tio ja estis vera sensacio! Ĉiuj parolis pri la okazintaĵo, vidis kaj demandis sin, kiuj estas tiuj ĉi „Aŭdacaj Plumoj”. Kaj la viandvendisto

KVARTALA Gazeto „TAMBURO”

Atenton, DIVITAnOJ

Ni TAMBURAS por Ke ĈluJ **LOG**antoj de kvarta**LO** aŭs**KUL**tu!:

1.) Porkaj **KOT**letoj de **UnuA** kval**ITO** mankas. La Viand**IS**TO **DONIS** ilin a**L** sia **AM**iko – al **LA** **DRIN**ke**J**mastro **LA**zo’

* * *

2.) Ĉu vi **JAM** **AC**ĕtis en **LA** Maga**AZ**eno „**GASTRONOMO**” ovojn kun **PREZ**o de 8 **ST**otinkoj
p**O** 10 **STOTINKOJ**? **Rap**idu, Ĉ**AR** oni **BAL**daŭ disven**DOS** ilin!...

* * *

3.) **SE** vi **KonstaTOS**, ke **LA** pneŭ**MAT**ikoj de **VIAJ** aŭtomob**ILOJ** pendigis **AŬ** mankas **IL**iaj post-
LUMOJ; **SE** **IA** aŭskul**TIL**oj en **LA** **TELE**fonbudoj **DEN**ove mala**PER**Is; se **MAN**kas gazetoj kaj
LETEROJ en **Viaj** **POST**kest**OJ**; se **LA** **SO**noriloj ĉe viaj **POR**DOJ den**OVE** ne **FUNK**Cias, **BonVO**
lu sin **ADRE**si al goŝo **KAJ** tonĉo en **LOGDOME**GO N-ro 3, **ENIREJO** „**B**”, II-a **ETAG**O, apart**EN**ON-
toj N-roj 14 **KAJ** 16! ...

LA „AŬDACAJ PLUMOJ”

donis plendon al la kvartala policano kaj minacis la nekonatajn kalumniantojn starigi ilin antaŭ la tribunalon tuj post kiam oni malkovros ilin.

Eble ĉio ĉi estus rigardata kiel ŝerco, se iun el la sekvaj matenoj tiu ĉi neordinara gazeto ne estus aperinta ankaŭ sur la pordo de la legomvendejo.

Evidente, tio ne estis ŝerco! ...

La kvartala policano kaj la membroj de la Kvartala Komisiono pri Socia Kontrolo same, kiel la loka organizaĵo de la Patrolanda Fronto, serioze maltrankviligis.

Venis homoj ankaŭ el la Regiona Direkcio de la Ministerio pri Internaj Aferoj. La okazintaĵo transformiĝis en socian problemon. Malgraŭ ĉio, tiu ĉi stranga gazeto plu aperadis en la plej diversaj lokoj de la kvartalo. Aperis eĉ fotoj! „La Aŭdacaj Plumoj” publikigis ege malagrablajn faktojn, kiuj ĝis tiam estis nekonataj al la loĝantoj de la kvartalo. Malkontentaj kaj maltrankvilaj, kompreneble, estis nur la akuzitaj personoj. Tiu ĉi historio tamen ne restis longan tempon sekreto. Ĝin malkovris la purigistino de iu el la loĝdomoj.

Evidentiĝis, ke nia heroo, kiun ni nomis Vasko, kaj iuj el liaj samklasanoj decidis eldoni gazeton dum la ferioj kaj malkaŝi la maldecaĵojn en la kvartalo.

Evidentiĝis ankaŭ, ke la onklo de Vasko — ĵurnalisto, donis al li la ideon eltranĉi literojn el gazetoj kaj revuoj.

Vasko efektive pruvis, ke li ŝatas la ludojn kaj ŝercojn! Kaj la ŝerco, kiu maltrankviligis la loĝantojn de la kvartalo, estis tre utila. Agrabla estis la fakto, ke la junaj loĝantoj de la kvartalo ne estas indiferentaj al la tiklaj problemoj de la ĉiutageco! Anstataŭ punon pro la kaŭzitaj maltrankviloj, la junaj ĵurnalistoj ricevis agrablan rekompenson: ili pasigis kune neforgeseblajn feriojn en la Internacia Junpionira Kampadejo ĉe la marbordo...

Ni ĉiuj silentiĝis, ravite de la rakonto de la scenaristo. Ĉio estis tiel interesa, ke mi vidis ĝin kiel sur filmbendo.

— Vidu, kia historio! — ekkriis Slavi. — Kiel ruze ili ĝin elpensis! ...

— Pri tio, kion mi ĵus rakontis al vi, mi verkis mallongan novelon. Kune kun la reĝisoro k-do

Rankov ni adaptis ĝin al filmado kaj verkis scenaron, kiun li montris al vi antaŭ nelonge. Ĝin ricevos ĉiu el vi. Hejme vi trankvile tralegu ĝin. Kiel k-do Rankov diris, ĝi estos via lernolibro dum la filmado. Pri ĉio, kion vi ne povas kompreni, petu klarigon.

Kiam la scenaristo finis paroli, la reĝisoro distribuis la rolojn. Tio kaŭzis novajn emociojn. Mi devis plenumi la rolon de Vasko, Slavi devis esti la fotoraportisto Emil kaj Toŝko — knabo el la najbara klaso — la pentristo Niki. Svetla, Verka, Milko kaj la ceteraj geknaboj devis plenumi la rolojn de raportistoj kaj iujn aliajn rolojn, pri kiuj mi rakontos poste.

Ni ĉiuj jam havis novajn nomojn.


En la filmo Milko estos nomata Danĉo. Li faris malkontentan mienon:


— Al mi pli plaĉas mia propra nomo! ...

La reĝisoro ekridis:

— Nu, bone! Se al vi tiel plaĉas via propra nomo — ni ne ŝanĝos ĝin! ...

Inter ni dirite, ankaŭ mi preferus alian nomon por mia heroo, sed mi silentis — ja la nomo estas provizora — nur por la filmo!





ELKAJ VORTOJ PRI TIUJ,
KIUJ KREAS LA FILMOJN

Nun permesu al mi interrompi la rakonton de Velizar por diri al vi kelkajn vortojn pri tiuj, kiuj kreas la filmojn.

Fari belartan ludfilmon estas malsimpla kaj malfacila laboro, kiun partoprenas multaj homoj de diversaj specialecoj. Ĝi povas esti sukcese plenumita, se ĉiuj partoprenantoj ĝuste scias, kion ili devas fari dum la filmaĵo.



Pri la kompleta organizado de la filmproduktado zorgas la direktoro kaj la vicedirektoro de la filma skipo. Sur iliaj ŝultroj kuŝas la tuta respondeco pri la organizado de la laboro. Preskaŭ ne ekzistas filmo, kreita sen la partopreno de la direktoro de la filmskipo, kvankam malmultaj scias pri lia ekzisto. Nun mi provos konigi al vi la laboron-kaj la taskojn de iuj el la membroj de la filmskipo.


LA SCENARISTO

verkas la scenaron de la estonta filmo. Kutime la scenaristoj estas filmistoj, verkistoj, ĵurnalistoj. En apartaj kazoj scenarojn verkas ankaŭ homoj de aliaj profesioj: kuracistoj, inĝenieroj, instruistoj.

La scenaro estas la bazo de ĉiu filmo. Ĝi estas specifa belarta literaturaĵo. En la scenaro estas detale priskribitaj la eventoj kaj la lokoj, kie ili okazas, estas priskribitaj ankaŭ la roluloj, iliaj karakterizaj trajtoj, iliaj interparoloj.

Ofte la scenaristo kaj la reĝisoro kune verkas la tiel nomatan „reĝisoran scenaron” — „laborlibron”, laŭ kiu oni faras la filmon.






LA REĜISORO

estas la ĝenerala arta gvidanto de la filmskipo. Li havas du ĉefajn taskojn: ellabori (ofte kun la scenaristo, kame-risto, pentristo kaj aliaj kunlaborantoj) la „reĝisoran scenaron”; elekti konvenajn aktorojn kaj prepari ilin por la filmado.


Estas malfacile nombri ĉiujn taskojn de la reĝisoro. Sufiĉas diri, ke li estas la ununura membro de la filmskipo, kiu laboras senĉese de la komenco de la filmado ĝis la filmpreparo de la filmo kaj ĝia prezentado en la kinejoj.



LA DUA REĜISORO

estas la plej bona helpanto de la reĝisoro, lia „dekstra mano”. Kune kun li laboras ankaŭ la asistantoj de la reĝisoro. Ili havas difinitajn taskojn: unu el ili respondecas pri la aktoroj kaj pri ĉio ligita kun ilia laboro; la alia preparas la lokojn, kie realiĝos la filmado; la tria zorgas pri la ĝustatempa havigo de kostumoj, mebloj kaj ĉiuj objektoj necesaj por la filmado ktp.

Iuj plenrajte nomas la asistantojn „manoj kaj piedoj” de la filmskipo.



LA ĈEFA KAMERAISTO

kaj liaj helpantoj filmas pere de speciala filmaparato nomita kamerao.

Ankaŭ la ĉefa kameraisto havas sian stabon, kiun konsistigas asistantoj-kameraistoj, teknikistoj (ili respondecas pri la bona stato de la kamerao, pri la grudolio, puŝcaretoj kaj pri aliaj rimedoj por transportado de la kamerao) kaj fine — la brigado de la lumigistoj ĉekape kun la brigadestro.

La laboro de la lumigistoj estas tre grava. Tute ne estas facile aranĝi la lumigon de iu filmota sceno. Tiu laboro estas temporaba: la lumĵetiloj de diversaj grandecoj kaj lumforto devas esti rapide fiksitaj en la plej konvenaj lokoj. Foje estas necese preskaŭ duontaga preparlaboro por fiksi ĝustaloke la lumĵetilojn kaj por strikte plenumi ĉiujn postulojn de la ĉefkameraisto.


Finfine la laboro de la filmskipo finigas, la filmo estas preta kaj venas la vico de la spektantoj juĝi pri ĝiaj kvalitoj.

LA PENTRISTO

de la filmo pentras la projektojn por dekoracioj kaj kostumoj kaj foje tip-skizojn² de la herooj.

Por prezenti kiel eble plej ĝuste la epokon, la lokon kaj la cirkonstancojn, en kiuj agas la herooj, la pentristo devas trovi kaj pristudi multajn fotojn, pentraĵojn kaj aliajn materialojn. Tiu ĉi laboro estas tre grava, de ĝi grandparte dependas la sukceso de la filmo, tial la pentristo ne ŝparas fotojn kaj tempon, plenumi sian taskon.

2) Tipiskizoj – karakterizantaj la eksterajn trajtojn de iu heroo. (Noto de la aŭtoro: ĉiuj specialaj filmterminoj estas klarigitaj en la „Mallonga filmvortaro” fine de la libro.)



LA KOMPONISTO

kreas la muzikon por la filmo. La komponisto kaj la reĝisoro difinas, en kiuj scenoj devas esti muziko kaj kia devas esti ĝia karaktero.


En la nuntempaj filmoj la muziko ludas tre gravan rolon — ĝi ilustras la intrigon, sed helpas ankaŭ al la spektantoj pli bone kompreni la filmverkon.


La muzikon en la filmoj plenumas laŭkonsiste malsamaj muzikensembloj: de la grandaj simfonijaj orkestroj ĝis la ĉambraj ĝazaj ensembloj, kaj en iuj momentoj la muzikon plenumas nur unu sola instrumento. Oni surbendigas la muzikon en speciala halo por surbendigo.

LA SON-INGENIERO

kaj ankaŭ liaj helpantoj estas membroj de la filmskipo. Ili surbendigas la parolon, la muzikon, la sonojn kaj la bruojn en la filmo. Kutime la son-ingeniero troviĝas sur la filmadplaceto. Per aŭskultiloj li kontrolas la filmadon de iu sceno kaj sur speciala sonkameraa tablo reguligas la forton de la sono. La surbendigon mem oni realigas per speciala surbendigaparataro. Tiun ĉi laboron plenumas la son-teknikistoj, kiuj troviĝas malproksime de la filmadplaceto.

La son-ingenieroj disponas pri speciala fonoteko, kie oni konservas sonbendojn kun surbendigitaj muziko, diversaj sonoj kaj bruoj. Oni utiligas ilin en kazoj, kiam la kondiĉoj, ĉe kiuj oni filmas, ne estas favoraj por surbendigo.






* * *

Pri la laboro de la specialistoj de ŝminkado, kaj pri tiu de la muntistoj, vestgardistoj, dekoraciistoj, piroteknikistoj kaj vico da aliaj specialistoj, per kies helpo oni kreas belartajn ludfilmojn, iom poste rakontos al vi mia juna amiko Velizar.

En la filmproduktado ĉiu detalaĵo estas grava. Tial la laboro de ĉiu membro de la filmskipo — de la reĝisoro ĝis la plej ordinara plenumanto — estas grava kaj respondeca.





ECIONO PRI HISTORIO...
DE LA KINO


LA ANTAŬULOJ DE LA KINEMATOGRAFIO

Iun tagon Velizar solene deklaris:

– Hodiaŭ rakontos vi! Ja vi promesis rakonti al mi pri la historio de la kino! ...

Mi stariĝis kaj prenis libron el la biblioteko.

– Vidu tiujn ĉi pentraĵojn. Ili prezentas egiptajn templojn, konstruitajn antaŭ pli ol trimil jaroj. Sur iliaj kolonoj estas pentritaj homaj figuroj. Ĉu vi rimarkas, ke iuj el ili estas starantaj kaj la aliaj – iom kliniĝintaj? Tio ne estas hazarda. Kiam la faraono – ilia reganto – galopis per sia ĉaro preter tiuj kolonoj, al li ŝajnis, ke la pentritaj figuroj kliniĝas antaŭ li... Tion elpensis




„HOREJTOSKOPO” – UNU EL LA „PRAAVOJ” DE LA KINEMATOGRAFIO

la pastroj de la temploj por plaĉi al la faraono. De tiuj ĉi pentraĵoj komenciĝas la historio de la kinematografio...


— Ĉu antaŭ tiom longa tempo? — ekkriis Velizar.

— Jes. Multajn jarojn poste la antikvaj ĉinoj elpensis la teatron de la ombroj (de homoj kaj bestoj, kiuj moviĝis kiel siluetoj malantaŭ lumigita tolaĵo). „Ĉinaj ombroj” — tiel estis nomita tiu ĉi prezentado...


Poste — jam fine de la 19-a jarcento — estis inventitaj la plej diversaj aparatoj, per kiuj oni prezentis desegnitajn filmojn kaj estis faritaj provoj pri projekciado de moviĝantaj fotoj. Nun tiuj ĉi aparatoj ŝajnas al ni malnovmodaj kaj ridindaj, sed tiutempe ĉiu el ili estis vera sensacio.




Jen vidu ilin sur tiuj ĉi desegnaĵoj. Ili havas strangajn nomojn: „FENAKISTISKOPO”, inventita de la belga fizikisto Joseph Plateau (1801–1883), „ZOOTROPO” de William Horner (1786–1837), „ZOOPRAKSOGRAFO” de la angla fotisto Edward Muybridge (1830–1904), nomita „unua klasikulo de seriaj fotografiaĵoj”, „FOTOGRAFA PAFILO”, „ĤRONOFOTOGRAFO” de la franca fiziologo Jules Etienne Marey (1830–1904), „KINETOSKOPO” de la fama usona inventisto Thomas Alva Edison (1849–1931).




GALOPANTA RAJDANTO FILMITA EN DIVERSAJ SINSEKVAJ MOMENTOJ PERE DE „ZOOPRAKSOGRAFO” DE EDWARD MUYBRIDGE (1830–1904)







DISKO DE LA „FENAKISTISKOPO” DE JOSEPH PLATEAU (1801–1883)




„FOTOGRAFA PAFILO” DE JULES ETIENNE MAREY (1830–1904)
BIRDFLUGO EN DIVERSAJ MOMENTOJ FILMITA PERE DE „FOTOGRAFA PAFILO”
DE JULES MAREY



„KINETOSKOPO” DE THOMAS ALVA EDISON (1849–1931)

3.



54 Tiuj estas nur iuj el la antaŭuloj de la kinematografo, inventita de fratoj AUGUSTE kaj LOUIS LUMIÈRE — francoj laŭ nacieco.

La 28-an de decembro 1895 en la salono de „Grand Café” la unuan fojon en Parizo estis projekciitaj antaŭ publiko la unuaj filmoj de fratoj Lumière: „Eliro de laboristoj el la uzino” („La sortie des usines”), „La detruo de muro” („La démolition d’un mur”), „La priverŝita akvumanto” (L’arroseur arrosé), „La matenmanĝo de la bebo” („Le déjeuner de bébé”), „Alveno de l’ trajno” („L’arriver d’un train”).

Tiun ĉi tagon oni rigardas la naskiĝdato de la kino.

La filmarto estas la plej juna el ĉiuj artoj, sed ĝi havas la plej multajn amikojn de ĉiuj aĝoj en la tuta mondo. Hodiaŭ certe ne ekzistas homo, kiu almenaŭ foje ne spektis filmon.

— En nia domo loĝas iu maljunulo — avo Toma — interrompis min Velizar. — Li jam estas tre maljuna, pli ol okdekjara. Foje li rakontis al mi, ke li sepjara, kune kun sia patro, spektis la unuan filmon projekciitan en nia lando. Li diras, ke tiutempe ne estis tiaj belaj kaj komfortaj kinejoj kiel nun. La filmojn oni projekciis en ligna barako — kiel en ĉirko, la projekciaparato tiel forte bruegis kaj fumis, ke la spektantoj foriris kun ruĝiĝintaj okuloj kaj lacaj pro la bruoj.

— Jes, vere tiel estis — mi asertis. — Tiun ĉi kinejon oni nomis „Grand Bioskop” kaj tiutempe ĝi estiĝis grava evento en la vivo de la ĉefurbanoj. La homoj iris tien kiel al festo.

En tiuj jaroj ĉiuj filmoj estis „mutaj” kaj senŝonaj. La geaktoroj nur mansvingis kaj faris ridindajn grimacojn. De tempo al tempo sur la ekrano aperadis surskriboj, klarigantaj la pli gravajn momentojn de la intrigo. Tiuj ĉi filmoj estis longaj ne pli ol dek-dekkvin minutojn kaj estis precipe komikaj. La geaktoroj senĉese persekutis unu la alian, disdonis vangofrapojn, sin batis per tortoj, rompis amasojn da teleroj, la domtegumentoj ruiniĝante falis sur iliajn kapojn.

La filmprojekciojn oni sonigis laŭ la plej ordinara maniero. Antaŭ la ekrano ludis pianisto aŭ malgranda orkestro, kiu plenumis fragmentojn el diversaj muzikverkoj por ilustru la karakteron de la intrigo aŭ la humoron de la aktoroj.



UNU EL LA UNUAJ KINEJOJ – „GRAND BIOSKOP”

LA DUA NASKIĜO DE LA KINO


Dum pluraj jaroj la kino – la Deko Muzo – estis „muta”.

Post multaj kaj variaj eksperimentoj de miloj da specialistoj – elektroingĝenieroj, teknikistoj,

muzikistoj, fizikistoj k.a., finfine en la komenco de la tridekaj jaroj ĝi „ekparolis”: aperis la unuaj „parolantaj” filmoj.

Tio estis vera revolucio — tiaspeca „dua naskiĝo” de la kino, kiu eniris novan etapon de sia evoluo.

La filmtekniko senĉese evoluis kaj perfektigis. De la primitiva projekciatoro de fratoj Lumière ĝis nun la kinematografo trairis multajn ŝanĝojn. Estis inventita la tiel nomita panorama kino kun ĝiaj variaĵoj: larĝa ekrano, Cineramo, Cirkoramo, Laterna Magika, Cinemiraklo k.a. Iliaj projekciekranoj estas kelkoble pli grandaj ol la ordinaraĵ kaj havas la plej diversajn formojn.



„POLIEKRANO” (1959)

Estas inventitaj ankaŭ aparatoj, per kiuj oni povas fari pli ol milionon da filmbildoj ĉiusekunde. Tio permesas observi eĉ la flugon de elpafita kuglo! ...

Krom la ĝis nun konataj formatoj de 8, 16 kaj 35 milimetraj filmbendoj, nun oni filmas ankaŭ sur larĝformatajn 70-milimetrajn bendojn, kiuj pliiĝas la bildig- kaj spektoblecojn de la kino.

LA STEREOSKOPA RELIEFA filmo havas tri dimensiojn: la bildoj sur la ekrano posedas ne nur larĝon kaj alton, sed ankaŭ profundon.

Al tiuj ĉi novaĵoj en la kinotekniko oni devas aldoni ankaŭ la tiel nomatan STEREOFONIAN FILMON. La spektantoj akceptas la sonon ne nur rekte de la ekrano, sed ankaŭ per laŭtparoliloj muntitaj en diversaj lokoj en la salono. Tio kreas impreson pri la realeco.

Dum la lastaj kelkaj jaroj la „VIDEO-KASETA FILMO”, unu el la plej novaj inventoj de la kinotekniko, atingis grandan disvastiĝon en la tuta mondo. Samtempe kun la televido ĝi estis komenco de la tiel nomata „hejma kino”.

Oni filmas „VIDEO-KASETAJN FILMOJN” per specialaj kameraoj surbaze de teknikaj principoj de fiksado de bildoj kaj sonoj sur magnetan bendon.

La projekciado de VIDEO-KASETAJ FILMOJ realiĝas pere de speciala video-magnetofona aparato, kluĉita al la televidilo aŭ speciala ekrano.

Tio ebligas la projekciadon de ĉiuspecaj video-kasetaj filmoj kaj la establon de publikaj videoklubo kaj hejmaj filmotekoj.

FAVORATOJ DE LA INFANOJ

— Ĉu tiutempe estis etaj filmaktoroj? — demandis Velizar, kiu tre atente aŭskultis min.

— Kompreneble! La usonaj infanoj-aktoroj Jackie Kugan kaj Shirley Temple ĝuis grandan sukceson tra la tuta mondo. Jackie Kugan akiris popularecon per la filmo „THE KID” („La bubo”), en kiu li ludis kune kun la mondfama kinoaktoro Charly Chaplin. Shirley Temple

gajnis la simpatie de la infana publiko per siaj dancoj kaj kantoj. Favoratoj de la infanoj estis ankaŭ la aktoroj-komikuloj Pat kaj Pataŝon el Danlando (en Bulgario oni nomis ilin Longkrurulo kaj Mallongulo), la fratoj Max, Lawrell kaj Hardy, Harrold Lloyd, Buster Keaton el Usono kaj multaj aliaj aktoroj de diversaj naciecoj.

Sur la ekranoj en Bulgario aperis ankaŭ aliaj infanoj-kinoaktoroj el diversaj landoj, kiuj ravis la junajn spektantojn kaj gajnis milojn da admirantoj...

— Kaj kie ili estas nun? — demandis min mia juna amiko.

— Ili jam kreskis grandaj. Iuj el ili havas familion, infanon... La plejparto el ili ne plu ludas en filmoj kaj havas alian profesion... Kiel vi komprenas, la kino, kiu iam kompletigis la repertuaron de foiraj distroj, nun estas transformiĝinta en arton, alirebla por milionoj da homoj en la tuta mondo.

En Bulgario, ekzemple, la kinematografio aperis nur kelkajn jarojn post ĝia invento kaj en 1916 estis kreita la unua bulgara ludfilmo — la kinokomedio „BÂLGARAN E GALANT” („Bâlgaran estas galanta”). Ĝia kreanto estas Vasil Gendov — unu el la pioniroj de la bulgara filmarto. La filmo estis „muta” kaj preskaŭ ne distingiĝis disde la eksterlandaj filmkomedioj projekciataj tiutempe en Bulgario. Sed ĝi estis bulgara filmo, kreita de bulgaroj kaj en ĝi ludis bulgaraj aktoroj! ... Tiutempe la filmo ĝuis grandegan sukceson ĉe la bulgara publiko.

La ekzemplon de Vasil Gendov sekvis ankaŭ aliaj pioniroj de la bulgara filmarto, sed ili ne havis monrimedojn por daŭrigi sian kreon laboron en tiu nova kaj multekosta arto. Ilin ne subtenis mecenatoj kaj pro financaj malfacilaĵoj ili ĉesis fari filmojn.

Hodiaŭ la filmkreantoj en Bulgario jam havas sian filmurbeton — la Kinocentron. Ĝi disponigas bonegajn kondiĉojn por fruktodona kreolaboro. La pioniroj de la bulgara kinoarto eĉ revu ne povis pri tio! ...

Baldaŭ ankaŭ vi mem konatiĝos kun la „mirakloj” de la Kinocentro.



A SCENARIO —
TIU MIRINDA LIBRO!...

La filma scenaro estis unu el la „mirakloj”, kun kiu mi unue konatiĝis.

Ĉiu el ni ricevis grandan libron – tiun saman, kiun la reĝisoro montris al ni dum nia unua renkontiĝo.

Reveninte hejmen mi tuj komencis foliumi ĝin. Mi devas konfesi, ke ĝis nun mi ne estis vidinta tiel interesan libron! Oni nomas ĝin „REGISORA SCENARIO” aŭ „LABORLIBRO”. Laŭ ĝi oni faras la tutan filmon. En ĝi estas strangaj kaj tute nekonataj vortoj, do oni facile povas konfuziĝi.

Ĉi-tie vi vidos kelkajn paĝojn el tiu ĉi mirinda libro.

Mi estas certa, ke por vi estos malfacile kompreni tion, kio estas skribita sur tiuj paĝoj el la scenaro. Kiam mi unuafoje komencis ĝin legi, ankaŭ mi preskaŭ nenion komprenis. Sed iom post iom mi alkiutimiĝis legi la filmscenaron.

Kiel vi vidas, sur tiuj paĝoj de nia scenaro estas presita fragmento de la 8-a sceno de la filmo titolita „EN LA SUBTEGMENTO ĈE VASKO”. Mi devis tralegi tion, kio estas skribita en la kolono „priskribo de la kadro”, por ke mi sciu, kie okazas la ago kaj kion mi devas fari. Kaj mi devis parkerigi la parolojn de mia heroo Vasko, skribitajn en la kolono „dialogo”.

Tiujn ĉi vortojn mi devis prononci, kiam oni min filmos.

La literoj ĜP kaj PP signifas „ĝenerala plano” kaj „proksima plano”. Ili indikas al la kameraisto kaj al liaj helpantoj, kian parton de la ĉirkaŭaĵo aŭ de ni mem ili devas filmi.

Ekzemple:

La ĝenerala (fora) plano ampleksas homojn aŭ objektojn filmitan kune kun la ilin ĉirkaŭanta medio aŭ naturo.

La „meza plano” (MP) ampleksas personon (aŭ grupon da personoj) ĝisgenue sen konsidero pri la dekoracio. Tiun planon la filmistoj nomas ankaŭ „Amerika”.

La „proksima plano” (PP) indikas, ke la vizaĝo de la aktoro, aŭ parto de lia korpo (aŭ de iu objekto) devas esti filmita de tre proksime.

La „ekstra plano” („detalo”) – EP, indikas, ke parto de la estaĵo (homo, besto, birdo) aŭ parto de iu objekto devas esti filmita de tre proksime.

La ciferoj 49, 50, 51, 52, 53... montras kiu momento (aŭ „kadro”, kiel nomas ĝin la filmistoj en sia praktiko) estas filmata. Kaj la ciferoj 21, 50, 2, 6, 12, 1 ktp. skribitaj en la kolono „longeco”, indikas kiom longa devas esti ĉiu kadro en la filmo.

Unu ordinara ludfilmo havas 200-300 kadrojn. Sed en iuj filmoj ekzistas 500-600 kaj eĉ pli da ili!

En la kolono „muziko, bruoj” oni notas ĉiujn sonefektojn; kiuj devas esti en ĉiu aparta momento.

Tio povas esti bruoj de fluanta akvo, kanto, aŭtomobila signalilo, preterpasanta trajno kaj ceteraj plej malsamaj sonoj kaj bruoj.

La vortoj „mallumigo” (ML) kaj „lumigo” (L) kutime indikas la lokon, kie iu sceno finiĝas kaj komenciĝas alia sceno de la filmo. Eble vi rimarkis, ke simila efekto estas realigata per iom-postioma mallumigo de la kadro sur la ekrano ĝis plena mallumo kaj poste ĝi denove iom post iom lumiĝas kaj aperas kadroj el la nova sceno.

Mi ne estas certa, ĉu mi sukcesis klarigi al vi ĉion, kion mi legis en tiu, je unua rigardo tre komplikita libro, sed sincere dirite, mi eĉ ne strebis lerni ĉion skribitan en ĝi, ĉar tio ne estis necesa.

Ĉiuj ĉi iom strangaj notoj kaj vortoj koncernis precipe la reĝisoron, kameraiston, son-inĝenieron, la muntistojn kaj la iliajn helpantojn.


Mi kaj miaj amikoj devis bone ellerni la dialogojn, kiujn ni devis prononci dum la filmado.

8-a SCENO: „EN LA SUBTEGMENTO ĈE VASKO” – 60 metrojn

Partoprenas: Vasko, Emil, Milko, Lili, Ico – „La Fantaziulo”, Roza, Niki.

Kadro	Plano	Metroj	Priskriboj de la kadro	Dialogo	Muziko, bruoj
49	ĜP-MP-PP	21,5	En la vasta subtegmento inter malnovaj mebloj, korboj, libroj, fruktostestetoj kaj ŝnuroj por sterno de tolaĵo kelkaj geknaboj-samklasanoj de Vasko estas kolektiĝintaj kapo-ĉe kapo. La kamerao sin direktas al ili kaj haltas antaŭ la vizaĝo de Vasko, kies okuloj brilas malantaŭ la okulvitroj.	VASKO: Delonge mi malŝatas tiun ĉi friponon! Ni donos al li tian lecionon, ke alifoj li eĉ ne pensos ŝteli! Ni eldonados kvartalan gazeton „Tamburo”. Ni forte tamburos por ekstimigi ĉiujn, kiuj faras fiaĵojn.	Malproksima bruo de trapasanta tramo. Aŭdiĝas muziko de radio. Bruparolo de infanoj ludantaj surstrate.
50	MP-PP	2	La vizaĝo de Ico „La Fantaziulo”.	ICO: Kion vi deziras? Ideo – fantaziaĵo! Ĉu ne? ! Sed kiamaniere ni ĝin presos, Vasko?	La samaj son-efektoj – kiel en kadroj 49 kaj 50
51	PP	6	La vizaĝoj de ĉiuj esprimas streĉitecon. Ili atendas, kion respondos Vasko.		
52	PP-EP	12	La kamerao haltas sur la vizaĝo de Vasko de tre proksime.	VASKO: Mia onklo estas ĵurnalisto kaj li donis al mi bonan ideon...	
ML L	MALLUMIGO LUMIGO				







A MAGIO DE LA ŠMINKADO


Ni denove estis survoje al la Kinocentro.

Kaj ni ĉiuj estis terure dormemaj — k-do Ĉrnev, unu el la asistantoj de la reĝisoro, venis frumatene per la mikrobuso por veturigi nin.

La mikrobuso preskaŭ flugis tra la senbrujaj stratoj. Nur tie kaj tie ĉi ni renkontis maloftajn piedirantojn.

Dum la veturado ni ĉiuj dormetis. Nur Slavi energie manĝis sian sandviĉon.

La labortago en la Kinocentro ankoraŭ ne estis komenciĝinta kaj niaj paŝoj eĥis laŭ la senhomaj koridoroj.



MOMENTO DE LA LABORO DE LA ŜMINKISTO

Tamen en la kancelario de la filmadministrado oni jam atendis nin. Ĉi tie estis onjo Katja kaj ankoraŭ kelkaj viroj kaj virinoj, kiuj ĥore respondis al nia malvigla saluto.

— Nu, vekiĝu jam kaj ni iru al la ŝminkejo. Hodiaŭ ni provludos en la filmadpavilono.

La ŝminkejo estis granda ĉambro kun multaj speguloj sur unu el la muroj, kun tabloj kaj seĝoj antaŭ ĉiu spegulo — same kiel en barbirejo.

Ni sidiĝis sur la seĝoj kaj la ŝminkistoj ekokupiĝis pri ni. Post unu horo niaj haroj estis frizitaj kaj niaj ŝminkitaj vizaĝoj estis kupre ruĝaj kiel tiuj de la indianoj.

Oni alportis ankaŭ la speciale por ni kudritajn vestojn, kiajn la infanoj kutime portas somere.

Ni rigardis nin iom konfuzite en la speguloj kaj stulte ridetis al niaj preskaŭ nereconeblaj fizionomioj. Neniu kuraĝis primoki la aliajn, ĉar ni ĉiuj estis ŝminkitaj kaj ridindaj.

Nur Slavi ne eltenis. Vidinte min, li ekridegis:

— Ha, ha... Oni vin tre bone kolorigis! Vi similas al ruĝa brasiko! ...

Efektive, oni kolorigis miajn harojn ruĝaj kaj sur mia vizaĝo estis pentritaj multaj lentugoj — tiel estis necese por la filmado.

Mi ege koleriĝis kaj volus frapi lian ridetantan fizionomon, sed mi nur grumblis:

— Vi pli taŭgas por la cirko ol por la filmo! ...

Evidente miaj vortoj lin ofendis kaj li ĉesis mokridi.

— Ne ofendu tiel unu la alian! — enmiksiĝis onjo Katja. — La ŝminkado estas necesa! Sen ŝminko viaj vizaĝoj aspektus tre palaj sur ka ekrano...

* * *

Dum Velizar kaj liaj amikoj jam marŝas al la filmadpavilono, ni revenu por certa tempo en la ŝminkejon.


Iuj demandus: kial do estas necese, ke oni kolorigu ruĝa la hararon de Velizar kaj ŝminku la vizaĝojn de la etaj aktoroj?

La ŝminko kontribuas klarigi la karakteron de la filmherooj. Estas vera arto fari bonan kaj konvenan ŝminkon, tial tiu ĉi laboron plenumas pentristoj-specialistoj pri ŝminkado.

La pentristo-ŝminkisto disponas pri la plej diversaj koloraj ŝminkoj, perukoj, barboj, lipharoj, pri diversformaj nazoj kaj multaj aliaj materialoj kaj kemiaĵoj. Dank' al ili, la ŝminkisto povas fari nerekoneblaj la vizaĝojn de la aktoroj.

La ŝminkisto tre faciligas la laboron de la reĝisoro. Li helpas atingi maksimuman portretan similecon kun la heroo priskribita en la scenaro.

Tial hodiaŭ ni eĉ ne povas imagi la produktadon de ludfilmoj sen la partopreno de la ŝminkistoj. Sed ni permesu al Velizar daŭrigi sian rakonton.





N LA PAVILONO DE FILMADO

Antaŭ ni malfermiĝis grandega pordo.

Min alblovisodoro de neventolita ejo, polvo, ĝelatengluo kaj farboj.

Ni estis en la filmadpavilono.

Grandega, malvarma kaj malhela ejo. Io simila al la gimnastika salono en nia lernejo, sed dek aŭ dudekoble pli granda!...

— Ĉi tie oni povas bicikli aŭ eĉ rajdi sur ĉevalo... — flustris Milko.

— Vere grandega halo! — ankaŭ mi flustre respondis, mirigite pri la dimensioj de la pavilono.

Dum la filmskipo ankoraŭ ne estis enirinta ĝin, la pavilono faris preman impreson. Ie supre, sub la alta tegmento, lumetis polvokovritaj lampetoj. Ombroj kruciĝis ĉiudirekte. Estis senbrue kaj mistere.

— Lumigu la lampojn! — ekkriis preskaŭ unuvoĉe la asistanta reĝisoro Ĉernev kaj onjo Katja. — Kial ne estas lumo?

— Tuj estos — diris iu voĉo el la duonkrepusko.

Post momento eklumis dekoj da malgrandaj kaj grandaj lumĵetiloj kaj en la pavilono estiĝis lumplene kiel en la plej hela tago.


De la plafono, subtenata de ŝtalaj ŝnuregoj, pendis longaj placetoj, similaj al la balkonoj kun parapetoj, kiuj rondiris la tutan pavilonon. Kaj sur la pendantaj placetoj estis instalitaj multaj lumĵetiloj.

— He, rigardu! Ĉi tie oni estas transportinta tutan vagonon! — ekkriis Venceslav. — Vera miraklo! Fantaziaĵo! ...

Kaj vere en unu rando de la pavilono estis konstruita modelo de vagono. Unu el la eksteraj muroj mankis kaj oni povis eniri rekte en la kupeojn. Iom flanke estis konstruita dometo — kun kortbarilo kaj ĝardeneto kun arboj.

Ĉirkaŭirinte la dometon ni konstatis, ke ĝi estas nur fasado, konstruita el krucoplakaĵo apogata de grandaj palisoj.

Kaj la vagono, kaj la dometo estis dekoracioj.



INTERNO DE IU FILMA PAVILONO (GENERALA VIDAJO)



EN LA FILMA PAVILONO – DEKORACIO POR SCENO FILMOTA

En la pavilono estis konstruitaj ankaŭ kelkaj aliaj dekoracioj: kelkĉambra loĝejo kun la tuta meblaro; strato kun malnovaj dometoj kaj gaslanternoj; parto de dolĉaĵejo... En la alia rando de la pavilono troviĝis granda blanka ekranaro, antaŭ kiu estis konstruita aŭtokupeo – sen radoj kaj sen malantaŭa muro, muntita sur balanciĝanta placeto.

Poste mi eksciis, ke ĉio ĉi estis konstruita en speciala laborejo por dekoracioj. Tio estas granda kolekto el arkitektoj, pentristoj, skulptistoj, teknikistoj, ĉarpentistoj, meblistoj, modelistoj...

Sed eĉ tiu ĉi kolekto ne povus konstrui la dekoraciojn por ĉiu aparta filmo, se en la tenejo ne estis amasigitaj multaj diversspecaj konstruelementoj. El tiuj pretaj konstrumaterialoj – samkiel en la infanludo „Juna konstruisto” – la laboristoj rapide konstruas diversajn dekoraciojn – laŭ la projektoj de la reĝisoro kaj pentristo.

– Jen estas ankaŭ nia dekoracio – diris onjo Katja, montrante al ni grandegan kubon el lignoplataĵoj, sur kiu estis instalitaj lumĵetiloj.

La dekoracio prezentis subtegmenton – tre similan al la priskribita en nia scenaro. Ĝi estis tiel majstre farita, ke per nenio diferencis disde vera subtegmento.

Onjo Katja ĵetis rigardon sur sian brakhorloĝon.

– Estas la oka horo. Venos tre baldaŭ ankaŭ la aliaj. Ni devas jam komenci.

Ŝi ankoraŭ ne estis findirinta, kiam en la dekoracion eniris la asistant-kameraisto kaj la teknikisto, kiuj trenis post si sur ĉareto la kameraon.

Malantaŭ la dekoracio aŭdiĝis voĉo ordonanta, kiuj pliaj lumĵetiloj estu enŝaltitaj kaj kiuj el la jam lumigitaj estu transpetitaj „iom maldekstren” aŭ „iom pli supren”... Tiu voĉo apartenis al la ĉefkameraisto, kiu kontrolis la lumigon de la dekoracio, en kiu oni faros iujn el la unuaj bildoj de nia filmo.

Iom post iom novaj personoj venis en la dekoracion kaj baldaŭ ĝi jam estis plenplena. La lumoj en la pavilono estis intensa kaj mi povis malkovri ĉiam pli novajn detalojn.

La tuta filmskipo jam estis surloke, oni atendis nur la reĝisoron por komenci la prokludon.



“

STU PRETAJ POR PROVLUDO!...”

Mi jam rakontis al vi pri nia unua renkontiĝo kun la reĝisoro dum la provfilmadeo.

Se vi demandus iun ajn el la kunlaborantoj de la reĝisoro, oni certe respondus al vi, ke li estas altstatura, mezaĝa, ke li portas malhelajn okulvitrojn kaj lia voĉo estas sonorplena. Eble iu aldonos, ke li ĉiam rilatas al ni ĝentile kaj atente. Dum niaj oftaj renkontiĝoj ni al kutimiĝis al li kaj al liaj helpantoj kaj kun iuj el ili ni eĉ amikiĝis. La plej intimaj, kompreneble, estis niaj rilatoj kun onjo Katja kaj kun kamarado Ĉerneŭ, kiuj respondecis pri ni kaj pri nia laboro.

Nun la reĝisoro estis tie ĉi – kune kun ĉiuj, kiuj devis partopreni en la hodiaŭa provludo kaj en la filmado. Li estis afable ridetanta. Lia konduto trankviligis kaj vigligis nin. Ni sentis, ke malantaŭ la malhelaj okulvitroj nin rigardis la okuloj de bona amiko. Malgraŭ ke ĉiuj el ni bone sciis lian nomon, ni ĉiuj lin nomis „la reĝisoro”. Ni jam tiel estis al kutimiĝintaj...

La reĝisoro manpremis iujn el la ĉeestantoj, poste li informiĝis pri la jam faritaj preparlaboroj por la filmado. Proksimiĝinte al ni, li amike frapetis Slavi je la ŝultro kaj ekrigardis nin ridetante:

– Nu, kiel vi fartas? Ĉu vi estas bonhumoraj aŭ vi ankoraŭ dormemas? Nu, mi vidu vin de pli proksime... Katja, la hararo de Velizar devas esti iom pli hela. Petu la ŝminkistinon, ke ŝi pudru ĝin per hela pudro! – Kaj poste li ekiris kontroli la dekoracion.

Dum unu el la ŝminkistinoj okupiĝis pri miaj haroj, mi aŭskultis la voĉon de la reĝisoro ordonanta al siaj helpantoj: „Translokigu apud la muron la korbegon kun malnovaj libroj. La seĝon metu jen tien ĉi. Ankoraŭ iomete malpurigu la fenestron! Tie ĉi eble povus esti iu malnova bildo – nepre kun rompita kadro! ...

Poste la reĝisoro iom interparolis kun la ĉefkameraisto kaj kontrolis la lumigon. Rezulte kelkaj lumĵetiloj estis denove translokitaj.

Ŝajne nun ĉio jam estis en ordo.

– Nu, ni komencu! – diris la reĝisoro. – Ĉiuj, kiuj ne plu havas tie ĉi laboron, forlasu la dekoracion!

Post kelkaj minutoj en la dekoracio restis nur ni, la reĝisoro, liaj helpantoj kaj la ĉefkameraisto



DEKORACIO DE KORSARA BATALSIPO POR FILMADO EN PAVILONO

kun siaj asistantoj. Iu juna virino sidis ĉe la elirejo kaj skribis ion en la scenaron. Ĝi estis la scenara knabino¹⁾ de la filmo. Ĝi devis noti kiu sceno el la filmo estas provludota aŭ filmota hodiaŭ; kiel devas esti vestitaj la geaktoroj kaj kie ĉiu el ili devas stari dum la filmado.

La reĝisoro venis al ni.

— Nun ni instaligos en nian subtegmenton kaj komencos nian laboron.

... Mi sidis sur la kesto de libroj kaj Slavi, Milko, Verka, Svetla, Toŝko kaj Venci okupis lokon ĉirkaŭe — iu sur la fruktokesteto, alia sur la difektita seĝo kaj la ceteraj — sur la planko mem aŭ sur iu libro...

Inter ni, sur la planko, sidigis ankaŭ la reĝisoro. Li elpoŝigis pakafeton kun bombonoj kaj regalis nin.

— Delonge mi intencas demandi vin, kiel statas viaj aferoj en la lernejo — li diris. Eble iuj el vi havas problemojn? Aŭ eble iu postrestas en la lernado?

— Nia klasinstruistino rilatas bone al nia partopreno en la filmo — diris Milko —, sed speciale mi havas malagrablaĵojn kun la matematikistino... Kaj verdire, mi ne povas fanfaroni pri sukceso en tiu scienco...

— Ĉu vere la matematiko tiel malfacilas por vi? Scienco, kiel ĉiuj ceteraj sciencoj, sed, kompreneble, oni devas serioze okupiĝi pri ĝi. Mi esperas, ke vi faros ĉion eblan, por ke vi bone vin prezentu, alie mi sentos min kulpa pro via malsukceso. Kaj vi sciu, ke mi persone kontrolos tion! — la reĝisoro minacis per fingro Milko, kiu kuntiriĝis sur la seĝo kaj ŝajnis esti ankoraŭ pli malgranda. — Se iu havas problemojn en la lernejo, bonvolu diri al mi kaj mi provos iamaniere helpi. Ĉu komprenite? Kaj nun ni komencu! ...

1) Scenara knabino (skribistino) — unu el la helpantoj de la reĝisoro, kiu notas en specialan tag-jurnalon ĉiujn filmitajn momentojn kaj la detalaĵojn en la vestoj kaj la ŝminko de la geaktoroj, en la dekoracio ktp.

– Se vi ne kontraŭstaras, mi volus ankoraŭfoje priparoli la detalaĵojn de la sceno – diris la ĉefkameraisto.

– Ĉu ni ne faris tion hieraŭ? Ĉu io ankoraŭ estas malklara? De „ĝenerala plano” de la tuta grupo vi proksimiĝas al Vasko kaj Niki, kiuj devas resti en la centro de la kadro. De „meza plano” vi proksimiĝas al „duonproksima plano” kaj fiksas la kameraon nur sur la vizaĝon de la parolanta Vasko. Poste vi tuj direktos la kameraon al Ico „la Fantaziulo” kaj poste – sinsekve al la vizaĝoj de Lili, Roza kaj Niki.

– Tion mi bone komprenis, sed la lumigo ne tre kontentigas min. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas tro forta. Malgraŭ ke estas tago, la infanoj tamen troviĝas en subtegmento...

– Kaj kion vi proponas? – iom nerve demandis la reĝisoro.

– Oni metu difuzilojn sur la tri supraj lumĵetiloj...

– Do, bone, sed rapide, mi petas! ...

La teknikistoj pri la lumigo plenumis la ordonojn de la ĉefkameraisto, kiu intertempe ankoraŭ malkontente murmuris, sed finfine oni aŭskultis lin diri: „Bone! Ni estas pretaj! ...”

– Nun atentu! – turnis sin al ni la reĝisoro. – En la momento, kiam Vasko diros sian replikon: „Delonge mi malŝatas tiun ĉi friponon”, la kamerao sin direktas al li kaj al Niki, kiel ni jam interkonsentis. Vi ĉiuj atente aŭskultas lin, kaj Ico „la Fantaziulo” lin interrompos, entuziasme aprobante: „Bonega ideo! Fantazio! ...” Tio rilatas al la propono de Vasko, ke vi eldonu gazeton, ĉu ne? Jam antaŭ ol Ico ekkrios, la esprimo de viaj vizaĝoj devas esti entuziasmo-plena, ĉar la ideo de Vasko tre plaĉas al vi... Unue ni provu fari nur tion kaj poste ni daŭrigos. Nu, Velizar, ĉu vi estas preta?

Mi maltrankvile ekmoviĝis sur la kesto:

– Delonge mi malŝatas tiun ĉi friponon! Ni donos al li tian lecionon, ke alifoje li eĉ ne pensos ŝteli! ...

La kamerao senbrue proksimiĝis al ni, moviĝante laŭ la reloj, sur kiuj ĝi estis metita. La ĉefkameraisto sidis malantaŭ la kamerao, kovrante sian kapon per nigra ŝtofo. Apud li sidis lia



**SCENO EL LA BULGARA LUDFILMO „KONDAMNITAJ ANIMOJ” KUN PARTOPRENO DE
INTERNACIA AKTORA TEAMO (HUNGAROJ, BULGAROJ, POLOJ K.A.) SUR LA FOTO –
LA POLA AKTORO JAN ENGLERT**

unua asistanto kaj manturnis ian turnilon, dum du aliaj personoj malrapide puŝis la ĉareton kun la kamerao laŭ la reloj.

La kamerao haltis je unu metro de ni kaj ĝia brila vitra okulo estis fiksita sur mi... Subite mi forgesis mian replikon kaj konfuzite eksilentis...

— Kio okazis, he, Velizar? — ekkriis la reĝisoro. — Kial vi eksilentis?

— Mi... mi distriĝis... rigardante la kameraon...

Slavi mallaŭte ekridis:

— Sed kial vi rigardas ĝin? Ja nenio interesa estas — kamerao kiel kamerao! ... Vi devas prezenti, ke vi koleras, ke vi estas emociita! Ĉu vi komprenis? Kaj vi diras vian replikon kiel vi lernis ĝin el la scenaro... Nun ni ripetu! Kaj mi petas vin: ne distriĝu! Forgesu, ke vi estas en dekoracio. Vi estas en la subtegmento en la domo de Vasko, kiu sciigos al vi interesan proponon. Nu, estu pretaj! ...

Kaj ĉio denove komenciĝis: la kamerao ree direktiĝis al ni, sed ni havis ege gravan laboron kaj ni jam interesiĝis nek pri ĝi, nek pri la homoj ĉirkaŭ ni. Ĝi jen haltis antaŭ mia vizaĝo, jen malproksimiĝis por halti antaŭ la vizaĝoj de miaj amikoj. Nia interparolo daŭris plu kaj estiĝis pli kaj pli ekscitita. Finfine, temis pri nia devo de junpioniroj! ...

La reĝisoro proksimiĝis kaj ĝoje ekrigardis nin:

— Bonege! Mi estas kontenta! ... Velizar — li turnis sin al mi — mi petas, ne estu tiel malĝentila al Lili. Ja ŝi estas knabino kaj, krome, vi estas bonaj geamikoj, kvankam vi ambaŭ preferas ne montri tion. Vi komprenas, ĉu ne? Ankaŭ Lili ne devas sin turni al vi tiel malafable. Tio estas amika disputo kaj ne kverelo! ... Ni ripetos ankoraŭfoje la tutan scenon kaj poste ni faros la unuan filmbildon.

Ĉio pasis sukcese. Nun venis la vico de la plej grava afero: la unua vera filmbildo! ...



IA UNUA VERA FILMBILDO

En la dekoracio estis varme kaj sufoke.

La ŝminkistino pudris niajn ŝvitkovritajn vizaĝojn, per peniko riparis tie kaj tie ĉi la ŝminkon kaj kombis niajn harojn.

Unu el la asistantoj de la ĉefkameraisto mezuris per bendmezurilo la distancon inter ni kaj la kamerao, proksimigis al niaj vizaĝoj ian aparaton grandan kiel alumetskatoleteto kaj notis ion en sian notlibreton. Ĝi estis lummezurilo. Pere de ĝi oni mezuras la forton de la lumo necesa por la filmado de ĉiu aparta sceno el la filmo.

La son-inĝeniero venis kaj trarigardis la dekoracion.

— Kiam la kamerao moviĝas — li diris — io malagrabla grincas.

— Kio grincas? Nu, vidu, ĉu ne estas la planko? ! — ordonis la reĝisoro. Alkuris du viroj kun marteloj kaj ĉarpentiloj enmane kaj komencis atente kontroli la vojon de la kamerao. Jes, la planko efektive grincis. La laboristoj rapide forigis la malagrablan bruon.

— Ŝaltu ĉiujn lumŝtelojn kaj lampojn! — ekkriis la reĝisoro. — Mi petas absolutan silenton!

La lumŝteloj denove ekbrilis per blindiga lumo.

Super ĉiuj pordoj en la pavilono eklumis ruĝaj ŝurskriboj:

SILENTON!
FILMADO!

La scenara knabino rapide ekstaris antaŭ la objektivo de la kamerao. Ŝi tenis enmane nigran tabuleton — la tiel nomatan „klakilo”n, sur kies supra parto estis skribita la titolo de la filmo — „La Aŭdacaj Plumoj” kaj iom sube — per kreto — la ciferoj 49/1. Tio signifis, ke estis filmota por la unua fojo la 49-a kadro de nia filmo.

Denove aŭdiĝis la voĉo de la reĝisoro:

— Pretaj por filmado! Magnetofonon! Kameraon! ... — Aŭdinte la respondon „funkcias”, li ordonis: — Klakilon!

La scenara skribistino laŭte ekkriis:

— Kvardeknaŭa kadro, unua dublo... — Ŝi forte klakis per la klakilo kaj rapide flankeniris...

La kamerao sin direktis al ni.



... Mi jam estis prezentinta la ideon de mia heroo pri eldonado de kvartala gazeto „Tamburo”. Ico „la Fantaziulo” entuziasme estis ĝin aprobinta kaj ni komencis ĝin pridiskuti.

La kamerao proksimiĝis al mi kaj al Verka, kiu plenumis la rolon de Lili.

LILI (iom konfuzite, singene):

— Ankaŭ al mi plaĉas la ideo de Vasko, sed mi ne scias, ĉu tio estas deca? ... Kaj se oni kaptos nin? ! ...

VASKO (kolere imitante Lili):

— „Ĉu estas deca? ... Se oni kaptos nin? ! ...” Kaj doni kaŝe la plej bonkvalitajn kotletojn al Lazo — la restoraciestro — ĉu tio estas deca? Se vi timas, vi povas tuj iri hejmen. Sed atentu ne denunci nin! ...

LILI:

— Nu, ne minacu min! Mi memvole venis ĉi-tien! Ĉu estas io malbona, ke mi starigas tiun ĉi demandon? Kaj la titolo iom ne plaĉas al mi. Kial ni ne nomu ĝin „Vigla Konscio”?

EMIL:

— Laŭ mi „Tamburo” estas tre bona titolo!

ROZA:


— Kaj kion vi diros pri subskribo „La Aŭdacaj Plumoj”? Ja ni estos ĵurnalistoj, ĉu ne? ! ...

NIKI:

— Brave, Rozi! ... Bonege! „La Aŭdacaj Plumoj”! ... Tio memorigas al mi pri la romanoj de Mayne Reid...

VASKO:

— „La Aŭdacaj Plumoj”... Jes... Ankaŭ al mi plaĉas! Se ankaŭ la ceteraj samopinias — ni akceptu ĝin. Kaj nun mi diras al vi, kiu kion faros. Ni ĉiuj scias, ke Niki pentras bone. Do, li pentros la titolon kaj se necese — ankaŭ karikaturojn, ĉu ne? La ceteraj estos raportistoj. Vi devas penetri ĉien kaj, rimarkinte ion malordan, tuj devas informi pri ĝi! Tie ĉi



LA FOTISTINO DE LA FILMA SKIPO DUM LABORO

estos la redaktejo. Sed agu tre atente: neniu devas kompreni ion ajn pri ni! ... Kaj Emil scipovas foti – li estos nia fotoreportero! Dokumentoj neniam estas superflua! ...

EMIL (iom provoke):

– Kaj kion vi faros, se tio ne restos sekreto? ! ...

VASKO:

– Mi korektos viajn ortografiajn erarojn...

EMIL:

– Ehe, vidu lin... La stultuloj laboros kaj li nur legos la jam pretajn materialojn! Bonege elpensite! ...

ICO „LA FANTAZIULO” (puŝetas la apude sidantan Emil):

– Nu, nu, sen ironio! Vasko estos la ĉefredaktoro. Al li apartenas la ideo kaj krome vi fakte lamas en la ortografio. Ne estu tiel memfida kaj malmodesta! Se vi volas, ni voĉdonu la distribuon de la taskoj. Mi mem ĉion aprobas!

Ico levas sian manon. Post ioma hezito, kune kun la ceteraj ankaŭ Emil, kvankam malkontenta, levas la manon...

– Stop! – ekkriis la reĝisoro. – Ĉio pasis bonege!

– Ankaŭ mi estas tre kontenta! – sin aŭdigis la ĉefkameraisto. – Mi petas, restu sur via loko – li sin turnis al ni. – Nun ni faros ankaŭ fotojn.

La fotisto – la sama, kiu antaŭ nelonge fotis nin en la lernejo, faris kelkajn fotojn pri ĉiuj partoprenantoj kune en la ĵus filmita sceno, kaj poste – aparte pri mi, Verka, Slavi kaj Milko.


Kiam la filmo estos preta, el tiuj ĉi fotoj en la fotolaboratorio oni ellaboros la albumon kaj la reklamajn fotojn de la filmo. Similajn fotojn oni kutime elmetas en montrofenestrojn antaŭ la kinejoj, en specialaj vitrinoj ktp. Tial ĉiu filma produktoficejo havas specialan fotiston, kiu zorgas pri la ellaboro de altkvalitaj reklamfotoj.

– Nun ni iom ripozu – diris la reĝisoro. – Kaj laŭ malnova kutimo, ni regalu nin pro la komencigo de la filmado.

Oni alportis botelon da ĉampano kaj donis ĝin al la reĝisoro. Li rompis ĝian „gorĝon” je la stativo de l’ kamerao kaj la ĉampano ekŝaŭmis en la glasoj...

– Je via sano, geamikoj! – levis la glason la reĝisoro. – Por ke ni faru same tiel bone ankaŭ la ceterajn filmscenojn. Kaj vi estos obeemaj, ĉu ne? – li sin turnis al ni.

– Kaj ni ne vizitos la lernejon dum la filmado, ĉu ne? – demandis Slavi kaj tuj sin kaŝis malantaŭ la dorso de Toŝko...





**RI LA NEKONSEKVENCO DE LA SCE-
NOJ ĈE FILMADO KAJ PRI IO ALIA...**

La filmadpavilono estas malluma.

Nur supre, sub la plafono mem, briletas deĵorlampoj.

Dum la geaktoroj ripozas kaj dum oni preparas la novan dekoracion, mi uzos la okazon por rakonti al vi pri la nekonsekvenco de la scenoj ĉe filmado kaj ankaŭ pri io alia...

Eble iuj demandas, kial la reĝisoro komencis unue filmi la scenon „En la subtegmento ĉe Vasko”. Se vi memoras la rakonton de la scenaristo, ĝi estas laŭvice la oka en la scenaro. Se vi jam forgesis, mi memorigos al vi, ke ĉio komenciĝas en unu el la lastaj tagoj de la lernoĵaro.



**FILMAJ SKIPOJ DUM FILMADO
SUBĈIELE**

Guste tiam al Vasko subite venas la ideo eldoni kvartalan gazeton „Tamburo”. Sed, kiel vi jam konstatis, oni ne komencis la filmadon per la sceno en la subtegmento...

Tiu ĉi malkonsekvenco ĉe filmado de la apartaj scenoj estas unu el la multaj diferencoj inter la kino kaj la teatro. Ĝi kaŭzas multajn malfacilaĵojn al la geaktoroj. En la teatro la aktoro bone scias kiu sceno sekvas kaj kiajn replikojn li devas prezenti. Krome, pro la seninterrompa konsekvenca sekvo de la intrigo, la aktoro povas kontroli la konduton kaj humoron de sia heroo. Samtempe li sentas, ĉu la publiko en la salono aprobas aŭ malaprobas lian ludon, kiel ĝi reagas al liaj scenejaj travivaĵoj.

Ĉe la filmado tio ne estas ebla — precipe pro teknikaj kaŭzoj: oni filmas jen en la pavilono, jen en la naturo aŭ aliloke. Pro tio unue oni filmas en la pavilono ĉiujn scenojn, por kiuj estas necesaj specialaj dekoracioj, poste la scenojn en la naturo aŭ en aliaj lokoj ekster la filmad-pavilono. De tempo al tempo oni ĉesas la filmadon dum oni preparas la novajn dekoraciojn aŭ dum la filmskipo kune kun la tuta necesa aparataro transiras al nova loko. Ĉio ĉi malkoncentrigas la geaktorojn kaj ĉe ĉiu nova sceno ili devas denove trovi la plej konvenan humoron, denove „enkorpiĝi” en siajn heroojn...

Sed el la vidpunkto de la reĝisoro, ĉefkameraisto, aŭ direktoro de la filmo la „malordo” ĉe la filmado estas tre utila, ja ĝi ebligas al ili fari la filmon pli organizite kaj dum pli mallonga tempo.



ERA UNIVERSALA MAGAZENO!...

La nova dekoracio por la filmo ankoraŭ ne estis preta.

Por ne perdi tempon kaj por utiligi la sunajn tagojn, la reĝisoro decidis komenci filmadon sub libéra ĉielo...

— Oni devas kudri al vi novajn vestojn — diris onjo Katja kaj kondukis nin al la kudrejo, por ke oni prenu niajn mezurojn.

La kudrejo kaj la tenejoj, en kiuj oni konservas la vestojn kaj la diversajn objektojn necesajn por la filmoj, similas al granda universala magazeno.

Se ne estus la estro de la tenejoj, kiu akompanis nin, eble ni povus perdiĝi en la labirinto de ejoj, sur kies muroj estis altaj bretoj kun diversaj vestoj.

En unu el la tenejoj estis nur militistaj uniformoj — diversnaciaj kaj diversrangaj: de plej ordinara soldatjako ĝis paradaj uniformoj de generaloj kaj admiraloj. Poste viciĝis viraj kaj virinaj kostumoj el diversaj epokoj, bretoj kun naciaj kostumoj, bretoj kun la plej diversaj ŝuoj kaj ĉapeloj. Ĉi tie estis eĉ poŝtukoj, ŝtrumpoj, kravatoj, pelerinoj kaj cilindroĉapeloj...

— Tiuj ĉi kostumoj kaj uniformoj estas por la filmo „La herooj de Šipka” kaj tiuj por „Kalin la Aglo”, por „Sub la jugo”, por „La ŝtelisto de persikoj”... — la ĉefo de la tenejoj montris al ni laŭvice la bretojn. — Kvankam ni disponas pri tiom multaj diversaj kostumoj, tamen preskaŭ por ĉiu nova filmo estas necese kudri ankaŭ novajn kostumojn. La kudristoj de nia ateliero estas altgradaj specialistoj, kiuj bonege konas ne nur la nuntempan modon, sed ankaŭ la modon de la pasintaj jarcentoj...


Pro la akraodoro de naftaleno kaj pro la malfreŝa aero mi eksentis versiĝon...

Trapasinte en la sekvan tenejon, mi kvazaŭ trafus fabelan mondon. Antaŭ miaj okuloj aperis multaj kaleŝoj — nigraj aŭ orumitaj, al kiuj oni aljungis unu, kvin aŭ dek ĉevalojn. La bridoj kaj la rimenoj de la jungilaroj, kroĉitaj sur la muroj, brilis per oro kaj arĝento de sia ornamo. Mi petis permeson sidiĝi en unu el la kaleŝoj kaj mi imagis min heroo de fabelo... Tio tute ne estis malfacila, ĉar tie ĉi oni tre facile povus transformiĝi en soldaton el la epoko de caro Kalojan, en antikvan imperiestron, sultanon aŭ en ribelulon el la taĉmentoj de Robin Hood aŭ de

Vilhelmo Tell... Nu, alivestiĝu, kaptu iun el tiuj multaj sabroj aŭ jataganoj, ektrumpetu, flirtigu unu el la centoj de standardoj kaj vi ne plu estos Velizar, Slavi aŭ Milko, sed heroo el alia epoko!

Versajne Ali Baba el la fabelo pri la kvardek rabistoj sentis sin meze de la riĉaĵoj en la sorĉa groto tiel, kiel ni sentis nin tie ĉi! ... Sur la bretoj estis ankaŭ multaj aliaj plej diversaj objektoj: grandaj kaj malgrandaj horloĝoj kun la plej malsamaj kaj mirindaj formoj, petrollampoj, kristalaj lustroj, florvazoj kaj servicoj bele ornamitaj per koloraj pentraĵoj. Ni rigardis nin en grandaj kaj malgrandaj speguloj, malfermadis skatolojn kun diversformaj medaloj kaj ordenoj. El la portretoj sur la muroj al ni rigardis generaloj, revoluciuloj, imperiestroj, caroj, famaj aktoroj, verkistoj, komponistoj... Laŭdezire, vi povus sidiĝi sur orumita, riĉe ornamita trono, sur moderna fotelo, aŭ sur balanciĝanta seĝo kaj amuziĝi ludante kun pluŝa urseto...

Ĉio vidita en tiu ĉi tago ŝajnis al mi kiel fabelo! ...





**AŬ LA PIEDSIGNOJ DE LA KRIMU-
LOJ, AŬ LA HEROAĴOJ DE „LA AŬDACAJ
PLUMOJ”**

Sur la loko de la iama hipodromo, kie antaŭ jaroj okazis ĉevalkonkuroj, nun estas nova loĝ-kvartalo kun altaj domegoj. Tie ĉi ni filmis la plejparton de la epizodoj sub libera ĉielo.

La loĝantoj de la kvartalo jam kutimiĝis al ni kaj renkontadis nin kiel malnovajn konatojn. La bruo de la agregatoj produktantaj elektroenergion por la lumĵetiloj, kaj ĝenerale la bruo akompananta la filmadon, ne plu maltrankviligis ilin kaj ili jam ne protestis. Male, iuj eĉ estis fieraj pro la fakto, ke en ilia kvartalo oni faras la filmon, pri kiu la gazetoj jam informis kaj estis speciala televidelsendo. Krome, en iuj el la epizodoj partoprenis ankaŭ loĝantoj de la kvartalo, kiuj ĝojis, ke ili aperos sur la ekrano.

Ankaŭ ĉi-matene la mikrobuso de la filma produktadentrepreno sufiĉe frue transportis nin al la filmadplaceto. Ĝi estis apud la granda frukto- kaj legomvendejo.

Hodiaŭ ni estis filmontaj la scenon, en kiu „La Aŭdacaj Plumoj” malkaŝas grupon da junaj krimuloj.


... Post la publikaĵoj aperintaj en la kvartala gazeto „Tamburo” (pri la du knaboj el loĝbloko n-ro 3), ili ne plu kuraĝas mem fari domaĝojn. Sed ili ofte renkontiĝas kun kelkaj nekonataj knaboj kaj kun misterplena aspekto flustris kun ili pri io.

Dum iu el la kunsidoj de la „redakta komitato” en la subtegmento Vasko proponas, ke ili atente observu tiujn ĉi knabojn kaj se iu rimarkus ion suspektindan — tiu tuj alarmu. Kaj poste „Tamburo” denove laŭte ektamburos! ...

* * *

La elektroteknikistoj jam estis instalintaj la lumĵetilojn ĉirkaŭ la loko de la filmado kaj aranĝis la kablojn. La asistantoj de la kameraisto instrukciis la teknikistojn kien meti la relojn por la puŝĉareto de la kamero. Ankaŭ la sonteknikistoj aranĝis la kablojn, kiuj devis konekti la mikrofonojn instalitajn sur la loko de la filmado kun la son-registrejo (la tiel nomata „son-vagono” aŭ „son-aŭtomobilo”).





FILMA KAMERAO „MITCHEL” POR FILMADO DE LUDFILMOJ



Ni ĉiuj jam estis vestitaj kaj ŝminkitaj por la filmado.

Alvenis per sia aŭto ankaŭ la reĝisoro. Kune kun li estis la ĉefkameraisto kaj onjo Katja.

— Saluton! — vigle sin turnis al ni la reĝisoro. — Ĉu vi estas pretaj? — demandis li sian unuan asistanton. — Kiel vi fartas, Velizar? Ĉu vi estas bonhumora?

— Dankon, kamarado Rankov, mi fartas bone, sed mi iom timas...

— Kial do? ! ...

— Eble, ĉar mi ne tre bone lernis miajn replikojn...

— Ne maltrankviliĝu anticipe! Ni vidos tion dum la provludo. Nu, tralegu ilin denove!

La reĝisoro direktiĝis al la loko de la filmado akompanate de la ĉefkameraisto kaj onjo Katja.

— Ĉiuj kunvenu por la provludo! — oni ordonis per la laŭtparolilo.

Post kelkaj minutoj pĉiuj jam ĉirkaŭis la kameraon. La reĝisoro atente nin ekrigardis: li volis ankoraŭfoje kontroli, ĉu ĉio estas en ordo.

— Tiu ĉi sceno estas tre grava — li diris. — En ĝi niaj junaj ĵurnalistoj elmontras lertecon kaj kuraĝon. Ni ĝustigu ankoraŭfoje la replikojn kaj faru mallongan provludon.

Ĉio estis preta por la filmado.

Oni jam mezuris la lumigon de niaj vizaĝoj kaj la distancon ĝis la kamerao. Mi sukcesis kelkfoje ripeti miajn replikojn kaj nun sentis min pli trankvila.

— Surloke! Pretaj por filmado! ...

La elektroagregatoj ekbruis obtuze, oni konektis la lumĵetilojn kaj jen — abunda, intensa lumo surverŝis la placeton.

— Nu, Velizar, ekiru! — aŭdiĝis la voĉo de la reĝisoro, kiu sidis sur la puŝĉareto apud la kamerao kaj mi ekiris. — Kameraon! ... Funkciigu la kameraon!

La filmado komenciĝis.

... Mi kaj Milko estis kuntiriĝintaj ĉe unu el la muroj de la dekduetaĝa loĝbloko n-ro 3. El ĝi ĵus estis kaŝe elirintaj Goŝo kaj Danĉo kaj iliaj novaj amikoj, kune kun kiuj ili jam kelkajn tagojn vagadis en la kvartalo. La tri knaboj, jam preskaŭ dekkvinjaraj, aspektis kiel huliganoj.

Iliaj malbutonitaj buntaj ĉemizoj permesis vidi sur iliaj koloj ŝnurojn kun medalionoj kaj iliajn senkoloriĝintajn ĝinsojn subtenis larĝaj zonoj. Iliaj longaj malpuraj haroj falis sur iliajn orelojn kaj kolon.

Ili vige interparolis, sed flustre. Ni streĉis la orelojn por aŭdi ĉiun vorton.

Iu el la knaboj, verŝajne ilia estro, donis al ili ordonojn:

— ... Goŝo kaj Danĉo ekstaros ĉe la du anguloj de la tenejo. Garo gardos ĉe la alia flanko, ĉe la enirejo, kaj ni kun Boco plenumos la laboron. Se iu el vi rimarkos ion danĝeran, tuj ekfajfu — kiel interkonsentite. Ĉu ĉio estas klara? ...

Ankaŭ por ni ĉio estis klara: tiuj ĉi friponoj intencis fari ion malbonan. Lasinte Milko observi ilin, mi ekkuris al la bloko, en kiu loĝas Emil, kaj fajfis nian signalon.

Emil aperis sur la balkono kaj faris al mi signon, ke li tuj malsuprenvenas. Baldaŭ li elkuris sur la straton kun sia fotoaparato enmane.

— Kio okazas?

— Ili direktiĝis al la tenejo...

— Kie estas Milko?

— Li observas ilin. Jen estas ili! — mi preskaŭ ekkriis, vidinte ilin ĉe la fino de la aleo.

— Ni devis kunvoki ankaŭ la ceterajn el nia grupo. Ili estas kvinope kaj vidu kiom fortaj ili aspektas!

— Lili kaj Roza scias, sed en tiu situacio ili nur povas malhelpi al ni. Tio ja estas vira afero! ...

Al ni rapide kuris Milko.

— Ili direktiĝas al la tenejo! — li diris spirigante. — Goŝo postenas ĉe la angulo kaj la ceteraj direktiĝis al la magazenoj...

— Ni rapidu! — ordonis mi. — Emil, nun estas la momento montri je kio vi estas kapabla! Kaŝu vin malantaŭ la rubuoj kaj fotu ilin. Poste iru al la infanludejo kaj fotu ĉion, kion ili faras. Mi kaj Milko vin ŝirmos... Kuru rapide kaj atentu, ke oni ne rimarku vin! ...

... La puŝĉareto kun la kamerao senbrue sekvis nin laŭ la asfaltitaj aleoj kaj sur la filmbendo

metron post metro fiksiĝis niaj aventuroj. La lumĵetiloj instalitaj sur la tuta distanco, pliintensiĝis la sunlumon. Scivolemuloj observis nin. El la fenestroj de la najbaraj loĝblokoj, ankaŭ ĉirkaŭ la korto, kiu zonis la lokon de filmado, amasiĝis multaj scivolaj preterpasantoj.

Ĉio okazis rapide.

La knaboj proksimiĝis al la mopedo de la legomvendisto kaj per ŝraŭbilo kaj tenajlo malŝraŭbis ĉion, kio povis esti ŝtelita senbrue: lumĵetilo-dinamon, ĉenon, spegulon, malantaŭajn ĝirindikilojn, instrumentojn... Ili metis la rabaĵon en grandan sakon kaj rapide ekkuris al la proksima tramhaltejo...

Ni rapide forlasis nian kaŝejon kaj sekvis ilin...

— Ni sekvos ilin! — mi diris. — Emil, ĉu vi havas ankoraŭ da neuzita filmo en la aparato?

— Jes, mi havas...

Nin kaŝante ni atingis la tramhaltejon kaj miksiĝis kun la homoj ne perdante el la okuloj la malbonfarantojn...

* * *

La filmado de unu malfacila sceno finiĝis. Ni devis ripeti multfoje la movojn, ĉar oni filmis nin per kelkaj kameraoj — el malsamaj lokoj — tra la tuta vojo de la loĝbloko ĝis la tramhaltejo...

La nova numero de la kvartala gazeto „Tamburo” ree provokis sensacion! Ĝi malkaŝis iun krimon en detaloj: la ŝtelitaj partoj de la mopedo estis proponitaj por vendado en unu privata metiejo por riparado de aŭtomobiloj...

La fotoj de la aŭdaca fotoraportero Emil helpis la policon malkaŝi bandon da krimuloj.

„La Aŭdacaj Plumoj” estis plenumintaj denove utilan laboron.



**A PENTRAJOJ KAJ
LA PUPOJ VIVIĜAS**

Dum iu longa paŭzo, kiam la ĉefkameraisto kaj la teknikistoj aranĝis la lumigon de la nova dekoracio, oni projekciis al ni kelkajn pentritajn kaj pupajn filmetojn. Al mi tre plaĉas tiuj mallongaj, amuzaj kaj gajaj filmrakontoj kaj fabeloj! ...

Post la projekciado ni ĉiuj ekdeziris vidi, kie kaj kiu kreas la pentritajn kaj pupfilmojn. Ni ege miris eksciinte, ke oni ĉion faras nur en kelkaj ĉambroj! La kreo de tiuj filmoj havas preskaŭ nenion komunan kun la filmado de la belartaj filmoj.

En la laborĉambro de la reĝisoroj oni montris al ni kelkajn scenarojn por pentritaj filmoj. Al ili estis aldonitaj ankaŭ albumoj kun pentraĵoj pri la filmherooj — io simila al la provfotoj, kiujn oni faris pri ni. Sed la „geaktoroj” de tiuj filmoj estas pentraĵoj aŭ pupoj, kiuj prezentas bestojn, diversajn ludilojn kaj objektojn...


La homoj, kiuj vivigas la pentraĵojn estas nomataj animistoj.

— Kial ĉe vi la pentraĵo de ĉiu figuro multfoje ripetiga? — demandis Verka iun el la animistoj.

— Rigardu atente — li diris — kaj vi rimarkos, ke la pentraĵoj estas malsamaj. Por prezenti en la filmo ĉiun movon nur de tiu ĉi simpatia klaŭno, ekzemple, ni faras centojn da pentraĵoj. Imagu, ke li ludas kun pilko kaj ĝin suprenĵetas. Nur por prezenti tiun ĝian movon estas necesaj pli ol dek pentraĵoj. Kaj se, ekzemple, li biciklas aŭ plenumas ian dancon? Ĉu vi povus imagi, kiom da pentraĵoj estas bezonataj por prezenti tiujn ĉi movojn? ... En 10-minuta pentrita filmo estas uzitaj ĉirkaŭ 15 000 pentraĵoj! ...


Ni vizitas ankaŭ la pentristojn-konturistojn. Ili desegnas per tuĉo sur diafanaj travideblaj celuloidaj platoj la konturojn de la pentraĵoj. Tiujn ĉi pentraĵojn ili metas sur netravideblan vitron, meze de la tablo, sub kiu lumas lampo. Tiel ili pli bone vidas la konturojn de la pentraĵo kaj povas precize kopii ĝin...

Aliaj pentristoj, nomataj plenigistoj, kolorigas per diverskoloraj farboj la pentraĵojn sur la platoj kaj transdonas ilin por filmado. Oni metas la pentritajn platojn sur specialan tablon, super kiu estas fiksitaj lumigiloj kaj speciala filmkamerao. La kameraisto filmas la platojn sinsekve — laŭ la ordo difinita en la reĝisora scenaro, kaj tiamaniere — pentraĵon post pentraĵo — oni fiksas sur la filmbendon la apartajn momentojn de la estonta filmo.



DUM FILMADO DE PUPAJ FILMOJ

**MIKI, LA MUSO KAJ LIA AMIKO
PLUTO, LA HUNDO**



En la ĉambro de la pentristoj sur la muroj pendis pentraĵoj el diversaj filmetoj. Iujn el ili ni jam estis spektintaj... Tiuj ĉi pentraĵoj memorigis al ni la ĉarmajn filmetojn „Petro la Nigra Pirato”, „Lekanto”, „La Futbalpilko”, „La Steleto”...

Al la pentristoj plaĉis nia interesiĝo pri ilia laboro. Unu el ili, kun malgranda ridinda bereto sur la kapo, okulsignante sin turnis al mi: „Saluton, kolego!” – kaj donis al mi kelkajn desegnaĵojn, aldoninte: „Prenu ilin – memore pri via vizito ĉe ni”. La donaco ege ĝojigis min.

Similajn pentraĵojn ricevis ankaŭ miaj amikoj.

En la fako por pupfilmoj ni vidis multajn pupojn en granda ŝranko – „heroojn” el diversaj filmoj: „Majstro Manol”, „Ruza Petro”, „Gitaro kaj Hupo”, „Maskarado” kaj multaj aliaj. Tiuj ĉi pupoj similis ludilojn. La plej granda el ili – sultano kun grandega turbano kaj en sakpantalonoj – estis ne pli longa ol unu spano. Estis ankaŭ pupoj-negridoj, belaj damoj kun longaj roboj, pupoj en naciaj kostumoj...

Ni vidis ankaŭ, kiel oni faras la pupojn laŭ la modeloj de la pentristoj. Unue oni ellaboris la skeletojn el mola drato, poste oni metis la kapojn, brakojn kaj kruojn kaj fine oni ilin vestis. Poste oni aranĝas la pupojn sur grandan tablon, kovritan per mola ŝtofo, malantaŭ kiu estas malgranda dekoracio.


Ĉe la pupfilmoj, diference de la pentritaj, la pentristoj-animistoj anstataŭ pentri la apartajn movojn de la pupoj, sinsekve movas la brakojn aŭ la kapojn de la pupoj kaj la kameraisto filmas ĉiun momenton de tiuj ĉi movoj. Ja la korpoj de la pupoj estis faritaj el mola drato! ...

Krom pentritajn kaj pupajn filmojn la pentristoj-multiplikistoj faras ankaŭ filmojn kun herooj kaj dekoracioj tranĉitaj el diverskoloraj paperoj. Ne malofte la „herooj” de similaj filmoj estas alumetskatoloj, ŝakfiguroj, boteloj kaj aliaj objektoj.

Eble multaj el vi jam estas spektintaj similajn filmetojn? ! ...

Eble en tiu ĉi momento Velizar, Ico, Boreto, Verka kaj la aliaj infanoj interparolas pri la vizito ĉe la filmanimistoj.

Mi denove profitos tiun interrompon de la filmado por rakonti al vi iom pli pri la filmanimado. Tiu plej eta filma formo ĝuas grandan sukceson ĉe la junaj samkiel ĉe la grandaĝaj spektantoj.



SCENO EL PENTRITA FILMO

Fakte la antaŭuloj de la kinematografo estas la „moviĝantaj bildoj” de la „Optika Teatro” de Emile Reynaud (1892). La mallongaj filmetoj iluziis movon de homoj, bestoj kaj objektoj, sed ilia projekciado per la aparato de Reynaud ne daŭris pli ol 1-2 minutojn. La desegnaĵoj estis malperfektaj kaj ilia movo – malegalritma. Malgraŭ ĝiaj malperfektaĵoj, tiutempe la „Optika Teatro” de Reynaud estis vera spektaklo kaj distro.

Unu el la pioniroj de la pentritaj kaj pupaj filmoj estis Emile Cohl (en Francio) kaj Vladislav Stareviĉ (en Rusio), kiuj komencis sian krear laboron en la unuaj jaroj de nia jarcento.

Samtempe kun la kino evoluis ankaŭ la arto de animado – la pentritaj kaj pupaj filmoj –, kiu profitis la novan inventon de fratoj Lumière.

Krom la kutimaj ludaj kaj dokumentaj filmoj en multaj landoj oni komencis produkti pentritajn kaj pupajn filmojn. La mallongaj amuzaj rakontetoj estis akceptitaj tre afable far la plej junaj spektantoj.

La filma animado montris viglan evoluon en Francio, Germanio, Usono kaj Sovetio, aparte post la apero de la sonfilmoj.

Unu el la plej elstaraj, en la tuta mondo fame konataj kreantoj de animitaj filmoj estas la Usona pentristo Walt Disney. Ĉefrolulo de liaj filmoj estas la konata Mickey Mouse (La Muso Miki). Kune kun Mickey en la multnombraj amuzaj filmoj de Disney rolas ankaŭ la muso Mini, la hundoj Pluto kaj Guffy, la viranaso Donald, la tri porketoj, la testudo Tobby kaj aliaj figuroj, kiuj same ĝuas grandan popularecon.

Krom la mallongaj gajaj filmetoj Walt Disney kreis ankaŭ longajn pentritajn filmojn „Neĝulino kaj la sep gnomoj”, „Alice en la lando de desegnaĵoj”, „Bamby” kaj aliajn, kiuj plifamigis tiun pentriston.

Multaj kreantoj de animitaj filmoj en diversaj landoj ĉerpis el la spertoj de Disney kaj iuj el ili tutsimple imitadis la stilon de liaj desegnaĵoj.

Iom post iom aperis diversnaciaj skoloj de animitaj filmoj. Unuavice estas menciindaj la majstroj de la sovetaj animitaj filmoj el la elstaraj pentristoj-reĝisoroj Ivan Ivanov-Vano, Feodor



SCENO EL PUPFILMO

Ĥitruk, Lev Atamanov, Boris Stepancev kaj multaj aliaj. Aparte popularaj estas la filmoj de Vano „Konjok-Gorbunjok” (Uraganrapida ĉevaĵeto) kaj „Maldekstramanulo”, la filmoj de Roman Kaĉanov pri la krokodilo Gena kaj Ĉeburaŝka, tiuj de F. Ĥitruk – pri la aventuroj de la leono Bonifacij kaj dum la lastaj kelkaj jaroj disfamiĝis la serio de pentritaj filmoj de la reĝisoro Vjaĉeslav Katjonoĉkin pri la amuzaj travivaĵoj de la Lupo kaj Leporeto, sub komuna titolo „Nu, pogrudi!” (Nu, atendu!).

En Ĉeĥoslovakio kreis sian nacian skolon de animitaj filmoj la fame konataj pentristoj Jiří Trnka, Hermína Tírhová kaj Karel Seeman – ĉefe per siaj pupfilmoj laŭ motivoj el la nacia folkloro kaj el la mondliteraturaj klasikaĵoj.

Monde konataj estas ankaŭ la pentristo-animistoj Dušan Vuktić kaj Borivoj Dovnoković el Jugoslavio, Jon Popesko-Gopo el Rumanio, Jan Lenica, Jerzy Kotowski, Mirosław Kijowicz, Witold Giersz, Ryszard Czekala el Pollando, Raoul Servais kaj Véronique Steeno el Belgio, John Halas el Britio, Norman McLaren el Kanado kaj ankoraŭ vico da talentaj pentristoj-animistoj el Japanio, Usono, Ĉinio, Hindio kaj el aliaj landoj.

Komence de sia krea laboro la pentristo-animistoj en preskaŭ ĉiuj landoj kreis gajajn kaj edifajn filmetojn, kiuj ridigis milionojn da spektantoj diversaĝajn. Sed iuj tre lertaj komercistoj profitis la arton de animado por siaj komercaj celoj, montrante reklamajn pentritajn kaj pupajn filmojn sur la ekranoj de la kinejoj kaj televidiloj.

La amuzaj kaj naivaj pentritaj rakontetoj cedis lokon al filmoj, en kiuj oni montris krueajn batalojn, murdojn, diversajn krimojn, nemoralajn scenojn... Estaĵoj kun eksterordinaraj kapabloj – „superhomoj” (supermen) fariĝis ĉefroluloj de tiuj filmoj.

Forpasis la „ora periodo” de filmoj kun Mickey Mouse kaj hundo Pluto.

Tamen multaj pentristoj restis fidelaj al la tradicioj pri edukado al humanaj virtoj, alta civitana moralo kaj konscio, kaj daŭre kreas filmojn por la plej junaj spektantoj – morgaŭaj civitanoj de la mondo.

Kiel bulgara aŭtoro, mi permesas al mi doni al vi koncizajn informojn pri la bulgara arto de filmanimado, kiu okupas unu el la ĉefaj lokoj en la monda kinematografio.

Ne estis tiel antaŭlonge, kiam en Bulgario grupo da entuziasmaj junaj pentristoj faris la unuajn provojn pri pentritaj kaj pupaj filmoj en iu subtegmento. Sen tradicio, sen spertoj... Tamen kun vera amo kaj granda deziro krei bulgarajn animitajn filmojn (aŭ „trukfilmojn”, kiel oni nomas ilin en iuj landoj). Tio okazis en 1948, kiam la bulgara socialisma kinematografio faris siajn unuajn paŝojn, kiam oni faris la unuajn ludfilmojn.

La juna tiutempe pentristo-karikaturisto Todor Dinov (nun popola pentristo, korespondanta membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj, heroo de la socialisma laboro) ĵus estis reveninta el Sovetio. Tie li fariĝis specialisto pri arto de filmanimado en la Supera Ŝtata Instituto pri Kinematografio (VGIK) en Moskvo ĉe la majstro de la soveta filma animado, prof. Ivan Ivanov-Vano.

La pentrita filmo „Marko la Brava”, kreita de T. Dinov kompreneble posedis la karakterajn trajtojn de la realisma soveta arto de filmanimado. En tiu tempo lia kolego Dimităr Todorov-Jarava faris sian unuan pentritan filmon „Arbara Respubliko” kaj alia pentristo – Dima Lingorski faris la unuan pupfilmon „Majstro Manol”, laŭ malnova bulgara popola legendo.


Tio ja estis nur provoj, sed la ŝtata kinematografio malavare helpis ilin kaj post mallonga tempo estis fondita „Fako pri pentritaj filmoj”. Hodiaŭ tiu ĉi fako jam estas granda studio, kie laboras centoj da talentaj pentristoj kaj reĝisoroj.


Jam la unuaj filmoj de Todor Dinov – „Fulmoŝirmilo”, „Fabelo pri la pinbranceto”, „Lekanto”, „Jaluzo”, „Prometeo XX” pruvis la grandan talenton de tiu pentristo kaj alportis la unuajn premiojn al la juna bulgara skolo de pentritaj filmoj.

Vico da talentaj pentristoj, kiel Radka Baĉvarova, Zdenka Dojĉeva, Donjo Donev, Stojan Dukov, Ĥristo Topuzanov, Ivan Veselinov, Ivan Andonov kaj multaj aliaj, post nelonga tempo montris siajn artkapablojn kaj kreis proprajn filmojn kun propra arta stilo. Tiaj estis „La neĝ-homo”, „Kio mi fariĝu?”, „Peĉjo – la Nigra Pirato”, la serio pri Ĵoro, Ŝaro kaj Mara – de

Radka Bâčvarova; „Maskarado”, „Tondileto kaj knabineto”, „Parado”, „La bovino, kiu...” — de Ĥristo Topuzanov; „Fabelo”, „Saĝa vilaĝo”, „Pafistoj”, „De fakto” kaj la serio pri la tri stultuloj — de Donjo Donev; „Domoj - bastionoj”, „En passant” (preterpasante) — de Stojan Dukov; „La futbala pilko”, „Akvario”, „Horoskopo” — de Zdenka Dojčeva... Al ili ni aldonu ankaŭ la filmojn de Penčo Bogdanov, Projko Projkov, Georgi Ĉavdarov, Konstantin Peronoski, Anri Kulev, Slav Bakalov, Rumen Petkov kaj al plejado da junaj talentoj, kiuj formis la karakterajn trajtojn de la bulgara skolo de la filma animado.

La sukcesoj de la bulgaraj animitaj filmoj estis garantio por la decido de la Estraro de la Internacia Asocio de Filmanimado (ASIFA) aprobi Bulgarian kiel lando-organizanton kaj dommastron de unu el la plej imponaj internaciaj festivaloj de la monda arto de filmanimado.





EJME

Mi havis liberan tagon.

Miaj amikoj el la kvartalo eksciinte, ke mi estas hejme, jam de matene komencis voki min ludi kun ili.

Mia patrino riproĉis ilin: „Velizar devas lerni! ...”

Mi estis vere malĝoja: belega vetero – kaj tamen mi devis lerni obstine, ĉar la sekvan tagon oni verŝajne ekzamenos min. Kaj – kiel krono de ĉio – mi devis sola fari la kontrolekzercon pri aritmetiko, kiun miaj samklasanoj jam antaŭlonge faris! ... Ne estis eble rezigni – ja mi promesis, por mi tio estis „afero de honoro” ... Krome ankaŭ mia patro jam rilatis favore al mia laboro en la filmo. Li ĉesis murmuri kaj ŝajne al li estis agrable rakonti al siaj amikoj pri mia partopreno en la filmo. Ni ne parolu pri panjo: de la komenço ŝi estis miaflanke kaj nun ŝi denove rapidis trankviligi lin:

– Oni ekzamenis lin pri naturscienco kaj pri gramatiko. Lia klasinstruistino informis min, ke ŝi estas tre kontenta pri liaj respondoj. Kiel vi povus konstati, nia filo sukcese lernas kaj li nenion perdos el la studprogramo. Kaj la filmado baldaŭ finiĝos. Ĉu ne, Velizar?

– Jes... oni tiel diras – asertis mi.

Sincere dirite, por mi la tagoj pasis tre rapide. La laboro en la filmo allogis min kiel iu tre interesa ludo...

Mi ĵus estis fininta mian matenmanĝon kaj jam la duan fojon legis la lecionon pri historio, kiam venis mia frateto Vladko.

– Velizar – li diris mallaŭte –, la knaboj sendis min demandi, ĉu vi povus eliri...

– Nun ne estas eble. Mi devas ankoraŭ lerni...

En tiu momento la ĉambregon envenis mia patrino.

– Vladi – ŝi severe turnis sin al li – ne maltrankviligu vian fraton. Li devas lerni! Nu, iru ludi! ...

– Kaj mi? Kiam mi ludos, panjo? ...

– Kiam vi finlernos viajn lecionojn.

– Mi jam ĉion lernis... Ĉu vi volas, ke mi rakontu al vi la lecionon pri historio?
– Nu, ne troigu – vi ĵus komencis kaj jam sukcesis ĉion lerni! ... Tralegu atente ankoraŭfoje viajn lecionojn kaj tiam vi povas eliri.

Kiam poste mi eliris en la korton, la knaboj el nia strato ekkriis:

– Nu, jen estas vi, finfine! Tiom longe ni atendas vin! Grava persono vi fariĝis! ...
– Lasu tion, ne primoku min! – mi ekscitiĝis.
– Ne ofendiĝu! Ni nur ŝercas – puŝis min per fingro Valjo. – Nu, rakontu al ni, kio okazas kun „La Aŭdacaj Plumoj”? ...

... Ni sidis sur la barilo de nia domo kaj mi rakontis al la knaboj pri la Kinocentro, pri la homoj el nia filmskipo, pri miaj geamikoj, kun kiuj ni kune partoprenis la filmadon...

La knaboj atente aŭskultis min kaj nur de tempo al tempo iu el ili ekkriis „Kiom interese! ...”
Plej scivolema el ĉiuj estis Valjo: „Kiaj ĵurnalistoj vi estas, he Velizar? Kian gazeton vi eldonas ? ”

Kaj mi klarigadis, ke niaj herooj ne estas ĵurnalistoj kiel tiuj el la redakcioj de la ordinaraj ĉiutagaj gazetoj, sed ankaŭ ili batalas kontraŭ mensoguloj kaj ŝtelistoj, kiuj faras malutilojn kaj domaĝojn... Pro tio la filmo estas titolita „La Aŭdacaj Plumoj”...

– Velizar, revenu hejmen! ... – vokis min panjo.
– Restu ankoraŭ kun ni! – petis min la knaboj.
– Ankaŭ mi volas, sed ne estas eble – mi devas lerni, ĉar oni min ekzamenos. Dum la ferioj ni satludos – mi promesas al vi! ...



ILMADO EN LA LASTA LERNOTAGO

Tio estis vere ĝoja tago, vera festo! Oni devis disdoni al ni la lernejanajn notlibretojn kaj ni jam estos en la sepa klaso.

En la lernejo regis eksterordinara vigleco. Nia tuta filmskipo estis ĉi tie por filmi la disdonadon de la notlibretoj. La aŭtoj kun elektro-agregatoj estis sur la strato kaj ties kabloj etendiĝis tra la enirejo ĝis nia klasĉambrō. La infanoj amasiĝis kaj sin puŝis senpacience, dezirante vidi kion faros la homoj, kiuj instalas la lumĵetilojn.

Nia klasinstruistino sinjorino Koleva alvenis kaj ni ekkuris por ŝin renkonti. Poste ni ĉiuj eniris la klasĉambron lumigitan per lumĵetiloj, kaj sidiĝis sur niaj benkoj. Nun mia klasĉambro plaĉis al mi pli ol kiam ajn. Eble pro tio, ĉar ni ne plu lernos en ĝi. Ankaŭ miaj samklasanoj estis tre simpatiaj al mi. Eĉ Plamen, kun kiu ni foje kverelis kaj interbatiĝis pro du vitraj globetoj. Nun mi estis preta donaci ilin al li...

Sur iuj el la benkoj sidis ankaŭ la gepatroj de iuj lernantoj. Venis ankaŭ mia patrino. Ŝi salutis sinjorinon Koleva kaj transdonis al ŝi la florbukedon, kiun ŝi portis. Poste ŝi direktiĝis al mia benko kaj sidiĝis apud mi.

— Kial vi estas tiom maltrankvila? — ŝi demandis min vidante min rigardi malantaŭen.

Sed ne nur mi estis maltrankvila. La lumo de la lumĵetiloj konfuzis ĉiujn. La infanoj turnis sin kaj rigardis al tiuj anguloj de la klasĉambro, kie estis instalitaj malgrandaj moveblaj vandoj el blua tolo, similaj al telefonbudoj. Mi sciis, ke malantaŭ unu el ili estis la kameraisto, kiu estis filmonta nian feston per sia kaŝita kamero.

En tiu momento sinjorino Koleva komencis paroli. Nun ni disiĝis de ŝi, ĉar ŝi instruos en alia lernejo. Dum tiom da jaroj ni estis kune kun ŝi kaj ni ĉiuj amis ŝin. Ŝi ne plu instruos nin. „Tamen — ŝi diris — mi ne forgesos vin kaj mi ĉiam estos kun vi en miaj pensoj. Mi interesiĝos pri vi, pri via poentaro kaj konduto”.

Elka kaj Stefan enmanigis al ŝi grandan florbukedon kaj ledan albumon, en kiu estis fotoj de nia klaso: antaŭ la lernejo, dum laborbrigado, dum ekskursoj, en la zoologia ĝardeno kaj aliloke. La plimulton el la fotoj faris nia samklasano Slavi. Li estas sperta fotisto: li mem rivelas

la filmojn kaj preparas la fotokopiojn. En la banĉambro en ilia domo estas amatora fotolaboratorio. Ankaŭ mi havas grandan deziron foti kaj foje mi diris al mia patro, ke mi ege ĝojos, se li aĉetos al mi fotoaparaton. „Unue ni vidu vian notlibreton kaj poste ni pensos pri fotoaparato” — li respondis tiam.

Emociigite, sinjorino Koleva dankis al ni pro la donaco. Ŝi diris, ke tiu albumo memorigos al ŝi pri ŝiaj plej bonaj jaroj en nia lernejo. Ŝi esprimis esperon, ke ni fariĝos bonaj kaj konsciaj civitanoj de nia patrolando; ke inter ni certe estas estontaj inĝenieroj, verkistoj, aktoroj — homoj kun interesaj profesioj...

Dum ŝi parolis, mi ekpensis, ke la ideo pri eldonado de la gazeto estis veninta en la kapon de mia heroo Vasko en iu simila momento. Cu la kameraisto jam filmis nin?

Sinjorino Koleva etendis la manon al niaj notlibretoj. Ni ĉiuj silentiĝis. Disdonante ilin ŝi diris al ĉiu kelkajn afablajn vortojn.

— Jen, Velizar — etendante al mi la notlibreton ŝi diris kaj karesis mian kapon. — Malgraŭ, ke vi kaj viaj amikoj estas okupitaj pri tia grava laboro, vi ne postrestis en la lernado kaj montris tre bonan sukceson.

Sincere dirite, mi ne atendis vidi tiom da bonaj notoj en mia notlibreto. Eĉ pri pentrarto mi havis noton „bonega”, kvankam mi tute ne povas pentri.

Kiam ĉiuj ricevis sian notlibreton, ekestis tia bruo, ke oni ne povis aŭdi unu la alian. Ĉiuj volis vidi la notlibreton de la aliaj kaj tion, kiajn notojn ili havas. En tiu momento la lumŝetoj estingiĝis. Ni estis forgesintaj ilin kaj ankaŭ la budojn en la anguloj de la klasĉambro...

Subite la klasĉambron eniris la reĝisoro. Li alpaŝis al sinjorino Koleva kaj diris ion al ŝi.

— Ĉiuj rapide en la korton! — ŝi ordonis al ni.

Kriante, ridante kaj puŝante unu la alian ni ekkuris tra la koridoroj.

Ĉe la elirejo nin renkontis unu el la asistantoj-kameraistoj kun malgranda kamerao enmane. Tuj kiam ni aperis, la kamerao ekzumis.

— Hurraaa! ... — ekkriis Tonĉo. — Ankaŭ ni estiĝis kinoaktoroj!

Satpetolinte en la korto mi revenis al mia patrino, kiu staris ĉe la pordo kaj interparolis kun la reĝisoro k-do Rankov.

— He, Velizar, kiam ni vidos nin en la filmo sur la ekrano? — demandis min Tonĉo.

— Mi ne scias, sed kiam la filmo estos preta, mi nepre diros al vi.

— Ne forgesu! Ĉu vi iros al la pionira feriejo?

— Certe ne! La filmo ankoraŭ ne estas finfarita... Nur kiam ni finos la laboron, mi iros kun miaj gepatroj al la maro, al la rivero Ropotamo! ...

— Ĉu ne estos malfrue? !

— Mi ne scias... Mi jam diris al vi — kiam la filmo estos preta, mi nepre sciigos al vi! ...

Kamarado Rankov energie manpremis min:

— Brave, Velizar! Ĝis revido kaj ne forgesu, ke morgaŭ estos la naskiĝtago de Verka. Ni ĉiuj estas invititaj gastoj ĉe ŝi.

Kiam ni revenis hejmen, mia frateto Vladi kuris al mi kaj prenis el miaj manoj la notlibreton.

— Ha, kiom da bonegaj notoj! — li ekkriis. — Ĉu vi vere meritis ilin?

— Kompreneble, li meritis ilin! — reagis severe panjo. — Tre obstine li lernis! Nu, tuj donu al mi la notlibreton!

Mia patro longe trarigardis kaj legis ĝin, poste iris al sia labortablo kaj elprenis el la tirkesto kartonskatolon kaj etendis ĝin al mi:

— Prenu, vi plene meritis ĝin! ...

— Ho, kia feliĉo! Fotoaparato! ... — ekkriis mi kaj ĉirkaŭprenis paĉjon kaj panjon. Mi tuj elprenis ĝin el la skatolo kaj kun admiro komencis ĝin esplori. Mi eĉ ne povis kredi, ke ankaŭ mi posedas fotoaparaton! ...

— Do, vi jam povos foti nin — emociite kaj ĝoje diris mia patro. — Nu, ni sidiĝu ĉe la tablo!

— Ankaŭ mi volas bieron! — diris mi. — Ni tintigu la glasojn kiel viroj! ...

— Bone, bone, estos ankaŭ biero — ekridis mia patro kaj malordigis mian nekombitan haron...



NI NOMAS ILIN SORĈISTOJ

Vi jam scias, ke la onklo de Vasko (la filmheroo, kies rolon mi ludis) estas ĵurnalisto.

Kaj jen venis la momento prezenti lin. En la filmo li aperas en malgranda sceno, sed ĝuste tiu ĉi sceno malkaŝis al mi iun sekreton.

... La onklo de Vasko invitis lin veturi per lia aŭtomobilo al la baraĵlago proksime de la ĉefurbo, kie ili iom veliros per vera velboato.

Dumvoje Vasko emocie rakontas al sia onklo pri la heroaĵoj de „La Aŭdacaj Plumoj” kaj ili ambaŭ bone amuziĝas pri tiu historio...

Koncize dirite, tio estas la tuta sceno.

Mi tre ekĝojis pro la agrabla perspektivo veturi per aŭtomobilo al la baraĵlago, des pli, ke nin atendis ankaŭ promenado per jaĥto. Vi povus imagi kiom mirigita mi estis, eksciinte, ke tiun ĉi scenon oni filmos... en la filmpavilono!...

— Ĉu vere oni filmos en la pavilono? — mi demandis afliktite k-don Ĉernev. — Ĉu ni ne veturos al la baraĵlago?

Por mia plej granda bedaŭro, la sceno vere estis filmita en la pavilono...

Ĉu vi memoras la aŭtomobilbudon en la pavilono antaŭ la granda ekrano? Do, oni filmis la scenon ĝuste en ĝi — en tiu ĉi modelo-dekoracio! ...




Vi mem bone komprenas, ke per simila „aŭtomobilo” neniu povas veturi, sed dum Vasko kaj lia onklo gaje interparolas en la aŭtomobilo survoje al la baraĵlago, per projekciaparato situanta malantaŭ la ekrano oni projekciis filmon, kiu prezentis pejzaĝon, filmitan desur moviĝanta aŭto... Samtempe la kameraisto nin filmadis en la aŭtomobilbudo lokita antaŭ la ekrano. De tempo al tempo oni skuettis la budon...

Tiamaniere sur la filmbendo aperas la bildo de veturanta aŭtomobilo.

Sammaniere estis filmitaj ankaŭ la „pasaĝeroj” en la modelo de vagono lokita en la pavilono.

— Venu kun mi vidi, kion faris el tiu „veturado” niaj „sorĉistoj” — diris al mi post kelkaj tagoj k-do Ĉernev.

— Pri kiaj sorĉistoj vi parolas? Ĉu vi ŝercas?



**TRI FAZOJ DE KONSTRUADO DE BATALŜIPO-MODELO
EN LA KORTO DE LA FILMA STUDIO**

— Tute ne! Oni tiel nomas la kameraistojn de kombinitaj filmbildoj. Ja ili faras ĉiujn „miraklojn” en la filmoj.

— Kiajn miraklojn?

— Ĉiajn — ankaŭ vian „veturadon per aŭtomobilo”... Ili povas fari marbatalon aŭ aviadil-atakon, kaj spektante ilin sur la ekrano, vi ne komprenas, ke la ŝipoj kaj la aviadiloj ne estas realaj. Fakte, tio estas nur malgrandaj, sed precizaj modeloj-kopioj de ŝipoj kaj aviadiloj. Pere de similaj modeloj niaj „sorĉistoj” kreas ĉion, kion oni komisiis al ili: bestojn, malaperintajn antaŭ milionoj da jaroj, flugojn per raketoj al la luno, ili detruas urbegojn, kies domoj ne estas pli grandaj ol kubetoj-ludiloj, faras aŭtomobil- kaj fervojkatastrofojn...

Versajne mia fizionomio aspektis ege mirigita, tial k-do Ĉerneŭ rapidis klarigi al mi:

— Ne miru! Cio ĉi estas tute simpla afero. Kiam ni vizitos la fakon por dekoracioj kaj modeloj, vi mem vidos, kiel el ligno, kartono kaj diversaj plastaĵoj oni ellaboras aviadilojn, ŝipojn, domojn, vagonojn, meblojn, statuojn, fruktojn kaj multajn aliajn modelojn... Pere de ili oni faras ĉiujn ĉi „miraklojn”...

La „sorĉistoj” estis tute ordinaraĵoj, kiuj afable nin renkontis. Ili multe ridis, eksciinte, kion rakontis al mi pri ili k-do Ĉerneŭ.

— Krom per modeloj, ni faras „miraklojn” ankaŭ per desegnaĵoj — ili diris al mi. — Venu kaj vidu. Ni ĵus preparas la filmadon de simila bildo.

Sur stativo, simila al fenestrokadro, estis fiksita granda platvitro. Sur ĝia supra parto estis pentrita mezepoka fortikaĵo kun embrazuroj kaj ferinkrustitaj pordegoj.

— Se ni metus tiun ĉi stavivon kun la pentraĵo antaŭ la kamerao kaj se malantaŭ ĝi troviĝus iu rokmonteto, sur la bildo aperos la monteto kun la fortikaĵo sur ĝi. La iluzio, ke ĝi estas konstruita sur tiu ĉi roko, estas absoluta...

— Ho, tio estas vera trompo!

— Jes, trompo, sed bela trompo, ĉu ne? Aliel kiel ni povus montri la fortikaĵojn de la mezepoka Târnovo, se ni mem ne kreus ilin?



**E LA MAJSTROJ DE FAJRO,
FULMOJ KAJ NEBULOJ**

Vasko estas en la fotolaboratorio en la domo de Emil. La brava fotoraportisto de ĵurnalo „Tamburo” ĵus rivelis la novajn filmbendojn kaj pendigis ilin sekiĝi.

Intertempe Vasko trarigardas fotojn faritajn de Emil dum iu veturado eksterlande kune kun liaj gepatroj.

Subite Vasko tuŝas neizolitan elektran draton. Momenta forta ekbrilo — kurta cirkvito, kaj la sparko bruligas iun el la filmbendoj. Ĝi intense brulas... La incendio ŝajnas neevitebla, sed Emil rapide ĵetas ĉifonon sur la brulantan filmobendon...

— Uf! ... Mi tiom ektimis, ke eĉ perdis la penskapablon! ... — elspiregas Vasko. — Kio povus okazi! ...

Emil serĉas ion en la mallumo. Eklumas radio de poŝlumigilo.

— Vi estis malatentema! Vi provokis kurtan cirkviton. Nun mi devas rapide ripari la elektroŝirmilon, aliel mia patro akre riproĉos min. Nu, foriru rapide, por ke li ne surprizu nin ĉi tie!

* * *

La filmado de tiu ĉi sceno daŭris nur kelkajn minutojn, sed ĝia preparo postulis multe da tempo: konstrui dekoracion de fotolaboratorio en la domo de Emil, organizi la ekbruligon de la filmbendo, kiu preskaŭ kaŭzas incendion...

Sed venis helpi aliaj „sorĉistoj”. Nun mi jam scias, ke tiuj majstroj de fajro, fulmoj kaj nebuloj estas la pireteknikistoj.

Spektante, kiel en iuj filmoj oni pafas kontraŭ homon kaj la kugloj truas lian veston aŭ kiel eksplodas obusoj, mi ĉiam demandis min kiamaniere oni tion faras. Kaj la blanka nebulo, ĉirkaŭvolvanta mondojn kaj arbarojn? Aŭ la densaj nigraj fumnuboj de incendioj, aŭ eĉ la incendioj mem? ! ...

— La pireteknikistoj faras ĉiujn eksplodojn, pafojn, incendiojn, fumon, nebulojn, kiujn vi vidis en la filmoj — diris al mi k-do Ĉernev. — „Piretekniko” estas grekdevena vorto, kiu signifas arto de fajro.

- Kaj ĉu oni ne vundas la geaktorojn, kiam oni pafas kontraŭ ilin?
- Jen tiu ĉi kolego estas piroteknikisto-specialisto, li informos vin pli detale pri ilia laboro.

La malalta ridetanta homo, kiun k-do Ĉernev prezentis al mi, estis la ĉefo de la piroteknikistoj. Li afable invitis min al ilia laboratorio. Unu el la piroteknikistoj alportis du metalajn brustŝirmilojn kun ŝelkoj tegitaj per ŝtofo.


– Ĉi tiujn metalajn ĉemizojn ni metas sub la vestoj de la aktoro kaj sur ilin ni fiksas malgrandajn eksplod-kapsulojn. Se oni devas pafi kontraŭ iun el la geaktoroj (laŭ la scenaro de la filmo), ni eksplodigas la kapsulojn pere de elektra kurento. Ili eksplodas sinsekve kaj faras impreson, ke la kugloj trafas la aktoron. Tiuj ĉi metalaj brustŝirmiloj, kiujn vi vidas, gardas ilin kontraŭ la vundiĝo.

– Kaj la incendioj, nebuloj? La eksplodoj de obusoj?

– Vi eĉ ne povas imagi, kiom da naftalino, salamoniako kaj fumpulvo ni foruzas por tiuj ĉi „magiaĵoj"! ... La sakoj kun kemiaĵoj, kiujn ni uzis nur dum la filmado de „La Herooj de Sipka" aŭ de „Fajrorebriloj super rivero Drava" apenaŭ havus sufiĉan lokon en tiu ĉi ĉambro! Ankaŭ la pafilojn kaj la kanonojn ni ŝarĝas per artefaritaj kugloj kaj obusoj. Ili ankaŭ englutas grandajn kvantojn da eksplodmaterialoj kaj kemiaĵoj...

Sed krom teruraj efektoj ni povas krei ankaŭ bonhumoron, amuzi la spektantojn: ankaŭ ĉiuj diverskoloraj raketoj, lumkaruseloj, la bengala fajro kaj ĉiuj aliaj specoj da iluminaĵoj estas nia laboro. Kaj jen estas modesta donaco de ni por via kristarbo...

En la pakaĵo, kiun la ĉefo de la piroteknikistoj enmanigis al mi, estis kelkaj pakajetoj de diverskolora bengala fajro...



**IOM RIDINDE
ESTAS VIDI VIN MEM EN FILMO!...**

En la laŭbo de nia korto denove kolektiĝis la knaboj el nia kvartalo.

Ljubĉo kaj Miŝo montris al ni la velboaton, kiun ili kune muntis en la lerneja studrondo pri ŝipmodelado. Rumen estis malpacienca:

— Kiam ni elprovos ĝin, Ljubo? Ĉu ĝi ne dronos?

Ljubĉo alrigardis lin malestime:

— Ke ĝi dronu? Vi eĉ ideon ne havas pri velboatoj! ... Ĉu vi ne vidas, kian solidan kilon ĝi havas? Kaj per tiuj veloj ĝi simple flugos — nur estu vento! ...

— Nu, ne fanfaronu tiom, mi vidos ĝin sur la lago! — Ĉavdar enmiksiĝis. — Ja mi estis atestanto, ke dum konkuro per similaj modeloj nur kelkaj el ili eltenis la elprovaĉon.

— Unue vidu kaj poste parolu! — Ljubĉo ofendiĝis. — Vi ĉiam ĉion scias! ...

— Nu, ĉesu kvereli! — ankaŭ mi enmiksiĝis. — Se ni iros al la lago, ni jam ekiru.

— Velizar! Venu al la telefono! ... — ekkriis tra la fenestro mia patrino.

— Mi tuj revenos. Ne ekiru sen mi!

— Oni serĉas vin el la Kinocentro — diris al mi panjo.

— Halo? ...

— Velizar... — aŭdigis sin la muntaĝistino onklino Pepa. — Kamarado Ĉernev petis min telefoni al vi, ke ĉi-matene ni spektu la filmbendon jam rivelitan. Momente la ofica aŭto ne estas je nia dispono kaj vi devas veni per aŭtobuso. Tuj ekiru, ĉar ne estas multe da tempo!

— Al diablo! Ĉu ĝuste nun oni devis elpensi tiun provprojekciadon? ! ...

— Ne murmuru! — diris mia patrino severe. — La projekciado estas pli grava ol la velboato de Ljubĉo! Alian fojon vi iros al la lago. Preparu vin rapide kaj intertempe mi mendos taksion...

Mi kliniĝis tra la fenestro kaj fajfis al la knaboj.

— Oni vokasmin el la Kinocentro...

— Ĉiam tiu via filmo! ... — Ĉavdar koleriĝis. — Ĉu vi jam ne finos ĝin? ! ...

— Restis jam malmulte...

— Kiam vi revenos?

- Tion mi ne scias akurate... Eble posttagmeze.
- Do, bone. Reveninte, anoncu vin. Ni ekiras. Ĝis revido! ...

* * *

Mi rapide elsaltis el la taksio kaj ekkuris al la enirejo de la Kinocentro. Apenaŭ mi ne kunpuŝiĝis kun la scenara skribistino.

- Ĉu mi ne malfruiĝis? – mi demandis ŝin anhelante.
- Ankoraŭ ne. Ni komencos post kelkaj minutoj.

En la kinosalono jam estis preskaŭ ĉiuj anoj de la filmskipo. Tie ĉi estis ankaŭ la knaboj el la „Hipodromo”. Mi rapide sidiĝis apud Slavi, kiu rezervis por mi lokon.

- Kial vi tiom malfruiĝis?
- Ĉar ne tuj venis la taksio... Ba, se vi scius kie mi povus esti nun! ...
- Kie?

– Ĉe la lago en la urba parko. La knaboj el nia kvartalo konstruis modelon de velboato. Unika afero! Vi eĉ ne povas imagi! ... Mi devus ĝin elprovi, sed pro la projekciado mi ne povis iri kun ili...

- Ĉu ĝi estas granda?
- Ne tre granda. Jen tiom granda ĝi estas – mi disetendis miajn brakojn. – Ĉirkaŭ unu metron longa, sed kun du mastoj.

- Ĉu la sekvan fojon ankaŭ ni povus veni? – Toŝko enmiksiĝis.
- Fakte, mi ne scias, kiam ni denove iros...

En tiu momento la salonon eniris la reĝisoro kaj la ĉefkameraisto.

- Ĉu vi ĉiuj estas ĉi tie? Ĉu ne mankas iu el niaj ĵurnalistoj? – kamarado Rankov ŝerce okulsignis al ni.

- Do, ni komencu!

Li sidiĝis ĉe la labortablo kaj prenis la telefonaŭdilon.

— Dosev, vi povas komenci! — li ordonis al la projekciisto.

La lumo estingiĝis en la salono. Ni ĉiuj eksilentis, atendante la aperon de la bildo sur la ekrano.

Unue, je unusekunda intervalo, ekviciĝis la ciferoj 5, 4, 3, 2, 1, kaj tiam aperis la klakilo kun la tabulo, sur kiu estis notite I, 24/83. Tio signifis, ke ni spektos la unuan „dublon” de bildo 24-a el 83-a sceno de nia filmo. Momenton post tio aperis la bildo mem — la sceno, en kiu „La Aŭdacaj Plumoj” preparas la „specialan” numeron de la gazeto „Tamburo”.

La tuta redakcia stabo kolektiĝis en la subtegmento kaj la subtegmento aspektis tre bone! Ne-niu supozus, ke tio estas dekoracio, filmita en pavilono! ...

Ĉiuj atente rigardis kaj aŭskultis min. Mi mansvingis kaj vigle rakontis ion. Miaj okuloj brilis malantaŭ la okulvitroj kaj mi per nervoza gesto alĝustigis ilin sur la nazo...

Mi eĉ ne povis kredi, ke tiu ĉi knabo sur la ekrano estas mi! Tiom strange estas vidi vin mem en filmo — ja oni kutime ne scias, kiel oni aspektas dum la filmado. Kvazaŭ mi observus iun alian knabon, sed ne min mem! ...

Fakte ni spektis silentan filmon, ĉar sur la sonstreko ankoraŭ ne estis registritaj sonoj kaj parolo.

... La pordo de la subtegmento malfermiĝis kaj ni ĉiuj amasiĝis ĉirkaŭ Emil, kiu portis grandan koverton. Li triumfe svingis ĝin kaj kriis ion. Ni iris al la tablo kaj kliniĝis super la fotoj, kiujn nia fotoraportisto ĵus alportis. La sekvan tagon ili devis provoki novajn emociojn en la kvartalo kaj denove glorigi „La Aŭdacajn Plumojn”. Emil bonege plenumis sian taskon: ĉiu momento el la atako de la krimuloj kaj el la prirabado de la mopedo estis fotita! ...

Nun oni devis verki la tekston, eltranĉi la necesajn literojn kaj glui ilin kune kun la fotoj. Ni ĉiuj kune estis farontaj tiun ĉi laboron...

Dum la projekciado ni senĉese ridegis.

— Silenton, mi petas! — oni aŭdis la voĉon de la reĝisoro en la malluma salono.

Sed ni povis nur pene deteni nian ridon...



STUDIA PROJEKCISALONO

Tiun ĉi scenon oni projekciis kelkfoje kaj ni malkovris ĉiufoje ion novan kaj malsaman. Mi memoris, ke oni filmis ĝin kvar-kvin foje. Ĉe la kelkobla filmado de la apartaj momentoj ĉiu el la variaĵoj estas nomata „dublo” kaj nun la reĝisoro deziris elekti la plej taŭgan el ili por la estonta filmo. Ni aŭdis lin flustre interparoli kun la ĉefkameraisto – verŝajne dum la projekciado ili konsiliĝis inter si, kiun „dublon” elekti.

En la hela cirklo de la lampo sur la labortablo onjo Pepa, la muntaĵistino, notis en sia kajero tion, kion k-do Rankov diktis al ŝi.

Post tiu sceno sur la ekrano denove aperis la klakilo, sed nun sur ĝi estis aliaj ciferoj kaj poste aperis mi kaj „miaj gepatroj” el la filmo. En tiu sceno mi klarigas al ili, kie kaj pro kio mi for-estas tiel ofte de mia hejmo kaj mi promesas al ili, ke elirante mi informos ilin, kien mi iras...

– Bonege, ĉu ne? – Slavi flustretis en mian orelon. – Sed kial vi tiel malsereniĝis? – li puŝetis min. – Ĉu vi estas malkontenta?

Fakte, ĉio estis tute natura, sed al mi ŝajnis, ke pro la rapida parolo mi iom balbutas. Mi eĉ rememoris, ke dum la filmado k-do Rankov kuraĝigis min, dirante: „Tre bone, Velizar, tre bone!. Ĉio estas natura!” Nun vidinte min sur la ekrano, mi ne estis tre kontenta, sed mi diris nenion. Eble Slavi pravis?

– Haltu por momento! – ordonis telefone la reĝisoro kaj la lampoj en la salono eklumis.

Ĉiuj ekbruis kaj ridetante rigardis unu la alian.

– Bone, ĉu ne? – diris k-do Rankov, kvazaŭ demandante ĉiun el ni. – Maria, kion vi diros? Kiu dublo plej multe plaĉas al vi?

– Al mi ŝajnas... eble la tria... – respondis iom hezite la aktorino, kiu plenumis la rolon de la patrino de Vasko.

– Mi samopinias, ankaŭ mi elektis ĝin. Kaj kion diros Velizar? Kiun dublon li elektis?

Mi konfuzite kuntiriĝis.

– Nu, kiun scenon vi elektis, Velizar?

– Mi ne estas kontenta pri mi mem... – mi murmuris tra la nazo.

– Kion vi diris?
– Mi ne estas kontenta pri mi mem... Mi estas ridinda...
– Vi estas ridinda? Nu, aŭskultu lin – li opinias, ke li estas ridinda! ... Ne, Velizar, vi ne estas ridinda. Male, vi aspektas tre bone kaj tute nature! ...

Unuan fojon mi aŭskultis la opinion de k-do Rankov pri mi kaj pri mia aktorado. Ĝis nun li eĉ unu vorton ne diris tiurilate. De tempo al tempo li eĉ riproĉis min. Mi ruĝiĝis de plezuro kaj konfuzite balbutis:

– Ĉiuj kvar dubloj estas bonaj, sed ankaŭ al mi multe plaĉas la tria...
– Bone. Se ne estas aliaj rimarkoj aŭ kontraŭdiroj, ni daŭrigu la projekciadon.

La lampoj denove estingiĝis.

Oni projekciis ankaŭ la scenon, en kiu la loĝantoj de la kvartalo haltis antaŭ la nova numero de la ĵurnalo „Tamburo”, kaj vigle komentis la prezentitajn fotojn. Tio estis tre komika sceno. Ĉiu fizionomio provokis ridon...

Mi jam al kutimiĝis rigardi min sur la ekrano. Eĉ mi ĉesis pensi, ke tio estas mi. Mi estis tre kontenta, ke la solenaĵo en la lasta tago en nia lernejo, kiun oni filmis, ankaŭ estis sukcesa. Ĉar ja estus neeble refilmi ĝin kaj ne estis certe, ĉu la bildoj estus tiel naturaj kiel ili nun estis! ...



A PAROLON HAVAS LA TONDILO

Mi kaj Slavi trinkis oranĝosukon en la bufedo de la Kinocentro.

Sajnis al mi, ke ni ĉeestas ian maskobalon. Ĉie ĉirkaŭ ni — ĉe la starbufedo kaj tabloj, estis viroj kaj virinoj vestitaj diversmaniere — en vestoj el diversaj epokoj, kun lipharoj, barboj, perukoj... kvazaŭ ili estus elirintaj el la bildoj, kiujn ni vidis en la tenejoj de vestoj kaj aliaj objektoj... Tio estis geaktoroj, kiuj sen alivestiĝi kaj forigi la ŝminkon, eluzis la paŭzon de la filmado en la malsamaj filmpavilonoj kaj venis aĉeti sandviĉon, trinki kafon aŭ oranĝosukon.

— Tiuj kun togoj kaj longaj barboj estas aktoroj el la filmo „Ezopo” kaj tiuj ĉi maristoj plenumas rolojn en la itala-bulgara filmo „La Ribeluloj el „Albatro”...

Evidente Slavi jam sukcesis informiĝi.

En tiu momento nin preterpaŝis du hitleristaj SS-oficiroj. Ili portis pletojn kun sandviĉoj kaj botelojn da biero.

— Kaj tiuj ĉi?

— Ili ludas en la filmo „En la kuŝejo de la lupoj”. La historio estas tre interesa kaj baziĝas sur realaj faktoj: kuraĝa kaj inteligenta militesploristo sukcesas penetri en la ĉefstabon de la SS-anoj kaj informi la kontraŭfaŝistajn aliancanojn pri la planoj de la hitleristoj...

— Kaj kiu li estis?

— Bulgaro.

— Bulgaro? ! ...

— Jes, bulgaro, kiu perfekte posedis la germanan lingvon kaj sub germana familia nomo atingis rangon de majoro... Majoro el SS-armeo! ...

Subite Slavi rememoris ion kaj demandis min:

— Mi eksciis, ke vi kaj k-do Ĉerneŭ kune vizitis la laboratorion por rivelado de filmbendoj. Ĝi estas verŝajne tre interesa!

— Tio okazis tute hazarde... Mi devas konfesi al vi, ke mi malmulte komprenis el ĉio, kion mi vidis. Por vi certe estus pli interese — ja vi estas spertulo pri tiuj aferoj. Oni montris al mi la aparataron, per kiu oni ĉiutage rivelas milojn da metroj de filmbendo! Kaj ĉu vi scias, ke

la unua bulgara ludfilmo estis rivelita en ŝtona trogo en iu subtegmento? ! ... Vi nepre devas vidi kiel oni nun faras ĉion ĉi kaj kiel funkcias la aparataro!

— Mi nepre vizitos la laboratorion! Interalie onjo Pepa — la muntaĵistino, promesis doni al mi iom da uzita filmbendo. Se vi volas, venu kun mi — oni montros al ni ankaŭ kiel oni muntas nian filmon.

* * *

Dum Velizar kaj Slavi sin direktas al la ĉambro de muntaĵistoj, mi volas rakonti al vi pri la muntado de filmoj, kiu estas tre grava momento en la kompleta laboro de filmokreado.

La filma muntado estas komplika procezo, dum kiu oni tiamaniere kunigas la aparte filmitajn momentojn kaj scenojn, ke finfine ili transformiĝas en kompletan filmrakonton, en filmon pretan por projekciado.

Sen la muntado de la filmitaj partoj ne estus filmrakonto, ne estus filmo, ne estus filmarto; estus nur apartaj moviĝantaj bildoj...

Per la helpo de la filmaj muntaĵistoj la apartajn epizodojn de la filmo oni muntas tiel, ke oni (laŭ laborlibro anticipe preparita de la reĝisoro) atingu laŭeble la plej fortan psikologian influon al la spektantoj, emociigu ilin pensi pri la sorto de la herooj.

La enkonduko kaj perfektigo de la filma muntado kiel teknika kaj arta rimedo en la praktiko de la filmprocezo transformis la kinematografion en arton.

Pri tio, kiom grava estas la rolo de la filmmuntado, parolas la praktiko mem: filmo kun interesa temo, sed malbone muntita, povas fariĝi teda kaj eĉ nekomprenebla por la spektantoj.

Nu, mi denove donu la parolon al Velizar por daŭrigi sian rakonton.

* * *

– Pepa, al vi venis gastoj! – kriis iu virino, kiam mi kaj Slavi frapetis sur la pordo kaj eniris la ĉambron de la filmaj muntaĵistoj.

Onjo Pepa venis renkonti nin kaj prezentis nin al sia koleginino. Ili ambaŭ estis vestitaj per blankaj manteloj, kaj sur la manoj ili havis blankajn kotonajn gantojn.

Sur la muroj de la ĉambro estis bretoj kun multaj rondformaj ladaj skatoloj, en kiuj oni konservis la filmitajn bendojn.


Onjo Pepa kondukis nin al granda matala tablo. Ambaŭflanke estis metalaj diskoj, sur kiuj estis bobenoj kun filmbendo. Ĝuste en la mezo de la tablo estis instalita malgranda ekrano kaj super ĝi – laŭtparolilo. Tio estis ia komplika aparataro.

– Sur tiu ĉi muntotablo, nomata „moviolo”, ni muntas la filmojn – diris onjo Pepa. – Jen, vidu: sur tiuj ĉi diskoj ni lokis la filmitan bendon; sur tiuj – la bendon kun registritaj parolo, sonoj, bruoj, kaj sur la ceteraj diskoj – la bendon kun muziko. Nun ni faras nur la tiel nomatan „krudan muntadon”.

La „moviolo” fakte estis malgranda portebla kinoaparataro. La muntaĵisto povas akceli, malakceli, movigi returne aŭ haltigi la maŝinon laŭ sia deziro. Onjo Pepa komencis turni ian mantenilon, mallaŭte ekzumis motoro kaj la bendo komencis rapide sin volvi de maldekstre dekstren. Sur la mallarĝa ekrano aperis la bildo. La muntaĵistino atente kontrolis la movon de la bendo. Kiam sur la ekrano aperis iaj ciferoj kaj literoj, ŝi haltigis la moviolon, tranĉis la bendon per speciala tranĉinstrumento, kiu similis al skatolo por kraĵonoj, movis la bendon, ĝis fine aperis denove literoj kaj ciferoj, ŝi ankoraŭfoje tranĉis ĝin kaj per la sama tranĉinstrumento kungluis ĝiajn randojn per speciala travidebla glubendo. La eltranĉitan parton de la filmbendo ŝi ĵetis en la tolan kurbegon, kiu estis apud la moviolo.

– Kial vi eltranĉis tiun parton de la filmbendo? – demandis ŝin Slavi.

– Ĉar la reĝisoro opinias, ke ĝuste tiu ĉi parto superflue plilongigos la scenon. Kiel vi jam vidis ĉe la laborprojekciado, unue ni elektas la plej interesajn dublojn. Poste ni kunligas la aparte filmitajn epizodojn de la filmo laŭvice – kiel estas indikite en la reĝisora scenaro. Post



LA „MOVIOLO“ FAKTE ESTAS MALGRANDA PORTEBLA KINOAPARATARO

detala trarigardo de la jam muntitaj dubloj la reĝisoro kune kun la ĉefkameraisto kaj la reĝisoro de muntado markas la malsukcesajn aŭ tro longajn scenojn en la filmo kaj poste ni aŭ mallongigas ilin, aŭ entute forigas. Tiamaniere ni atingas la deziratan longon kaj samtempe pli grandan artan valoron. Ni povas fine aserti, ke la artaj kvalitoj de ĉiu filmo multe dependas de nia laboro! La muntado ege similas al la infana ludo per kubetoj: post ilia ĝusta ordigo oni povas vidi la tutan bildon. Tiel ankaŭ ĉe ni finfine estos preta la tuta filmo, kies longo estos proksimume 2300 metroj.

La fizionomio de Slavi esprimis grandan miron.

— Sed tio estas pli ol du kilometroj! ...

— Sed tio estas pli ol du kilometroj! ...

— Jes ja, ĝuste tiom! ...

— Kiom multe da filmbendo!

— Tio estas la longo de la jam tute preta filmo. Dum la filmado tamen oni uzas kvin-sesoble kaj eĉ pli da filmbendo.

— Alivorte la filmbendo, uzita por nia filmo, estas tiom longa, kiom estas la distanco de ĉi tie ĝis la urbo! — mi diris.

— Jes, proksimume...

— Versajne ĉio ĉi estas tre multekosta? — demandis Slavi.


— Jes, tre multekosta — respondis la kolemino de onjo Pepa. — Plenlonga ludfilmo kostas kelkcentmil levojn. Nu, imagu nur, kiom da filmbendo, kiom da homoj kaj diversspeca tekniko estas necesaj por la filmado de nur unusola filmo! Tial nia laboro estas tre respondeca.

— Onjo Pepa, ĉu vi donos al ni ne plu uzeblajn eltranĉaĵojn de la filmbendo? — demandis Slavi, kaptinte mian rigardon.

— El tiuj eltranĉaĵoj ne estas eble, ĉar ni ankoraŭ ne finis la muntadon, sed mi donos al vi filmbendon, kiu restis el aliaj filmoj.

Onjo Pepa donis al ni ĉiuj po unu malgranda bobeno da filmbendo.

- Jen, prenu ilin kaj silentu, ĉar oni min riproĉos pro tio! ...
- Ni kore dankas al vi, onjo Pepa – ni diris unuvoĉe. – Ĝis revido!
- En la koridoro Slavi puŝis min per ŝultro:
- Mi havas ideon: en mia domo estas iu knabo, kiu posedas amatoran projekciaparaton. Ni povus projekcii al la infanoj tiun ĉi filmbendon.
- Bonege! Mi donos al vi ankaŭ mian bendon! Ĉu vi konsentas?
- Kondiĉe, ke vi prenos min, kiam vi iros al la lago kun la velboato...
- Kompreneble! Mi estas certa, ke Ljubĉo konsentos.
- Kaj ni kuris tra la koridoro.





“ SILENTON! SON REGISTRADO!... ”

Mia patrino sendis min aĉeti legomojn. Kvankam la plenŝtopita reto estis sufiĉe peza, tamen venante hejmen, mi haltis antaŭ la afiŝoj anoncantaj pri la sekva futbalmaĉo inter la teamoj de „Lokomotivo” kaj „Dinamo”.

„Mi plezure ĉeestus tiun ĉi matĉon! ...” — mi pensis. — Kiu estos la venkinto? ! ... Bone, ke mi spektas matĉojn en la televidilo, aliel mi eĉ forgesus, kiel aspektas la futbalstadiono! ...”

— Velizar, lavu la manojn kaj kombu vin, ĉar venis iu ĵurnalisto — panjo diris al mi, kiam mi donis al ŝi la reton kun la aĉetaĵoj. — Li deziras paroli kun vi.

— Kia ĵurnalisto?

— Mi ne konas lin... Vi vidos...

Sur la kanapo en la gastĉambro sidis juna simpatia viro.

— Bonan tagon — mi lin salutis.

— Bonan tagon, Velizar — respondis la ĵurnalisto kaj etendis al mi sian manon. — Ni fakte estas „kolegoj”, ĉu ne? Mi laboras ĉe la ĵurnalo „Popola Junularo”, kaj mi venis al vi laŭ la peto de niaj junaj legantoj por interparoli pri la filmo kaj pri via partopreno en ĝi.

— Mi konsentas, sed ĝuste pri kio? ...

— Momenton — diris la ĵurnalisto, kaj li rapide funkciigis la magnetofonon kaj kuraĝige ridetis. — Mi esperas, ke vi jam estas kutimiĝinta al simila aparataro kaj ĝi ne ĝenos vin — diris la gasto. — Unue rakontu al mi, kiel oni elektis vin ludi en la filmo...

Mi komencis rakonti la samon, kion mi rakontis ankaŭ al vi jam en la komenco: kiel oni unue fotis min en la lerneja korto kaj pri la provfilmo en la Kinocentro...

— Kaj kiel reagis viaj gepatroj?

— Komence mia patro ne estis tre kontenta, sed poste kaj li, kaj mia patrino rezignis antaŭ la fakto, ke mi ludas en filmo.

— Kaj ĉu via partopreno en la filmo ne influis negative vian sukceson en la lernejo?

— Tute ne. Mi havas nur la plej altajn notojn: „tre bona” kaj „bonega”...

— Ĉu vi ne fariĝis tro fiera?

— Kial fieri? Ankaŭ tio ĉi estas laboro, sed iom pli speciala kaj sufiĉe laciga: oni jen devas


partopreni filmadon, jen provludojn... Kaj post kelkaj tagoj ni komencos la sonigon de la filmo... Eĉ futbalmatĉon mi ne povas ĉeesti! ...

- Kiel vi sentas vin en la rolo de ĵurnalisto – de ĉefredaktoro?
- Bonege! Ja mi emas kritiki! ...
- Kaj kiel rilatas al vi la reĝisoro kaj la ceteraj membroj de la filmskipo?
- Ni ĉiuj estas bonaj amikoj kaj ĉiuj multe helpas al mi.
- Kiu sceno estis la plej agrabla al vi?
- La sceno, en kiu ni kaŝe akompanas la krimulojn kaj fotas ilin...
- Kaj kiu estis la plej ridinda sceno?
- La kunveno de la kvartalanaj. Ja vi ne scias, kiom da emocioj kaŭzis niaj herooj al la loĝantoj de la kvartalo! ...
- Ĉu vi estas kontenta pri via ludo en la filmo?
- Sincere dirite – en la komenco mi estis tre malkontenta pri mi mem, sed poste alkiutimiĝis.
- Kiu estis la plej ĝoja momento por vi dum la filmado?
- Kiam oni filmis nin en la lasta lernotago, kaj kiam paĉjo donacis al mi fotoaparaton.
- Kaj kio faris al vi la plej fortan impreson en la Kinocentro?
- La laboratorio por kombinitaj bildoj. Veraj sorĉistoj estas la homoj, kiuj laboras tie! Ili faras miraklojn laŭ mendo! ...
- Do, bone... Kaj kio vi deziras fariĝi? Kinoaktoro, ĵurnalisto aŭ io alia?
- Verdire, mi ankoraŭ ne pensis pri tio... Eble... aviadisto aŭ kapitano de ŝipo... Aŭ... eble... ĵurnalisto. Via profesio plaĉas al mi! ...

Subite io ekbruis: la bendo en la kaseto finiĝis kaj la ĵurnalisto malfunkciigis la magnetofonon.

– Mi dankas al vi pro la komplezo. Kiam nia interparolo aperos en la ĵurnalo, mi nepre sendos al vi la numeron. Kaj nun mi petas vin skribi sur tiu via foto kelkajn salutvortojn al la legantoj de la ĵurnalo.

Post kelkaj tagoj la intervjuo kaj mia foto aperis en la ĵurnalo. Mia patrino ne povis trovi al si lokon pro ĝojo kaj fiero kaj montradis la ĵurnalon al ĉiuj, kiuj venis gastigi al ni...



IA UNUA INTERVJUO

– Baldaŭ ni disiĝos – diris al mi iun tagon k-do Ĉernev, renkontinte min en la Kinocentro. – Restas malmulte da laboro kaj la filmo estos preta. Post la sonigo kaj la sinkronigo de la sonoj kaj la bildoj en la filmo vi estos libera fari ĉion laŭ via plaĉo.

– Ho, tamen ne tiel baldaŭ – mi diris, pensante kiel gaje mi pasigiĝis tiujn kelkajn libertagojn. Sincere dirite mi jam vere deziris, ke la laboro pri la filmo finiĝu...

La telefonaparato en la kancelario de la filmoficejo eksonis. K-do Ĉernev prenis la aŭdilon.

– Halo? ! ... Jes, li estas ĉi tie. Ni tuj venos – li diris al iu kaj sin turnis al mi: – Nin invitas k-do Lakov – la son-inĝeniero. Baldaŭ venos via vico.

Hodiaŭ ni devis sonigi la scenon, en kiu Vasko interparolas kun siaj gepatroj.

Kiam ni proksimiĝis al la sonregistrejo, super la pordo lumis ruĝa surskribo:

**SILENTON! SONREGISTRADO!
NE ENIRU!**


Kiam la ruĝa lumsurskribo estingiĝis, ni eniris la halon. Tie jam estis la aktoro kaj la aktorino, kiuj ludis la rolojn de la gepatroj de Vasko.

Oni aŭdis la voĉon de la son-inĝeniero:

– Projekciu kelkfoje la scenon, por ke Velizar ĝin bone memorfiksus. Krome, li tralegu laŭvoĉe siajn frazojn, por ke mi kontrolu la forton de lia voĉo.

La sonregistrejo similis malgrandan kinosalonon, sed sen sidlokoj por la spektantoj. La planko estis kovrita per dika mola tapiŝo kaj la muroj estis tegitaj per veluro. Antaŭ la ekrano estis dislokitaj tri stativoj kun mikrofonoj, antaŭ kiuj devis ekstari mi kune kun „miaj gepatroj”. En la muro, situanta vidalvide al la ekrano, estis fenestro, tra kiu la sonteknikistoj, kiuj estis en la ĉambro kun la surbendiga aparataro, observis la laboron en la halo.

Sur la ekrano aperis ni triope en la domo de Vasko.



SONREGISTREJO

... La patro sidis en fotelo kaj legis gazeton. Dume la patrino preparis la manĝotablon. Vasko staris apud la tablo kaj konfuzite palpebrumis malantaŭ la okulvitroj... Lia patro ĵetis la ĵurnalon sur la plankon kaj kolere demandis lin pri io...

Super la ekrano eklumis surskribo: „KOMENCU! ”

En tiu ĉi momento la patro de Vasko devis diri:

– KIE VI ESTIS DUM LA TUTA TAGO? KIAL VI ESTAS TIOM MALPURA?

Vasko respondis al li:

– MI KAJ EMIL ARANĜAS FOTOLABORATORION. LI INSTRUOS MIN FARI FOTOJN KAJ RIVELI FILMOJN...

La patro de Vasko rediris:

– VI PREFERE LUDU EN LA PARKO, EN FREŜA AERO KAJ NE EN LA SUBTEGMENTOJ! ... KAJ ALIFOJE AVERTU NIN, KIAM VI INTENCAS ELIRI! ĈU VI KOMPRENIS?

Nun devis enmiksiĝi la patrino de Vasko:

– VI KAJ VIA EMIL ĈIAM ION ELPENSAS! MI NE ESTUS SURPRIZITA, SE VI FARUS IAN DOMAĜON. KAJ LA LECIONOJ DE ANGLA LINGVO? ĈU MI LERNOS ILIN ANSTAŬ VI? AŬ NI VANE PAGOS AL LA INSTRUISTO?

Kaj Vasko iom malĝentile respondis:

– NUN JA ESTAS FERIOJ KAJ FINFINE MI POVUS FARI KION MI VOLAS! ...

Kaj tiel – ĝis la fino de la sceno, en kiu okazis tiu malagrabra familia interparolo.

Tuj post la fino de la sceno sur la ekrano denove aperis la komencaj momentoj.

Ree mi staris apud la manĝotablo; „mia patro” severmiene demandis min pri io, mi konfuzite palpebrumis kaj ion respondis al li, kaj tiel plu, kaj tiel plu... La filmbendo kun tiu ĉi sceno estis gluita kiel ringo kaj oni povis ĝin projekcii seninterrompe – kiomfoje estis necese por la provludo kaj por la sonbendigo.

Dum ni interparolis, flanke de la ekrano intermite lumis malgranda lampo...

– La forto de la voĉo estas kontentiga – diris la son-inĝeniero, kiu estis sidanta malantaŭ la aparataro por sonbendigo.

— Kaj nun, Velizar — sin turnis al mi k-do Ĉerneŭ — bone memorfiksu la epizodon, kiam vi aperas sur la ekrano kaj la momenton, en kiu vi devas ekparoli. Atentu: ĉiuj vortoj, kiujn vi prononcos, devas koincidi kun la movoj de via buŝo sur la ekrano. Vidinte, ke proksimiĝas la momento, kiam vi devas komenci paroli, vi nombru mallaŭte ĝis tri kaj tuj komencu prononci vian replikon. Ĉu vi komprenis?

— Jes...

— Do, bone. Nun ni faru provludon. Mi petas okupi viajn lokojn kaj esti pretaj! Funkciigu la projekciaparaton! — li ordonis al la projekciisto telefone.

La ekrano lumiĝis kaj post certa tempo sur ĝi denove aperis la sama sceno. Mi estis iom ekscitita, ĉar mi timis preterlasi la momenton, en kiu mi devis komenci paroli.

... Vasko staris apud la tablo. Lia patro ion demandis de li... Unu, du, tri...

— MI KAJ EMIL ARANĜAS FOTOLABORATORION...

— Velizar, vi malfruiĝis! — kriis k-do Ĉerneŭ. — Ja mi diris al vi: tuj post kiam la patro de Vasko demandos lin kaj ĵetos la gazeton sur la plankon, vi devas komenci... Ne emociĝu kaj estu atenta! ...

Sur la ekrano denove aperis la loko, kiam mi devis komenci paroli! „Unu, du, tri...” — nombris mi mallaŭte...

— MI KAJ EMIL ARANĜAS FOTOLABORATORION...

Ĉi-foje la interparolo inter ni, kiuj staris antaŭ la mikrofonoj sub la ekrano, kaj inter ni sur la ekrano, estis bonege sinkronizita...

— Tre bone! — oni aŭdis la voĉon de la soniĝeniero. — Mi petas vin iomete malsuprenigi la mikrofonaĵon de Velizar kaj k-dino Ruskova staru kelkajn centimetrojn pli malproksime de la mikrofonaĵo. Ŝia voĉo sonas tre forte. Nu, ni ripetu denove, mi petas. Atenton! ...

La sekvajn scenojn ni sukcesis sonigi pli rapide. Mi jam estis tute trankviliĝinta kaj komencis ĝustatempe paroli.

Tie ĉi mi denove enmiksiĝas en la rakonton de Velizar por aldoni iom pli pri la sonregistrado.

La sonigo de ĉiu filmo estas ĝia dua naskiĝo.

Post la filmado kaj muntado la filmo ekiras laŭ la komplika vojo de sonigo kaj sinkronigo de la bildoj kun la sono, kion oni faras en kelkaj etapoj.

Tiel, en la studio por sonregistrado unue oni surbendigas sur magnetan bendon ĉiujn bru-ejektojn. Ili devas esti sinkronaj — ĝuste koincidaj kun la bildoj sur la ekrano. Kelkaj specialistoj majstre imitas diversajn bruojn kaj sonojn: se, ekzemple, sur la ekrano vento balancas la branĉojn de l' arboj, en la studio iu el la specialistoj de bruoj pasigas sian manon sur sekfolian branĉeton... Aŭ li piedfrapas sur cementa bloko, metita sur la planko, por krei sur la ekrano iluzion, ke laŭ la trotuaro kune iras kelkaj personoj; aŭ li frapas permane sian femuron imitante la paŝbruon de galopanta ĉevalo... Aŭ per movoj de l' mano en bankuvo li imitas la plaŭdadon de marondoj... Vi ne povas imagi kiom da similaj ruzaĵoj oni elpensas dum la sonigo de iu filmo, pri kiuj la spektantoj eĉ ne supozas! ...


Poste venas vico de la tiel nomataj nesinkronaj efektoj, kiujn la soninĝeniero elektas en la fonoteko: ie en la malproksimo sur la ekrano pasas vagonaro, oni aŭdas patojn, la sonoradon de sonorilego, aŭ aviadilan bruon...

Per tiuj kaj multaj aliaj sonoj kaj bruoj oni pliriĉigas la bildon sur la ekrano, kreas atmosferon tre proksiman al tiu en la vera vivo.

Sur alia magnetbendo oni sonigas la scenojn, en kiuj estas fremdlingva parolo aŭ partoprenas multaj homoj: oni aŭdas la kutiman parolbruon en mitingoj aŭ la ekkriojn de la manifestaciintoj...


Kaj finfine — sur aparta magnetbendo estas fiksita la muziko por la filmo.

Ĉiuj ĉi magnetbendoj kun la surbendigitaj parolo, sonoj, bruoj kaj muziko en la fina etapo estas metitaj sur la aparaton kaj la soninĝeniero registras ilin sur unusolan magnetbendon. Tiu momento de transigo de la fonogramoj sur unusolan magnetbendon estas nomata „miksado” („Mischung” — el la germana lingvo), kaj oni realigas ĝin per speciala „Mischpult” („miks-salttabulo”).



**LABORATORIO POR RIVELADO DE JAM FILMITAJ BENDOJ KAJ ELLABORO
DE FILM KOPIOJ POR PROJEKCIADO**

Antaŭ ol atingi la spektantojn, ĉiu filmo pasas tra vico da aliaj teknikaj procezoj – kunigo de la bildoj kun la sonoj sur unusola magnetita sonbendo, ellaboro de filmkopio por projekciado, aprobo kaj akcepto de la jam pretita filmo far la Arta Konsilio ĉe la filmstudio... Longa kaj komplika vojo, kiu postulas ĉiujn konojn kaj fortostreĉojn de dekoj da specialistoj, milojn da metroj de filmbendo kaj multekostan filmaparataron.





ETEROJ DE NEKONATAJ AMIKOJ

Panjo eniris la ĉambron, en kiu dormis mi kaj mia frateto Vladi.

— Velizar, vi havas leterojn...

Mi eksaltis el la lito kaj kaptis la kovertojn el ŝiaj manoj. Neniam mi estis ricevinta kvin leterojn samtempe! ...

— Vi jam ekestas fama — panjo ridetis.

— Nu, Velizar, malfermu la kovertojn! — Vladi ekkriis. — Ni vidu, kiu skribas al vi.

Mi malfermis la unuan leteron.

„KARA VELIZAR!

SKRIBAS AL VI GELEARNANTOJ EL LA KLASO VI, A. EL LA LERNEJO „DOBRI VOJNIKOV” EL URBO ŜUMEN. NI LEGIS EN LA JURNALO „POPOLA JUNULARO” LA INTERVJUON KUN VI KAJ NI VOLAS VIN GRATULI KAJ DEZIRI AL VI SUKCESE FINI VIAN LABORON EN LA FILMO „LA AŬDACAJ PLUMOJ”.

NI TRE ŜATAS TEATRON KAJ FILMOJN KAJ NI PARTOPRENAS LA AMATORAN TEATRON TRUPON EN NIA LERNEJO. NI PETAS VIN, ESTU AFABLA KAJ DETALE INFORMU NIN, KIEL ONI ELEKTIS VIN LUDI EN LA FILMO KAJ KIEL ONI POVAS FARIĜI KINOAKTORO, ĈAR ANKAŬ NI VOLUS LUDI EN FILMO. SINCERE DEZIRAS AL VI SANON KAJ SUKCESOJN EN LA LERNADO KAJ EN LA FILMARTO.

KUN KORAJ JUNPIONIRAJ SALUTOJ! ”

— Kiel kortuŝe skribas la infanoj! Kiel ĝentilaj ili estas — panjo diris emociite. Ŝi devenas el urbo Ŝumen kaj estis ege flatita, ke mi ricevis leteron el ŝia naskiĝurbo...

La ceteraj tri leteroj estis el Sofio — same de lernantoj, kaj la kvina — el la malproksima urbeto Karnobat! ...

Ĉiuj leteroj similis unu al la alia. Oni gratulis min, volis scii, kiel fariĝi kinoaktoro, kaj ĉu

estas malfacile ludi en filmo. Ĉiuj asertis, ke ili multe ŝatas spekti filmojn kaj revas fariĝi kino-aktoroj... Ili sendis al mi siajn adresojn kaj petis min respondi al ili kiel eble plej baldaŭ...

Neion similan mi atendis! Mi ege ĝojis pro la leteroj de miaj nekonataj amikoj kaj samtempe mi pensis: se mi decidus respondi al ĉiuj, la tutan tagon mi devus dediĉi nur al tiu laboro.

— Pri kio vi enpensiĝis? — panjo demandis. — Memkompreneble, vi devas respondi al ili ĉiuj! — ŝi ekrigardis min severe: — La infanoj skribis al vi kaj vi cerbumas, ĉu respondi al ili. Vi devas rakonti al ili ĉion, kion vi lernis dum la filmado. Vi jam scias sufiĉe multe, ĉu ne? ! ...

— Nu, bone, mi nepre respondos, sed ne al ĉiuj samtempe. Post la sonigo de la filmo mi havos pli da libera tempo.

— Vi ne devas prokrasti tion. Jam hodiaŭ vi komencos respondi al la leteroj, ĉar la infanoj atendas vian respondon! ...

Nu, bone, jam hodiaŭ mi komencos respondi... Kaj kion ni havas por matenmanĝo?

— Ellitiĝu kaj vi vidos. Nu, jam estas tempo!

— Lasu nin. Jam estas ferioj, ĉu ne?

— Do, ellitiĝu, ĉar baldaŭ oni venos veturigi vin al la Kinocentro. Ĉu vi forgesis, ke ankaŭ hodiaŭ vi sonigos?

— Jes, jes, vi pravas! ... — mi ekkriis kaj saltis el la lito.

Dum mi lavis kaj vestis min, mi aŭdis mian patrinon paroli kun iu telefone. Fininte ŝi venis al mi en la kuirejon kaj komencis prepari la matenmanĝon. Ŝi estis nekutime silentema kaj enpensiĝinta.

— Kun kiu vi parolis? Ĉu estas io malagrabla?

Panjo sidiĝis kaj mi ekrigardis iom strange.


— Ankaŭ mi venos kun vi en la Kinocentron... Oni vokas min...

— Nu, panjo, ĉu io malagrabla okazis? Diru, mi petas! Ĉu tio rilatas min?

Ŝi emocie ĉirkaŭprenis min.

— Jes, temas pri vi! ... Oni invitas vin ludi en du pliaj filmoj kaj oni petas nian permeson...

- En du pliaj filmoj? ! ...
- Jes, en du pliaj filmoj! ...
- Ho, dio mia, ĉu mi iam ferios? ! ... – mi ekkriis kaj manpremis mian kapon...





**ONŜANCON, KAVALIROJ
DE „LA AŬDACAJ PLUMOJ“!...**

Hejme aperis du novaj reĝisoraj scenaroj — por la filmoj „VOJAĜANTO SEN BILETO” kaj „MALPROKSIMAJ AMIKOJ”. Miaj gepatroj donis sian konsenton, ke mi partoprenu ankaŭ en ili kaj mi paciĝis kun la fakto, ke mi ferios nur poste. Kiam finfine la filmo estis preta, mi surprizite konstatis, ke mi estis al kutimiĝinta al la atmosfero kaj homoj en la kinematografio. Mi jam havis multajn konatojn kaj amikojn inter ili. Kaj mi estis certa, ke nun por mi ĉio estos multe pli facila, ĉar mi jam multe lernis dum la laboro pri nia filmo. Tamen mi ĉiam ankoraŭ vivis kun la impresoj kaj rememoroj pri la filmado de „La Aŭdacaj Plumoj”.

Iun matenon, legante sian ĵurnalon, mia patro ridetante diris al mi:

— Jen ĉi tie oni skribas pri vi! ...

— Kie?

— Sur la lasta paĝo. Ankaŭ via foto estas presita...

Mi febre kaptis la ĵurnalon. Sur la lasta paĝo, en la malsupra dekstra angulo estis foto, sur kiu estis mi, Slavi kaj Milko dum iu el la lastaj heroaĵoj de „La Aŭdacaj Plumoj” kaj super ĝi estis skribite per grandaj literoj:

Baldaŭ sekvas la nova bulgara
larĝekrana belarta filmo

„LA AŬDACAJ PLUMOJ”

kun la partopreno de la etaj aktoroj VELIZAR NOVAKOV, SLAVĈO NIKOLOV,
MILKO PETROV, VERKA POPOVA, TODOR BIĈEV k.a.

Mi komprenis, ke la filmo jam estas preta...

Post kelkaj tagoj aperis koloraj afiŝoj pri la filmo kaj vitrinoj, en kiuj estis ekspoziciitaj fotoj el la filmo. En tramoj kaj en trolebusoj oni povis vidi malgrandajn afiŝojn kun niaj fotoj...

En ĉiuj ĵurnaloj aperis reklamoj pri la filmo.

La loĝantoj de nia kvartalo parolis pri mi kvazaŭ pri sia propra infano: „Nia Velizar! ... — ili diris.

Fine venis la tago de la solena unua projekciado.

Eĉ nun, kiam mi rememoras pri tiu tago, mi denove emociiĝas! Tiu travivaĵo similis al ekzamenado en ĉeesto de centoj da homoj...

La salono kaj la balkonoj de la granda ĉefurba kinejo estis plenplenaj de spektantoj, kiuj senpacience bruis.

En la ĉambreto malantaŭ la scenejo, feste vestitaj, estis kolektiĝintaj ĉiuj partoprenantoj de la filmado. Ĉiuj silentis, timante, ke oni povus aŭdi niajn interparolojn.

— La salono estas plenplena! — diris onjo Katja, ŝetinte rigardon de malantaŭ la kurteno.

La silento estis rompita. Mi, Slavi kaj Milko, kvazaŭ ĝuste tion atendante, tuj ekbabilis.

— Silenton, knaboj! — minacis nin per fingro k-do Rankov. — Ne parolu, ĉar oni povas nin aŭdi en la salono! ...

En la sama momento la lampoj en la salono estingiĝis. Mi sciis parkere ĉiun momenton el la filmo — ja oni jam kelkfoje estis projekciinta ĝin por ni, sed tamen, kiam mi aperis sur la ekrano, al mi ŝajnis, ke okazis io neriparebla... La filmo estis projekciata antaŭ la okuloj de centoj da homoj! ... Kaj kion ili opinios pri ni kaj pri nia aktorado? ! ...

Mi ne longe atendis respondon al tiuj miaj demandoj, ĉar ĉe ĉiu nova sceno en la salono eksplodis sincera rido... Estis ankaŭ momentoj, kiam ĉiuj silentis. „En tiuj momentoj la spektantoj sentas konsciencriproĉojn” — emis ŝerci k-do Rankov, ĉar, verdire, en tiuj momentoj la plenaĝuloj ne havis kaŭzon amuziĝi...

Kaj jen denove niaj kavaliroj de la „La Aŭdacaj Plumoj”...

Ĉirkaŭite de siaj gepatroj, parencoj kaj amikoj, ili staras antaŭ la granda, luksa aŭtobuso, kiu veturigos ilin al la marbordo — en la Internacian Junpioniran Kampadejon... Tio estas la merita rekompenco pro ilia obstina, nobla laboro...

„Bonŝancon, kavaliroj miaj! ...” — mi diris al mi mem kaj sentis iom da nostalgio...

La lampoj ree eklumis kaj en la salono eksplodis ŝtormaj aplaŭdoj. Ili longdaŭre ne ĉesis kaj ni aŭskultis ilin kvazaŭ tio estus tre agrabla melodio. Tio ja estis la laŭdo por ĉiuj niaj penoj kaj maltrankviloj. Tio estis nia sukceso! ...

Ridetante venis al ni kamarado Rankov. Li okulsignis al ni kaj ĝoje manpremis nin.


— Gratulojn al vi ĉiuj! Ĉu vi aŭdas ilin? ! ... Kaj nun — ĉiuj sur la scenejon, kiel ni anticipu interkonsentis: unue — Verka kaj Svetla, poste vi kvarope, kaj ni — post vi... Ĉu estas klare?

Kaj poste — denove aplaŭdoj, gratuloj, bukedoj, ĉirkaŭprenoj, lumo de la lumŝetoj kaj „fulmoj” de la fotoaparatoj...


Ĉio estis kortuŝa, sed mi neniam forgesos la ĝojajn larmojn en la okuloj de panjo kaj la donacon de miaj amikoj...

Manpremanante kaj gratulante min, Ljubĉo kaj Miŝo konfuzite murmuris: „Tio estas nia donaco por vi” — kaj ili enmanigis al mi grandan pakadon.

En ĝi estis velboato kun du mastoj! ...



II. PARTO



ONCIZA FILMA TERMINARO

ADAPTADO

konformigo de teatraĵo, novelo aŭ romano al surekranigo. La filma adaptado baziĝas sur la enhavo de la originala literatura verko kaj rekreas ĝiajn ĉefajn ideojn per la specifaj rimedoj de la filmarto.

Al la legantoj certe estas konataj multaj filmaj adaptaĵoj de literaturaj verkoj, ekzemple: „Milito kaj paco” kaj „Anna Karenina” de Lev Tolstoj, „Por kiu sonas la sonorilego?” kaj „Adiaŭ al la armiloj” de Ernest Hemingway, „Princo kaj almozulo” de Mark Twain, „La Sankta Dipatrino de Parizo” de Victor Hugo, „La kolero de la formikoj” de John Steinbeck kaj multaj aliaj.

ANAMORFOZO (ANAMORFOZA OPTIKO)

anamorfoza objektivo estas uzata ĉe filmado de larĝekranaj filmoj. Pere de tiu objektivo la filmitaj objektoj „mallarĝiĝas” ĝis la dimensioj de la normala 35-milimetra filmkadro. Ĉe projekciado la jam filmita bildo plilarĝiĝas per speciala anamorfoza objektivo kaj rezulte sur la ekrano aperas la larĝekrana bildo, jam konata al ni.

ANIMADO, ANIMITAJ FILMOJ (TRUKFILMOJ)

speco de filmoj, kiuj distingiĝas disde ĉiuj ceteraj filmoj laŭ la tekniko de filmado. La du ĉefaj specoj de animitaj filmoj estas la PENTRITAJ kaj PUPAJ FILMOJ.

Per la metodo de animado oni povas efektivi la plej diversajn filmtrukojn — montri sur la ekrano dancantan seĝon, marŝantajn alumetskatolojn, vivigi kaj movigi — laŭ la fantazio de la aŭtoroj — ĉiajn senmovajn objektojn.

BIOGRAFIA FILMO

speco de ludfilmo, kies temo estas la vivo kaj agado de iu eminenta persono. En la historio de la monda filmarto ekzistas centoj da biografiaj filmoj, kiuj rekreas la vivon de eminentuloj el diversaj landoj. Estas vaste konataj la filmoj „Napoleon”, „Louis Pasteur”, „Emile Zola”, „Dr. Semmelweis”, „Petro I”, „La privata vivo de Henry VIII”, „La junaĝo de Chopin” ktp.

BIOSKOPO

malnova nomo de la kinematografo el la periodo de la „silenta filmo”.

„Bioskopo” estis nomita la projekciatoro, produktata de la franca firmao „Gaumont”, diference de la „biografo” – la kamerao.

Luj el la unuaj kinoteatroj same estis nomitaj „Bioskopo” („Grand Bioskope Electrique” ktp.).

BLENDO

per tiu termino oni nomas grandajn rektangulajn platojn, tegitajn per staniolo, kiujn oni uzas kiel reflektorojn de la suna aŭ artefarita lumo dum filmado (plej ofte sub libera ĉielo) por direkti la lumon sur la filmatan objekton. Blendoj povas esti ankaŭ el metalo aŭ blanka tolo – depende de la karaktero de la filmataj objektoj kaj de la necesa lumo.

BOBENO

cilindroforma metala aŭ plasta dika volvaĵo de projekciota filmo ĉ. 300 m, sur kiu oni volvas diversformatan – 8 mm, 16 mm, 35 mm, 70 mm-filmbendojn.

CINÉMA-VÉRITÉ

(el franca lingvo, laŭvorte: „KINO-VERO”). Moderna belarta tendenco kaj metodo en la dokumenta filmo, aplikata ankaŭ en multaj ludfilmoj. „Cinéma-vérité” naskiĝis en Francio en la kvindekaj jaroj kaj rapide akiris multajn adeptojn inter la filmagantoj.

La filmistoj-adeptoj de „Cinéma-vérité” montradis sur la ekrano homojn, kiuj parolis senpere antaŭ la kamerao pri siaj problemoj, klopodoj, konfliktoj, opinioj kaj aferoj (ofte tre intimaj). Similaj filmoj, faritaj laŭ la metodo de „Cinéma-vérité”, fakte prezentas siaspecan sociologian enketon. Tre ofte interparoloj, eldiroj kaj reagoj de homoj, prezentataj sur la ekrano, estis filmataj per kaŝita kamerao, kio kontribuas al la psikologia vereco de la filmo kaj al ĝia psikologia influo sur la spektantoj.

La metodoj de „Cinéma-vérité” estiĝis parto de la belarta „arsenalo” de la nuntempa kinematografio.

„CINERAMA” (KINORAMO)

specifa kategorio de panoramaj filmoj, projekciataj sur ekskluzive granda kaj larĝa ekrano, per tri sinkrone funkciantaj projekciatoroj. La tri bildoj sur la ekrano kuniĝas tiel precize, ke la spektantoj havas la impreson pri ununura grandega larĝa panorama bildo, kiu provokas forte emociajn impresojn. La sonigo de simila kategorio de filmoj estas plene stereofonia (vd: „stereofonio”).

„CIRKORAMO” („CIRCARAMA”)

alivorte, tiel nomata KINOPANORAMO, specifa kategorio de panoramaj filmoj (larĝekranaj), projekciataj sur la interna parto de rondforma ekrano en rondforma salono. Tiun kategorion de filmoj oni nomas ankaŭ „KINOMIRAKLO” (angle „CINEMIRACLE”). Tiun teknikan eksperimenton oni prezentis unuafoje en 1958 dum „EXPO '58” (INTERNACIA EKSPozICIO) en Bruselo, Belgio. La filmprogramon de „Kinomiraklo” oni projekcias per kelkaj sinkrone funkciantaj projekciatoroj, instalitaj unu kontraŭ la alia en la rondforma salono.

DEKORACIO (FILMA)

fono ĉe filmado. Ordinare la dekoracioj prezentas la internon de ĉambro, koridoro, vagonaro, aŭtobuso... Oni ellaboras la dekoraciojn el malmultekostaj materialoj: ligno, kartono, krucplakaĵo k.a. Ofte anstataŭ artefaritaj muroj aŭ ĉambrointerno, pejzaĝoj, videblaj tra la fenestro ktp. oni uzas kiel dekoracio grandegajn fotojn, kiuj aspektas sur la ekrano tute nature kaj reale. Oni konstruas kaj utiligas filmdekoraciojn ne nur en la filmstudioj, sed ankaŭ ĉe filmado sub libera ĉielo. Similaj dekoracioj povas prezenti vilaĝon, defendturojn de kastelo ktp. Ĉe filmado sub libera ĉielo oni uzas aŭ la naturan sunlumon aŭ lumĵetilojn.

DETALO

plej proksima filma plano: la plej proksima de la objektivo de la filmkamerao (respektive — de la okuloj de spektantoj), kiu altiras la atenton al iu ege grava detalaĵo en la filma kadro. Detalo povas esti, ekzemple: fragmento de la vizaĝo de aktoro (okuloj, buŝo) aŭ dekoracio (la truo de seruro k.a.). (Vd: plano).

DIAFRAGMO

speciala metala plateto kun aperturo (ofte alĝustigebla) en la centro, kiun oni intermetas en la vojon de la lumgarbo por limigi ĝin. La diafragmo estas muntita en la objektivaj de la foto-aparatoj aŭ filmkameraoj, per kiu oni akiras kontraston („akrecon”) de la bildo sur la filmbendo, t.e. oni pliiĝas la alfluon de lumoj sur la lumsentivan tavolon, por ricevi „klarecon” de la bildo en tiuj partoj de la kadro, sur kiuj oni deziras akcenti.

Oni efektivas tion helpe de speciala kadro sur la nabringo de la objektivo, per kiu oni mezuras la dimension de la aperturo de la difragmo: 2,8; 3,5; 4,5; 5,6; 11; 16; 21 ktp.

DIALOGO

interparolo inter la aktoroj en filmo aŭ televid-spektaklo. Dank’ al la dialogo oni pli bone ek-konas la heroojn de la filmo, iliajn pensmanieron kaj mondkoncepton, intencojn ktp. La dialogo estas anticipe verkita en la filma scenaro, sed la reĝisoro laŭbezone, kun la permeso de la scenaristo, povas ilin ŝanĝi dum la filmado.

DIFUZILO („RETO”)

lumfiltrilo farita el delikata reto aŭ tolo, kiu servas por malpliintensigo (difuzo) de la lumoj. Laŭbezone dum la filmado oni instalas ĝin antaŭ la lumjetilo.

DOKUMENTA FILMO

speco de filmo, en kiu ne partoprenas aktoroj kaj ne estas prezentitaj elpensitaj eventoj kaj figuroj. Oni kreas la dokumentajn filmojn surbaze de realaj eventoj kaj en lokoj, kie la eventoj okazas kun partopreno de konkretaj personoj. Cetere, la dokumenta filmo estas antaŭ ĉio speco de filma raporto en la plej vasta senco de tiu nocio, rakonto pri realaj faktoj kaj homoj. Ekzemple pri la surgrimpado de Montopinto Everest aŭ pri la preparlaboroj por elpafado de kosma ŝipo kun kosmonaŭto estis temo de interesaj dokumentaj filmoj. Do, la valoro de dokumenta filmo estas en ĉies aŭtentikeco; ĝi konigas al la spektantoj diversajn faktojn kaj sciojn, faras ilin atestantoj de diversaj eventoj, okazintaj en malproksimaj partoj de la Terglobo.

Estas kazoj, kiam la reĝisoro de iu dokumenta filmo, por akiri pli grandan aŭtentikecon, efektivas la tiel nomatan „restarigon” de eventoj, okazintaj antaŭ longa tempo, en aŭtentikaj lokoj kaj kun vivaj partoprenantoj.

DUBLANTO

1. Aktoro, kiu anstataŭas alian aktoron (plenumanton) en la filmo aŭ televid-spektaklo.
2. Persono, kiu anstataŭas iun aktoron aŭ aktorinon dum la filmado de scenoj (precipe danĝeraj), kiuj postulas de ili kapablojn, kiujn ili ne posedas: rajdi nedresitan ĉevalon, plenumi riskoplenajn saltojn, akcidenti per aŭtomobilo k.a. La dublanto devas simili laŭ vizaĝo kaj staturato la aktoron, kiun li dublas. Ofte la dublanto partoprenas en la filmado de scenoj en pli malproksima plano pro foresto de la aktoro aŭ anstataŭas lin dum la precizigo de la lumigo por la filmado de iu konkreta sceno. („CASCADEUR” – france, „STUNTMAN” – angle).

DUBLO

dufoja aŭ kelkfoja filmado de ĉiu kadro. Realigante filmon oni ripetas kelkfoje la filmadon de ĉiu kadro, dank’ al kio ĉe la muntado de la filmo la reĝisoro-muntaĵisto havas eblecon elekti la plej bonan el ĉiuj.

EKRANO

en figura senco iuj nomas la ekranon „scenejo por filmo”. Ordinare ĝi estas blanka rektangulo kun dimensioj proporciaj al la filmkadro (24/36 mm), sur kiu oni projekcias filmojn pere de projekciaparato.

Kutime la ekranon estas el blanka poreca speciale ellaborita materialo, kiu garantias klaran bildon kaj ankaŭ pli bonan penetron de sonoj el la laŭtparolilo instalita malantaŭ ĝi.

La migrantaj kinejoj uzas malgrandformatajn transportebajn ekranojn, kiujn oni faldas aŭ ruligas en specialaj ujoj.

La evoluo de la filma tekniko postulas la inventon de novaj specoj de ekranoj: panorama (por larĝekranaj filmoj), plastika (por plastikaj tridimensiaj filmoj), cirkorama (kinorama – por

projekciado de „kino-miraklo”), polivizio (multivizio), k.a. Ekzistas ankaŭ aliaj specoj de ekranoj por projekciado de filmoj en lumigitaj salonoj, spegulekranoj kaj ekranoj por dorsa-projekciado („rearprojection” – angle, „Rückprojektion” – germane), kiam la projekciatoro estas instalita malantaŭ la ekrano.

EKSPLIKO (EXPLICATION – fr.)

enkonduka parto de la filmo, en kiu la spektanto konatiĝas kun la herooj, fariĝas atestanto de nodiĝo de la intrigo kaj ĉefaj konfliktoj de la filmo.

EMULSIO (LUMSENTIVA)

tavolo de miksaĵo de bromido kaj arĝenta jodido (malpli ofte – de arĝenta klorido aŭ de klorido kaj bromido) en gelatena solvaĵo, metita sur celuloida bendo, sur kiu fiksiĝas la filmataj (fotataj) objektoj.

EPILOGO

dramaturgie fermita lasta parto en iuj filmoj, el kiu la spektanto informiĝas pri la plua sorto de la herooj post la solvo de la bazaj konfliktoj en la filmo.

ESTETIKO (FILMESTETIKO)

scienco pri la filmarto, teorio de la filmarto. Gravan kontribuon al la filmestetiko kaj teorio havas la elstara hungara filmkritikisto kaj filmteoriisto Béla Balázs, samkiel la mondfamaj filmistoj Guido Aristarco (Italio), Rudolf Arnheim kaj Siegfried Krakauer (Germanio), Sergej Ejzenŝtejn, Vsevolod Pudovkin, Lev Kulešov (USSR) k.a.

ETUDO (FILMA)

speco de mallonga filmo, ordinare destinita por instruaj celoj. Etudojn filmas precipe komencaj filmistoj kaj studentoj el la superaj filmaj lernejoj por povi apliki la jam akiritajn sciojn kaj elmontri siajn kapablojn de artistoj kaj kreantoj. Etudojn, posedantajn altajn artkvalitojn, oni projekcias sur la ekranoj kiel memstrajn filmverkojn.

FILMA LINGVO

kiel ĉiu arto, ankaŭ la filmarto havas sian specifan lingvon.

Kvankam utiligante esprimrimedojn proprajn al aliaj artoj — teatro, muziko, arkitekturo, figura arto, k.a. — ĝia plej karakteriza trajto tamen estas la movado. Moviĝas la bildoj, moviĝas la kamerao ktp. Tio postulas aplikon ankaŭ de teknikaj kaj belartaj rimedoj, specifaj nur por la kino, kiujn oni ĝenerale nomas „filma lingvo”.

FILMOTEKO (FILMARKIVO)

filma instituto kun speciala deponejo, en kiu oni konservas negativajn kaj pozitivajn filmkopiojn de filmoj diversĝenraj, diversspecaj, diversnaciaj el diversaj periodoj de la filmarto. Ordinare ĉe la filmotekoj ekzistas ankaŭ filmmuzeoj, bibliotekoj kun specialaj filmaj eldonoj (libroj, ĵurnaloj, revuoj, scenaroj, manuskriptoj, albumoj k.a.). Ĉe la filmotekoj ekzistas ankaŭ fototekoj, en kiuj oni konservas fotojn el diversnaciaj filmoj, fotojn de geaktoroj, fotojn de afiŝoj, afiŝojn kaj aliajn reklamajn filmeldonojn kaj materialojn el diversaj epokoj.

En la mondo estas multaj filmotekoj (filmaj arkivoj), sed la plej grandaj kaj riĉenhavaj estas en Parizo, Moskvo kaj Nov-Jorko.

Antaŭ pli ol tridek jaroj — en 1938 —, estis fondita Internacia Federacio de Filmaj Arkivoj (Fédération Internationale des Archives de Films — FIAF), en kiu membras ĉiuj naciaj filmotekoj. FIAF peras la interŝanĝon de filmoj kaj filmmaterialoj inter la filmotekoj.

GRUO (MIKROFON-GRUO, „ĜIRAFO”)

speciala instalaĵo por rekta surbendigo dum filmado. En la filma ĵargono oni ŝerce nomas ĝin „ĝirafino”.

Laŭbezone sur la gru-dolio¹⁾ oni instalas specialan platformon por la kamerao, kameraisto

1) Gru-dolio — la termino estas prenita de Esperanto-Bildvortaro, preparita de s-ro R.Eichholz, Kanado.

kaj lia asistanto por ebligi pli facilan kaj larĝskalan movadon dum la filmado de amasaj kaj panoramaj scenoj.

HAPPY END (angl.) FELIĈA FINO

Pri „Happy end” (feliĉa fino) de filmo oni parolas, kiam ĝi ne estas rezulto de la natura sinsekvo de la eventoj aŭ sorto de la herooj, sed venas rezulte de iu hazardo, neatendita turniĝo de eventoj.

HISTORIO DE LA KINO

kiel ĉiuj aliaj artoj, ankaŭ la kinoarto havas sian historion — eĉ tre ampleksan, ĉar ĝi inkludas ankaŭ la historion de la evoluo de la filmarto mem.

Kiel komenco de la historio de la kino oni konsideras la daton 25-a de decembro 1895, kiam en Parizo okazis la unua publika projekciado de filmo pere de la kinematografo inventita de fratoj Auguste kaj Louis Lumière. Laŭ la sama principo en ĝeneralaj linioj oni konstruas la modernan kinoaparataron.

HISTORIA FILMO

speco de filmo, kiu rekreas sur la ekrano eventojn el la pasinteco kaj la atmosferon de la epoko, en kiu ili estas okazintaj.

Jam en la unuaj jaroj de ekzistado de la kinematografo estis kreitaj historiaj filmoj, kiuj ankaŭ nuntempe vekas grandan intereson. Dank’ al la zorgema kaj kompetenta laboro de la historiistoj kaj pentristoj oni rekreas preskaŭ aŭtentike loĝlokojn, konstruaĵojn kaj ilian internon, respektive vestojn el diversaj epokoj.

„HORROP-FILM” (FILMOJ DE HORORO)

speco de filmo, ege populara en Usono, Britio, Italio, Japanio kaj en iuj aliaj landoj. La intrigo en tiuj filmoj plej ofte rekreas sur la ekrano hororajn fabelojn, legendojn aŭ rakontojn, kies herooj estas monstroj, fantomoj, timigaj estaĵoj, psikopatoj.

Unu el la plej konataj aŭtoroj de hororaj filmoj estis la usona reĝisoro Alfred Hitchcock.

IKONOGRAFIA FILMO

speco de filmo, kiu prezentas filmitajn desegnaĵojn, fotojn, dokumentojn k.a. Sur la ekrano tiuj ĉi bildoj estas senmovaj – moviĝas nur la kamerao kaj ŝanĝiĝas la lumigo.

La ikonografia filmo plej ofte rekreas, per grafikaĵoj kaj pentraĵoj, eventojn el la pasinteco aŭ prezentas la verkaron de eminentaj pentristoj.

La ikonografia filmo povas trakti ankaŭ aktualajn temojn, montrante sur la ekrano dokumentojn, kiuj komentas konkretan fakton aŭ eventon.

IKSO-RADIA (X-RADIA) FOTOGRAFAJO

fotografiaĵo de la interno de korpo (precipe de la homa korpo) aŭ de strukturo de materio (ekz. kristalo, konstrumaterialo) farita per X-radioj anstataŭ lumradioj.

„ILUSION” (ILUZIO)

unu el la malnovaj nomoj de la kinematografo en la periodo de la „silenta” filmo.

INFANA FILMO

filmo dediĉita al la plej juna publiko, al la infanoj. Similaj filmoj ĝenerale havas malkomplikatan agon kaj estas bone akceptataj kaj komprenataj de la infanpubliko. Plej ofte objekto de tiu filmspeco estas fabeloj kaj fabloj, aventuroj kaj vojaĝoj, vivo de bestoj kaj rakontoj el la vivo de la infanoj mem.

La plej karakteriza trajto de la infanaj filmoj estas la atentokapta ago kaj simpligita formo.

Ege ŝatataj de la infanoj estas la pentritaj kaj pupaj filmoj.

INSTRUA (INSTRUKCIA) FILMO

speco de scienc-populara filmo, celanta ilustri lecionojn aŭ prezentanta lecionon pri konkreta problemo el la scienco, tekniko, agrikulturo ktp.

La instrufilmo estas bonega helpilo por instruistoj kaj prelegantoj.

INTERNAJ (STUDIAJ) FILMBILDOJ

tiun nocion oni plej ofte uzas por difini bildojn faritajn en speciala filmpavilono. Internajn filmbildojn oni faras ankaŭ sub naturaj, aŭtentikaj kondiĉoj, ekz.: en la interno de muzeo, koncerta halo, kastelo, en klasĉambro ktp., uzante artefaritan lumigon (lumĵetilojn de malsama intenseco).

KADRO (KINOKADRO)

kiel belarta nocio, el la vidpunkto de la filmestetiko, „kadro” signifas kombinitan bildon, projekciitan sur la ekrano. Kiel teknika nocio, „kadro” estas ununura rektangulo („ĉelo”) de la filmbendo kun dimensioj de 24/36 mm, sur kiu estas fiksita parteto de la filmita objekto.

Ordinara projekciado de 35 mm filmo efektiviĝas per moviĝo de la filmbendo en la projekciatoro kun rapideco de 24 kadroj en sekundo. Alivorte, la spektanto de belarta filmo rigardas (en teknika senco) la projekciadon de miloj da apartaj kadroj, kiuj prezentas la tutan agon de la filmo mem.

KAMERAJO (FILMA)

aparato por filmado, kies ĉefaj partoj estas objektivo (mekanismo por movado de la filmbendo) kaj kasetoj (bobenoj). La filma kamerao estas konstruita laŭ la teknikaj principoj de la kinematografo de la fratoj Lumière.

Hodiaŭ ekzistas diversaj specoj de filmkameraoj, adaptitaj por filmado per diversdimensiaj filmbendoj: 8, 16, 35 kaj 70 mm. Depende de la karaktero de la filmado ekzistas kameraoj por subakva filmado, por rapidigita kaj malrapidigita filmado, sinkronaj kameraoj por samtempa filmado kaj sonbendigo, trukkameraoj por filmado de kombinitaj bildoj k.a.

La uzado de la eblecoj de la filma kamerao kiel rimedo de arta kreado pliriĉigis la filman estetikon kun novaj nocioj, ekz. „kaŝita kamerao”, „cinéma-vérité” („kino-vero”) k.a. Por atingi pli realisman rekreadon de la realaĵo, la filmkreantoj filmas la realaĵon sub libera ĉielo (tia, kia ĝi estas, nek plibeligante, nek korektante ĝin) per „kaŝita” kamerao.

„KAŬBOJ-FILM” („COWBOY-FILM”, „WESTERN” – angl.)

speco de filmo, kies temo ĉerpas motivojn el la vivo de la vakeroj¹⁾, kies metio estas ordinare rajde gardi la brutaron.

La „cowboy”-filmoj (filmoj pri „Sovaĝa Okcidento”) havas grandan popularecon en Usono kaj en la tuta mondo, pro ilia allogo kaj distro: dinamika ago, bataloj kontraŭ la indianoj (indigena loĝantaro de la Nord-Amerika kontinento), persekutado de la banditoj, lerta pafado ktp.

Krom la altira sensacia-aventura karaktero, la „cowboy”-filmoj havas ankaŭ certan historian signifon, ĉar la tradicioj de Usono kiel ŝtato kaj tiuj de la amerikanoj – kiel nacio, formiĝis nome en la epoko de la vakeroj („cowboys”), dum la heroa periodo de „Sovaĝa Okcidento” (The Wild West) kaj ĝia koloniigo.

KINEMATOGRAFO

filma kaj projekcia aparato por 35-milimetra filmbendo kun perforaĵo, inventita de la fratoj Auguste kaj Louis Lumière.

Antaŭloj de la kinematografo estas la „praksinoskopo”, la „fotografa pafilo”, la „kinetoskopo” k.a.

KLAKILO

(kun tabulo por la filmtitolo, sceno-numero kaj dato) ili kun simpla konstruo, konsistanta el du lignoplatoj, ligitaj en rando per malgranda vinkto, nigre kolorigitaj. Sur la malsupra parto de la klakilo la scenara-skribist(in)o skribas la titolon de la filmo, la numeron de la filmata sceno kaj la daton de la filmadotago.

Ĉe la filmado de iu sceno la scenara-skribist(in)o ekstaras antaŭ la objektivo de la kamerao kun la klakilo enmane, poste li (ŝi) rapide frapas la du malfermitajn partojn de la klakilo unu

1) „Vakero” – rajdanta gardisto de brutoj en Norda Ameriko („gaŭĉo” – en Latin-Ameriko)

sur la alia, produktante tiamaniere specialan klak-sonon, laŭtvoĉe eldiras la donitaĵojn, skribitajn sur la tabulo, kaj tuj flankeniras. Nur tiam komenciĝas la filmado de la sceno mem. Ĉio ĉi estas necesa ĉe la sinkrona muntado de la filmbildoj kun surbendigitaj voĉoj, muziko kaj bruoj.

KOLORIGITA FILMO

nigra-blanka filmo, kolorigita per kemiaĵoj en diversaj koloroj (bruna, verda, ruĝa, flava k.a.)

En la epoko de la „silenta” kinematografo multaj filmoj estis entute kolorigitaj. Oni kolorigis diverskolora apartajn scenojn depende de ilia karaktero kaj humoro, ekz.: la lirikajn scenojn oni kolorigis en roza koloro, la marajn — en blua, la batalajn (militajn) — en ruĝa koloro ktp.

Ankaŭ hodiaŭ oni aplikas kolorigon, precipe kaze de arkivaj nigraj-blankaj filmbildoj, muntitaj en kolorfilmoj.

KOPIO (FILMA)

ĝenerale dirite unu ekzemplero de la filmo, preta por projekciado. En la procezo de filmado kaj preparado de la filmo oni diferencigas: laborkopion, per kiu laboras la muntaĵistoj de la filmo, kaj projekcian kopion, preta por projekciado en la kinejoj.

KUNPRODUKTADO (CO-PRODUCTION — angl.)

filma produktado kun la partopreno de filmagantoj kaj kinoaktoroj el du aŭ pluraj landoj. Oni organizas similajn filmproduktadojn por profiti la eblecojn, kiujn disponigas la geografia situo de iu lando por filmado inter specifaj naturkondiĉoj, samkiel por unuigi la financajn kaj la teknikajn rimedojn de du aŭ pluraj kinematografiaj organizaĵoj.

Kunaj filmaj produktadoj estas organizataj jam en la komenco de ekzisto de la kinematografo.

KRONIKO (FILMA)

mallonga filmo, prezentanta aktualajn kaj gravajn eventojn el la tuta mondo; iuspeca ilustrita gazeto, kies ĉiusemajnajn numerojn oni projekcias jam dekojn da jaroj en la kinejoj antaŭ la ĉefa filmo de la programo. Ĉiu nova numero de la filma kroniko enhavas mallongajn informojn,

intervjuojn kaj raportaĵojn pri politikaj, sportaj, kulturaj, sciencaj k.a. eventoj. La objektojn por la filma kroniko filmas kameraistoj-raportistoj. Speciala redakcio kaj filmlaboratorio zorgas pri la regula preparado kaj ĉiusemajna aperigo sur la ekranoj de nova numero de la filma kroniko. En multaj landoj ekzistas specialaj studioj por filma kroniko.

LABORFOTO

raportaĵa foto, farita dum la filmado de ludfilmo (ankaŭ de aliaj specoj de filmoj). Ordinare ĝi prezentas la reĝisoron, la kameraistojn kaj iujn aliajn membrojn de la filma skipo kun parto de la filmata sceno (objekto) kaj aktoroj (personoj, bestoj, pupoj ktp.) partoprenantaj en ĝi.

„LAVENDO” (FILMAJ BENDO KAJ KOPIO)

speco de filmbendo (violkolora), kiu servas kiel „kopio-patrino”, el kiu oni reproduktas multajn novajn filmkopiojn. Oni nomas tiujn bendojn kaj kopiojn „lavendaj” pro ties viola koloro, kiu memorigas la koloron de la bonodora planto lavendo.

LUMIGO (DE LA FILMA KADRO)

teknika filmmetodo, ĉe kiu, laŭ optika vojo de absoluta mallumigo, la ekrano iom post iom heliĝas ĝis plena apero de la ekrana bildo. La „lumigo”, samkiel la „mallumigo”, ludas dramaturgian rolon en la belartaj filmoj.

LUMĴETILO

speco da lumiga instalaĵo, kiun oni uzas ĉe filmado en pavilono (pli malofte en naturaj kondiĉoj sub libera ĉielo). La lumĵetiloj estas kun elektra ampolo aŭ elektra lumarko; ili ankaŭ distingiĝas per sia intenseco – de 500 ĝis 5 kaj 10 miloj da vattoj.

MALLUMIGO (DE LA FILMA KADRO)

teknika filmefekto: iom post ioma mallumigo de la filma kadro ĝis la absoluta malapero de la bildo sur la ekrano por krei impreson pri tempopaso inter du sinsekvaj scenoj en la filmo.

MALRAPIDIGITAJ (FILMBILDOJ)

filmbildoj, kiuj montras sur la ekrano iun movon pli malrapida ol ĝi fakte estas. Anstataŭ la kutima rapideco por normala filmo — 24 kadroj en sekundo, oni filmas la „malrapidigitajn” bildojn kun pli granda rapideco, ekz.: kun 48, 56, 120, 240 ktp. kadroj en sekundo. Ĉe ilia projekciado sur la ekrano kun normala rapideco — 24 kadroj en sekundo, la spektanto havas la eblecon observi la malrapidigitan movon en ĉiuj ĝiaj etapoj, ekz.: la falon de vitra glaso sur la plankon kaj ĝian rompiĝon; galopantan ĉevalon, apartajn momentojn el la ludo de futbalistoj ktp.

MALSINKRONIGO

malĉoinkido, diferenco de bildo kaj sono sur la ekrano — plej ofte en la okazoj, kiam la movoj de la lipoj ne ĉoinkidas laŭ tempo kun la vortoj, prononcataj de la aktoro.

MIKSADO („MISCHUNG” — germ.)

teknika metodo de mikrado — sur ununura magneta bendo — de voĉoj, muziko kaj bruefektoj pere de speciala aparataro (mikstabulo).

MODELO (FIGURA MODELO)

multoble malgrandigita dekoracio, kiun oni uzas ĉe filmado de kombinitaj filmbildoj. Tiuj ĉi modeloj povas esti malgrandigitaj kopioj de konstruaĵoj, ŝipoj, loĝlokoj k.a. Ĉe filmado kun similaj dekoracioj oni aplikas la principojn de la perspektivo depende de ilia proksimeco al la objektivo de la kamero.

MUNTAĴO (SONA)

pere de la mikrado oni efektivigas la tiel nomatan „son-muntaĵon” de la filmo, t.e. la surbendigon de ĉiuj sonkomponentoj sur ununura filmbendo kune kun la bildoj.

MUNTAĴO (FILMA)

la kapablo kunigi laŭ interesa kaj logika maniero la aparte filmitajn epizodojn kaj scenojn

de iu filmo. La muntado estas siaspeca esprimo de la filma lingvo kaj vidigas la koncepton de la reĝisoro pri la disvolviĝo de la filma ago kaj pri la kunigo de la apartaj scenoj en unu artan tuton.

NEGATIVO

la jam filmita bendo, pere de film- aŭ fotokamerao, de kiu, post ĝia revelo per specialaj kemi-aĵoj en la film(foto)laboratorio, oni preparas la pozitivan kopion, taŭgan por projekciado (demonstro).

NOVELO (FILMA)

mallonga belarta ludfilmo.

NOVREALISMA FILMO

tipa filmo de la tiel nomata „novrealismo” — belarta tendenco, manifestiĝinta plenforte en Italio en la unuaj jaroj post la dua mondmilito. Tiuj filmoj rakontas pri la ĉiutagaj problemoj, konfliktoj kaj dramoj de ordinaraj homoj. Dank’ al la riĉeco de la observoj, sociologia kaj psikologia traktado de la realeco, tiuj filmoj atingas gravajn kaj grandajn ĝeneralaĵojn. La plimulto el la novrealismaj filmoj estis progresema kaj kritike prezentis realaĵojn el la vivo en Italio tiutempe.

La kreantojn de la itala novrealisma tendenco sekvis multaj filmistoj el aliaj landoj. En iliaj filmoj ofte partoprenis malmulte konataj geaktoroj aŭ statistikoj (figurantoj) engaĝitaj sur la strato. La ago de tiuj filmoj ofte disvolviĝas en naturaj kondiĉoj: aŭtentikaj urboj, stratoj, domoj. Al la novrealisma tendenco en la filmarto grave kontribuis precipe du eminentaj italaj filmkreantoj — la scenaristo Cesare Zavattini kaj la reĝisoro Roberto Rossellini. Iliaj adeptoj estis la famaj italaj reĝisoroj Vittorio de Sica, Luchino Visconti kaj Giuseppe de Santis.

OBJEKTIVO

unu el la plej gravaj detaloj de la film- kaj televidkameraoj. Ĝi konsistas el kelkaj kungluitaj diversformaj lensoj, tra kiuj penetras la bildo de la filmata objekto kaj fiksiĝas sur la lumsentivan foto- aŭ filmbendon.

PANORAMO

movado de la kamerao ĉirkaŭ sia akso dum la filmado, ĉe kio la distanco ĝis la filmata objekto ne ŝanĝiĝas.

PERFORAĴO (TRUETARO) UNUFLANKA, AMBAŬFLANKA

serio de maŝinfaritaj truetoj je egalaj distancoj sur unu aŭ ambaŭ flankoj (maldekstra kaj dekstra) de la filmbendo, pere de kiuj dentita rado realigas ĝian movadon en la filmkamerao aŭ projekciatoro. Ĉe diverslarĝaj filmbendoj (8, 16, 35 mm ktp.) la truetoj estas variaj laŭ siaj nombro en kadro kaj situo sur la filmbendo – unuflankaj kaj ambaŭflankaj.

PIROTEKNIKISTO

specialisto pri diversspecaj efektoj de incendioj, eksplodoj, pafado, fumigado k.a.

PLANOJ (FILMAJ)

tiu ĉi nocio en la filma terminaro havas du malsamajn signifojn.

La unua signifo indikas la lokon, kie oni realigas filmadon – „sur la plano”, t.e. en la filmstudio, ekstere – sub libera ĉielo aŭ en iu ejo.

La dua signifo rilatas la filmbildon, ties dimensiojn kaj aspekton. Tiurilate oni diferencigas: „ĝenerala plano”, „meza plano”, („amerika”), „proksima plano”, „ege proksima plano” („detalo”).

1. La ĝenerala plano entenas homojn aŭ objektojn kaj la ĉirkaŭan medion aŭ naturon filmitan kune kun ili.
2. La meza plano entenas homon aŭ grupon da homoj (kune kun la ĉirkaŭa medio) filmitajn ĝis la genuoj. Similan planon oni nomas ankaŭ amerika.
3. La proksima plano montras vizaĝojn, korpopartojn aŭ objektojn filmitajn de tre proksime.
4. La ege proksima plano (detalo) montras detalon de iu korpoparto aŭ vizaĝo de homoj, bestoj, birdoj aŭ detalon de iu objekto.

PLASTIKA FILMO

speco de tridimensia filmo, kies bildoj posedas ne nur larĝecon kaj altecon, sed ankaŭ profundecon. (STEREO-FILMO).

POSTSINKRONIGO

surbendigo de voĉoj, bruoj kaj muziko en speciala tonstudio. Oni faras postsinkronigon de jam filmitaj scenoj el iu belarta filmo en kazoj, kiam dum la filmado la kondiĉoj ne estis favoraj por sinkronaj filmbildoj.

POZITIVO

filmbendo, kopiita de la negativa filmbendo (nigra-blanka aŭ kolora) post la koncerna rivelado en filmlaboratorio, preta por projekciado en la kinejoj.

PROJEKCIATORO

speciala aparato por projekciado de diversspecaj filmoj (8, 16, 35, 70 mm), konstruita surbaze de la teknikaj principoj de la projekciaparato de fratoj Lumière. La ĉefaj detaloj de la projekciatoro estas la objektivo, voltarko aŭ elektra ampolo, produktantaj fortan fonton de lumo, kasetoj por filmbendo kaj mekanismo (tiel nomata „malta kruco”), kiu movas la filmbendon inter la objektivo kaj lumfonto pere de speciala dento-rado kun la rapideco de 24 kadroj en sekundo.

„REARPROJECTION” (angl.), „RÜCKPROJEKTION” (germ.) – DORSA, MALANTAŬA PROJEKCIADO

specifa filmteknika metodo, uzata precipe en filmstudioj: sur speciala ekrano kaj pere de speciala projekciatoro oni projekcias moviĝantajn objektojn aŭ diversajn pejzaĝojn. Antaŭ la ekrano troviĝas geaktoroj aŭ dekoracioj de diversspecaj veturiloj, kiujn oni filmas sur la fono de la bildoj projekciataj sur la saman ekranon. Tiamaniere sur la filmbendo oni kreas iluzion pri pri reala veturado aŭ pri agoj de la kinoaktoroj en naturaj kondiĉoj. Tiu metodo de projekciado estas unu el la trukoj ĉe filmado de belartaj filmoj kaj garantias ŝparadon de monrimedoj.

REKVIZITO

la objektoj, kiujn oni vidas sur la ekrano kaj kiuj plenumas specialan dramaturgian antaŭdestinon. Rekvizito povas esti ĉio: murhorloĝo, piano, seĝo, statueto, ŝranko k.a. Rekvizitoj estas diversspecaj kaj ilia nombro estas nelimitita. Tamen rekvizito sur la ekrano apartigas je du ĉefaj grupoj: objektoj, kiuj kompletigas la aranĝon de iu sceno, kaj objektoj, kiuj estas ligitaj kun la disvolviĝo de la ago.

RESTARIGO

belarta metodo, pere de kiu la filmisto povas rekrei eventon el la pasinteco preskaŭ aŭtentike.

En dokumentaj kaj scienc-popularaj filmoj oni ofte faras restarigon de aŭtentika situacio por atingi pli grandan realecon kaj konvinkitecon.

RETO (DIFUZILO, FILTRILO)

speco de filtrilo, farita de fina reto aŭ ŝtofo por malintensigi la lumfonton de la lumĵetiloj.

RETROIRADO (DE LA FILMA KAMERAŬ)

malproksimiĝo de la kamerao disde la filmata objekto pere de speciala puŝĉareto aŭ grudolio, sur kiu ĝi estas instalita.

RETROSPEKTADO

dramaturgie fermita parto de filmo, kiu prezentas pasintajn eventojn kaj faktojn, kutime en la formo de rememoroj, inkluditaj en la ago de la filmo.

SCENARA SKRIBIST(IN)O

helpanto de la reĝisoro, kiu notas en specialan filman taglibron ĉiujn filmitajn momentojn el iu filmo (precipe belarta), detalaĵojn de la kostumoj, ŝminko de la geaktoroj, samkiel tiujn de la dekoracioj k.a.

SCENARISTO

aŭtoro de filma scenaro.

SCENARIO

dramaturgie konstruita rakonto, kiu estas literatura bazo por la estonta filmo. La ĉefa diferenco inter la scenaro kaj la novelo estas ilia malsama destino: la novelo estas destinita por legado kaj la scenaro – por surekranigo de la ideoj kaj ago priskribitaj en ĝi.

SCENO

dramaturgie fermita parto de belarta filmo, kiu konsistas el kadroj, kies ago disvolviĝas en la samaj lokoj kaj tempo. La ordinara belarta filmo entenas de 20 ĝis 80-100 diversajn scenojn.

SILENTA („MUTA, SENPAROLA”) FILMO

ekde la invento de la kinematografo ĝis 1930 ĉiuj filmoj estis silentaj („mutaj”, „senparolaj”). Tial la ludo de la geaktoroj en la silentaj filmoj baziĝas nur sur la movoj, gestoj kaj mimiko. Ofte la projekciado de silentaj filmoj en la kinejoj estis akompanata de konvena muziko, plenumata sur piano, instalita proksime de la ekrano, aŭ estis sonigata per gramofondiskoj.

En 1930, dank’ al la inventitaj kaj aprobitaj teknikaj metodoj por sonbendigo, la „silenta” filmo ekparolis. Tio estas la dua naskiĝo de la kinematografio kaj komenco de la epoko de son- kaj parolfilmoj.

SINKRONECO (SINKRONADO)

koincido de la bildoj kun la sonoj en la filmo. Kiam parolas la geaktoroj aŭ la filma (televida) parolisto, la movo de iliaj lipoj devas koincidi kun la voĉo, kiun la spektantoj aŭskultas. Ĉe nekoincido de la movo de la lipoj kaj sono oni konstatas la tiel nomatan „malsinkroniĝon”.

STATISTO (FIGURANTO)

partoprenanto en amasaj scenoj de belarta filmo; neprofesia aktoro. Statistojn (figurantojn) oni montras en batalscenoj aŭ kiel spertantojn en teatro, kiel homamason sur stratoj, kiel demonstraciantojn ktp. Alivorte, oni uzas la statistojn kiel aktivan fonon de la geaktoroj, kiuj ludas sur la unua plano.

STEREOFONIO (STEREOFONIA FILMO)

kombinita surbendigo de sonoj kaj muziko en la filmo, reproduktitaj pere de kelkaj laŭt-paroliloj instalitaj en malsamaj lokoj de la kinosalono. Dank' al tiu teknika metodo la spektantoj de stereofonie sonigita filmo havas impreson, ke la sono moviĝas de unu al la alia parto de la ekrano kune kun la movoj kaj parolo de la aktoroj aŭ kun la diversspecaj veturiloj (aŭtoj, vagonaroj, ĉaretoj k.a.).

STEREOSKOPIA FILMO

(Vd. „Plastika filmo”) speco de tridimensia filmo, kiu kreas la iluzion pri volumeno de la objektoj sur la ekrano.

Ekzistas kelkaj metodoj de filmado, samkiel de projekciado de stereoskopiaj (plastikaj) filmoj. Ĉe projekciado de similaj filmoj oni spektas ilin aŭ per specialaj okulvitroj, aŭ rekte sur ekrano, sur kiu oni projekcias samtempe el kelkaj projekciatoroj du aŭ tri aparte filmitajn filmojn ktp. La stereoskopiaj filmoj ĉiam ankoraŭ estas nur interesa teknika eksperimento — antaŭulo de la plej moderna nuntempa metodo — „holografio”.

STUDIA SON-REGISTREJO (SON-VETURILO)

veturilo (plej ofte aŭto) kun aparataro por rekta surbendigo, uzata precipe dum filmado sub libera ĉielo; veturanta son-registrejo.

ŜMINKO (ŜMINKADO)

diversspecaj friziloj, koloraj ŝmiraĵoj, pudroj, perukoj, artefaritaj lipharoj, barboj k.a., pere de kiuj la ŝminkistoj povas ŝanĝi la eksterajn aŭ la vizaĝon de la aktoro depende de la figuro, kiun li rekreas.

TIPO (FIGURO)

ideala modelo (skizo) prezentanta la karakterizajn trajtojn de konkreta heroo en belarta filmo; skizoj-projektoj de la filmpentristo, prezentantaj al la priskribo la plej konvenajn kaj plej proksimajn bildojn de la herooj.

TRANSFOKATORO (VARIO-OBJEKTIVO)

objektivo de la filmkamerao, permesanta proksimigon aŭ malproksimigon disde la filmataj objektoj, ĉe kio la kamerao restas senmova en sia loko.

TRUKO (TRUKAJ FILMBILDOJ)

artifiko uzata en filmado por doni la aspekton de realeco al dekoracio ktp. Arangante pecon de kineja dekoracio filmi ion per artifika procedo krp. por doni al la projekciotaj scenoj ŝajnon de realaĵo.

TRUK-MAŜINO

maŝino, kiu ebligas reprodukti bildojn aŭ bildaron de filmo, enmetante en ilin ĉiajn modifojn: pligrandigon, surimpresojn ktp.

Noto de la aŭtoro:

Tiu ĉi filmterminaro estas modesta provo de Esperantigo de specifaj filmaj terminoj kaj nocioj. Kelkaj el ili estas prenitaj el literaturo, teatro kaj aliaj artoj pro ilia komuna stilistika deveno kaj proksimeco.

La aŭtoro estos ege danka al ĉiuj, kiuj eventuale korektus la tradukon kaj la klarigon de iuj el la terminoj kaj nocioj aŭ aldonus novajn.

I. Unua parto

Iom pri mi mem kaj pri mia libro	5
Ĉio komenciĝis kvazaŭ ŝerce	11
Mi fariĝas kinoaktoro	15
Kiuj estas „La aŭdacaj plumoj“?	25
Distribuo de la roloj	33
Kelkaj vortoj pri tiuj, kiuj kreas la filmojn	45
Leciono pri historio . . . de la kino	61
La scenaro — tiu mirinda libro! . . .	69
La magio de la ŝminkado	75
En la pavilono de filmado	81
„Estu pretaj por provludo! ...”	89
Nia unua vera filmbildo	97
Pri la nekonsekvenco de la scenoj ĉe filmado	101
kaj pri io alia’...	
Vera universala magazeno! ...	

Laŭ la piedsignoj de la krimuloj, aŭ la heroaĵoj	105
de „La aŭdacaj plumoj”	115
La pentraĵoj kaj la pupoj viviĝas	127
Hejme	131
Filmado en la lasta lernotago	137
Oni nomas ilin sorĉistoj	143
Ĉe la majstroj de fajro, fulmoj kaj nebuloj	147
Kiom ridinde sestis vidi vin mem en filmo! ...	155
La parolon havas la tondilo	163
Mia unua intervjuo	167
„Silenton! Sonregistrado! ... ”	177
Leteroj de nekonataj amikoj	183
Bonŝancon, kavaliroj de la „Aŭdacaj plumoj”! ...	

II. Dua parto

Konciza filma terminaro	189
-------------------------	-----